
Esperanto - Rok - Fangazeto

ROK-gazet'



MICKE ENGLUND



KEF


SUPERSNAZZ


E.V.


ĴOMART kaj NATAŜA

Eldonas
EUROKKA
F-31450 DONNEVILLE

NUMERO 6
Jaro 1994

•*Ĉefartikolo de Flo!*

NEPRA LEGENDAĴO

Mi deziras al vi feliĉegan kaj sukcesan novan jaron 94. 93 ne estis superjaro, sed okazis sufiĉe por plenigi tiun ĉi 6-an numeron de *Rok-gazet'*!

Ĉi-somere ni estis en la 4-a **KEF**, unu el la plej trafaj espo-kultur-festivaloj. Ni kunportis de tiu vojaĝo raportojn kaj intervjuojn kiujn vi malkovros en la sekvantaj paĝoj. Ni povas diri ke tiu ĉi 6-a *Rok-gazet'* estas speciala dosiero pri KEF. Sed ankaŭ amaso da novaĵoj certe tikletos vian scivolemon.

Kelkaj el vi jam scias pri la naskiĝo de mia dua infano, sed en ĉi tiuj linioj mi volas anonci ĝin oficiale: **Nevik'** naskiĝis la 3-an de junio 1993, hejme samkiel **Karlin'**.

Tie, mi volas gratuli kaj bonvenigi novnaskitajn bebojn: **Meva CUENOT-BOILAUX**, kiu naskiĝis la 24-an de septembro 93 en *Valentigney*, kaj **Sami BOUKORTT-BOULET**, kiu naskiĝis la 4-an de septembro 93 en Parizo (lia patrino estas eks-**Amplifiki**-anino **Aline** kaj lia patro eks-**Shiffters**-ano). Bonvenon al novaj espo-gerokemuletoj!

En la 5-a *Rok-gazet'* ni lanĉis alvokon. Temas pri **Vinilkosmo:** ni estas pretigantaj kompilaĵon kun originalaj espo-kantoj de espo-rok-, pop-, kaj folk-bandoj. Se vi deziras subteni tiun projekton, resendu kiel eble plej frue la antaŭmendilon kiu helpos por ĝia realigo.

Rilate *Rok-gazeton*, ni havas amason da problemoj, inter ili la abonprezoj por netranspagpovaj landoj, el kie multaj volas aboni. Laŭ la konsiloj kaj petoj de legantoj kiuj resendis al ni la demandarojn, ni decidis modifi la tarifaron por ke ili povu aboni ekde la jaro 94. Helpitaj de la kotiztabelo de SAT, ni pretigis novan tarifaron.

Tamen ni volas atentigi vin ke abonoj validas ne por unu jaro sed por 4 (kvar) sinsekvaj numeroj. Sed ni ne malpermesas ke geuloj kiuj volas subteni nin abonu pli ofte *Rok-gazeton*.

Cetere, vidinte la nesufiĉe nombrajn reagojn kaj abonojn (ni sendis ĉirkaŭ 1.000 demandarojn pri *Rok-gazet'*, kaj revenis plenigitaj apenaŭ 100), ni ne plu povas certigi ke aperos 2 (du) numeroj jare; tamen ni klopodos ĉion fari por tion atingi. Se tio ne eblos, ni eldonos novan numeron nur kiam estos sufiĉe da mono, simple ĝi estos iom pli dika; tio jam validas por ĉi tiu 6-a numero, ĉar kvankam ĝi estis preta ni ne havis la monon por aperigi ĝin antaŭe. La eldon-ofteco de *Rok-gazet'* dependos de vi ĉiuj, kaj ni tre bedaŭras la nesubtenon flanke de ĉiuj esp-asocioj kaj kluboj al kiuj ni senpage sendis *Rok-gazeton*, kaj kiuj eĉ ne dankis. Verŝajne *Rok-gazet'* estas tro aĉa por ili. Mi certigas ke se ĉiuj esp-asocioj kaj kluboj abonus nian revuon por subteni ĝin ni ne plu havus tiajn problemojn.

Mi pli kaj pli komprenas kial la espo-kulturo kaj Movado tiel lame statas; kvankam kelkaj aktive kaj persistege agadas, aliaj pasivas, bremsas, kaj eĉ perfidas. Iom amara konstato, ĉu ne?

Tamen ni provos kaj klopodos plibonigi *Rok-gazeton* laŭ la deziroj de la fidelaj legantoj kaj abonantoj kiuj zorgeme respondis al niaj demandoj, por ke ĝi atingu plej kontentigan aspekton kaj enhavon. Ekde tiu ĉi numero ni provas konkretigi viajn sugestojn, konsilojn, kaj rimarkojn. Tiel via aktiva subteno utilas por plibonigi vian gazeton. Tio pruvas ke ankaŭ vi partoprenas en la realigo de *Rok-gazet'* kiel ankaŭ en la plivigligo de la espo-kulturo.

Cetere, ni dankegas ĉiujn kiuj helpis nin per grava subteno, precipe **Aaron KOENIG** kaj **Jean DOUBLET**.

Gratulojn kaj dankegojn al vi ĉiuj, daŭrigu tiel, sed ankaŭ sendu artikolojn, raportojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, ktp., por ke *Rok-gazet'* estu pli ol iam la frukto de vigla kaj efika kunlaborado. ■



Enhavo

Tekno-logoj
4 MIDI-Lando 3. Kiel redakti MIDI-datumon.

Vivu vive!
6 Oceano ne tiel... pac-efika La Bruemaj Beboj ĉe Zamfesto 93
7 EOLA 93
8 4-a Arta Semajno Hej! Hula! Hej!

KEF-Dosiero
9 La pulvobarelo ne eksplodis
10 Skandinava frandaĵo
11 4-a Kultura Esperanto-Festivalo en Kopenhago
KEF-Dialogoj:
12 Ĵomart kaj Nataŝa
14 Ĵak Le Puil
16 Micke Englund
17 Persone
19 Amplifiki

Kritikloj
20 *Tohuvabohuo* (Kajto)
21 *Ne donu tro* (J. Le Puil)
Harmoni' (Mikola kaj Garamvölgy)

En Diskeldoneja Ĝangalo
22 Ĝimini-Muzik'
23 Lola Label

Malkovrindaĵoj
24 Elektric Music
25 Tutti Futti

Esprok-Bandoj
27 Piŝamandurjes
28 Blus-Haltejo

Intervjuo
29 Kiu kaŝas sin malantaŭ Tutmonda Muziko?

Malrokmuziko
30 Keĉka/Kantika
31 Malrok-Informoj
32 Akordo

Tute ne Gravas
34 Sen paco muziko ne ĝueblas
35 Vinilkosmo-Kompilaĵo
36 Gvidlibro pri Esperanto-Kulturo
37 Muzikterminaro (3)
40 Haste-Klaĉe
41 Anoncoj
42 Radio-logoj
43 Rokmuzika Reto

ROK-gazet' n-ro 6

Administration-rédaction/ Administrejo-redakcio:
Rok-gazet' p/a EUROKKA
F-31450 DONNEVILLE
Francio
Tel: +33 61.81.95.65

Directeur de publication/Eldondirektoro:
Floréal MARTORELL

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoro:
Bertrando ALBAULT

Rédacteurs/Redaktora stabo:
FLO!
Marcelo REDOULEZ
Bertilo WENNERGREN
Rikardo CASH
ONO Takao
Andrej ANANJIN
Elena LEBEDEVA
Rafa BLANCO
Richard FAVRY
Jérôme VARQUEZ
Olivier MOREAU
Stephan
Jak KOBEL
Sonja TIĤOVA

Traductions/Tradukhelpo:
Tony GUYOT
Paivi SAARINEN
Karlheinz CROISSANT
RoKo

Info/Informoj:
Henri MASSON
Herman DEUCEUNINCK
Konrad GRAMELSPACHER
Thomas PUSCH
Herman BEHRMANN
Ionel ONET

Saisie/Enkomputiligo:
Flo!
RoKo
Takao
Marcelo
Bertilo

PAO/PKE:
RoKo
Vân METHEL

Tirage laser/laserprintado:
d-ro André ALBAULT

Dessins/Desegnoj:
Niko
Anĉjo
Frederok
Martin WEICHERT
Kruela DEVIL'

Photos/Fotoj:
Flo
Marcelo
Amparo
Axel BELINFANTE
Marija KOĈETKOVA
Flemming SARUP

Maquette/Enpaĝigo:
Flo!
Vân
RoKo

Expédition/Ekspedo
La Lletra A - Reus

Imprimerie/Presejo:
La Chaine Graphique

Distribution/Distribuo:
Associations espérantistes/
Espo-asocioj

Dépot legal à parution
Commission paritaire en cours
Edité par/Eldonas:
EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio)
F-31450 DONNEVILLE



Atentu! Abono validas por 4 numeroj kaj ne por unu jaro.
Tiuj ĉi tarifoj validas ekde la 6a numero de *Rok-gazet'*. Ili estos rekalkulitaj por la jaro 1995.

Abontarifoj
35 NLG
21 IRKP
100 FRF por Francio
20 USD
16 EKU
Por netranspagpovaj landoj ne sube listitaj:
20 NLG, 12 IRK, aŭ egalvaloro.

Argentino	20 NLG aŭ egalvaloro
Belorusio	1 500 rubloj
Brazilo	20 NLG
Bulgario	100 levoj
Ĉehio	350 ĉ. kronoj
Ĉinio	22 juanoj
Estonio	20 kronoj
Hungario	1 100 forintoj
Jugoslavio	12 IRKP aŭ egalvaloro
Kroatio	8 000 HRD
Latvio	2 latoj
Litovio	4 lidoj
Polio	60 000 zlotoj
Rusio	1 500 rubloj
Slovakio	350 sl. kronoj
Slovenio	600 tolaroj
Ukraino	1 500 rubloj

Ni bezonas peranton por ĉiu lando supre listita laŭ tiuj kondiĉoj. Volontuloj proponu sin! Por landoj ne listitaj, faru proponojn.

Anoncetoj:
Ĉiu linio kostas 6 FRF, 2 NLG, 1,5 IRK.

Por la transpagpovaj landoj, tiuj abonoj pagendas ĉu per nia UEA kodo Rokk b, ĉu per internacia poŝtmandato al la adreso de EUROKKA.

Pagmanieroj
IRKP (Internaciaj Respond-Kuponoj)

Bank-konto
EUROKKA (Association Espéranto-Rock)
B 15999 G 2206
N C 40247960 CL 10
CMM Toulouse St.-Agne
F-31400 TOULOUSE
Francio

UEA-Konto
kodo: rokk-b

Landaj kotizperantoj

Argentino
Atiljo ORELLANA-ROJAS
Argentina Esperanto-Asocio
C.C. 1428
RA-5000 CORDOBA

Aŭstralio
Libroservo de AEA
P.O. Box 230
AUS-2036 MATRAVILLE - N.S.W.

Belgio
Eldonejo-Librejo SONORILO
Doornstraat 22
B-2610 WILRIJK

Brazilo
Brazila Esperanto-Ligo
Cx Postal 11-1105
BR-70084 BRASILIA - DF

Britio
E.A.B.
140 Holland Park Ave.
GB-W11 4UF LONDON

Bulgaria
Muzika Esperanto-Ligo
p/a Dimitâr TERZIEV
ul. Milin Kamâk 58
BG-1421 SOFIA

Ĉehio
Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(Junulara Sekcio)
Jilská 10
CS-11001 PRAHA - 1

Ĉinio
WANG Xigen
Chizhou China Travel Service
15 Qiupu Road, Guichi City
CN-247100 ANHUI

Danio
Wolfgang KIRSCHSTEIN
Jullands allé 11, 3.tv.
DK-8000 ÅRHUS - C

Germanio
Espo-libroservo
Vera TAUTORAT
Prenzlaner Allée 87
D-10405 BERLIN

Hispanio
Nikolao GIL
Poŝtfako 305
E-24080 LEON

Hungario
Lingvo-Studio
Szolgaltato Iroda
PF 87
H-1675 BUDAPEST

Italio
Mauro TAUZZI
Str. Rozzol 47
I-34139 TRIESTE
pĉk-konto 11493343

Japanio
AKCP
Takao ONO
Kazigaya-tyo 43-8
Sakae-ku
J-247 YOKOHAMA-si

Jugoslavio
Renato PETROVIC
Ustanička 218/21
YU-11000 BEOGRAD

Kanado
Esperanto-Libroservo
Normand FLEURY
6358-A rue de Bordeaux
CND-H22G 2R8 MONTRÉAL-QC

Katalunio
Centro de Esperanto Sabadell
Apartat 407
E-08200 SABADELL

Kroatio
Kroata Esperantista Unuiĝo
Marija BELOŠEVIC
Sveti Duh 130
HR-41000 ZAGREB

Litovio
Viktoras BABIULAITIS
Ab.d. 168
LT-5800 KLAIPEDA

Nov-Zelando
Gwenda SUTTON
12C Herbert Gardens
186 The Terrace
NZ - WELLINGTON - 1

Portugalio
Portugala Esperanto-Asocio
Rua Dr. João Couto N 6 R/C-A
P-1500 LISBOA

Slovakio
Stano MARČEK
Zvolenská 15
SL-03601 MARTIN

Svedio
Sveda Esperanto-Federacio
p/a Lisbet ANDREANSSON
Södra Rörum PL 455
S-242.94 HÖRBY

Rusio
Andrej ANANJIN
p/a Esperanto
A/ja 111
RUS-143006 ODINCOVO
Moskovskoj obl.

Usono
ELNA
P.O. Box 1129
USA-94530 EL CERRITO - CA

•*ONO Takao – LA MEVO – prezentas:*

MIDI-LANDO

3. Kiel redakti MIDI-datumon?

La gitar-elsendilo



Denove reflugas **La Mevo** al vi! Antaŭ ĉio turnu vin al mia lasta rubriko en la 5-a numero de *Rok-gazet'*, kio bezonas iom da korekto pro pres-eraro: **Yamaha**-G10/G10C jam ne aĉeteblas almenaŭ en Japanio, ĉar ĝi jam ne produktiĝas. Ne diru "Ve!", ĉar ekzistas similaj tipoj, ekzemple **Casio**-PG300, k.a.

Pli allogus la gitaristojn la alistila jam priparolita elsendilo, kiu konsistas el du partoj: la orelo kaj la korpo. La orelo estas malgranda kesto el mikrofono kaj amplifikilo, kaj elsendas signalon tra ĝia kablo al la korpo. La fore metita korpo ŝanĝas la signalon en diĝitan MIDI-signalon, kaj elsendas tra MIDI-kablo al sinteziloj aŭ sekvenciloj. Per tiutipa elsendilo la gitaristoj povas facile esprimiĝi miksante realan kaj sintezilan sonojn. Bona ekzemplo estas **Roland** -GR1/GK2.

Ĉiuokaze ŝajnas al mi, ke multaj el la gitaristoj ne havas grandan intereson pri la gitar-elsendilo kaj la gitar-sintezilo. Eble ĉar la gitaristoj malpli bone konas diĝitajn muzikilojn ol la klavaristoj, kaj ĉar etoso de la gitarsintezilo aŭ la gitarelsendilo plus sinteziloj malsamas al la ordinara gitaro. Kaj mi hipotezas la alian kialon: sonfrazo de la rok- kaj la blusgitaristoj estas tre gitareca, kaj tial la gitaristoj devas atente elekti notojn por sia sonfrazo, se ili deziras esprimiĝi pli riĉe. Se ne, la konektita sintezilo sonas ĉiam ĝuste kiel la gitaro spite al diversaj sintezilaj sonoj pianeca, orgeneca, violoneca, ktp.

La blovil-elsendilo

Eĉ malatentemaj legantoj rimarkis ke mi forgesis mencii pri la MIDI-blovilo en mia lasta rubriko. Fakte mi forgesis, ĉar ili ne trovas sin en mia privata studio. Ĉi tie mi nur prezentas fotojn de Akai-EWI3000/EWI3000m kaj Yamaha-WX11/WT11 por via referenco.

Iom pri DAT, MD, kaj DCC

En la 5-a numero de *Rok-gazet'*, Floréal MARTORELL bone klarigis postkasedajn produktaĵojn. Mi profitante ĉi tiun ŝancon deziras aldoni per unu-du frazoj laŭ teknika vidpunkto. Se vi zorgas pri sonkvalito, ne plu ĝenu vin aĉeti MD-n kaj DCC-n. Ĉar la homaj oreloj ne povas distingi surbendigitajn sonojn en la tri medioj, spite al iom malbonkvalitaj sonoj de MD kaj DCC. Estas nature, ĉar ili havas nur kvaronan aŭ kvinonan spacon kompare DAT-on por memorigi diĝitan datumon sur la DCC-bendo aŭ la MD-disko. Sed dank' al mirinda elektronika teknologio realiĝis sufiĉe bona sonkvalito de DCC kaj MD, kia preskaŭ samas al tio de DAT kaj KD. Mi ne tuŝas ĉi tie detalojn por ŝpari paperspacon, do, demandu min, se vi interesiĝas pri teknikaj aferoj pri DCC kaj MD.

DAT estas jam normo kiel mastra surbendigilo ne nur por profesiaj muzikistoj kaj sonproduktantoj, sed ankaŭ por amatoraj muzikistoj kaj bandoj en Japanio. Ĉar la nuna prezo ne tiel malsamas al KD aŭ al la plej bona analoga kasedilo, kaj ĉar jam ekzistas malgranda (portebla, eĉ enmanigebla) kaj pilfunkciigebla DAT. Ne problemas aĉeti DAT-on, ĉar ĝi kaj ĝia diĝita formato longe vivos. DCC estas taŭga ankaŭ por la analogaj kasedoj (nur por aŭskulti). Se vi jam havas multe da sonstokoj en analogaj kasedoj, DCC tre bone funkcios, kaj por vi ne necesas atendi ĝis kiam aperos multe da serioj de diĝitaj muzikbendoj (muziksoftvaro) por DCC. Etoso de MD estas simila al KD, ĉar ĝi taŭgas por rapide trovi kaj ludi celitan sonon en la disko. Tio estas merito de la diskmedio. Marĝene mi prezentos unu el la plej novaj kaj porteblaj DAT-oj, **Sony**-TCD-D7.

Bona novaĵo el Japanio

Mi ĉesu plu min turni al la 5-a numero de *Rok-gazet'*, sed antaŭ ol tuŝi ĉifojan temon, mi donacas al vi bonan novaĵon: jus aperis de Akai nova 4-linia diĝita surbendigilo (surdiskigilo, se strikte esprimite), DR4d, kiu kostas nur 220 mil enojn (116 USD, 134 EKU). Komparu prezojn de ĝisnunaj 8-liniaj diĝitaj surbendigiloj. Ĉirkaŭ nur triono! Eble venontfoje la diĝitaj surbendigiloj kaj ilia sinkrono kun MIDI klariĝos. Atendu!

MIDI, komuna lingvo por sinteziloj

Ĉi-numere mi klarigos kiel redakti MIDI-datumon kiu havas propran formaton difinitan en la MIDI-normo. Tio estas kvazaŭ la lingvo internacia, esperanto. Tial se mi parolas eĉ kun la japana prononc-dialekto, kaj se alilandanoj ne komprenas parteton, tiam ili tamen ĝenerale kaj plejparte komprenas kion mi diras.... Simile al tio, la MIDI-datumo enhavas krokodiliĝi-tan parton kiun komprenas nur propraj sinteziloj. Sed la aliaj ordinaraj partoj de la MIDI-datumo estas perfekte komunaj. Se ne, kiel sukcese konekti









japanan sintezilon kun usona? Mi montros al vi kio okazas se vi puŝas iun klavon de via klavar-elsendilo:

Jen estas la datumo kiu sendiĝas kiam vi puŝas klavon de via sintezila klavaro:

Binara kodo:	**Ĝia signifo:**
1001nnnn:	La MIDI-kanalo (0-15)
0kkkkkkk:	La noto (0-127; 60 por meza C)
0vvvvvvv:	La forteco (0-127)

La sekvantaj datumoj sendiĝas, se vi demetas vian fingron de la puŝata klavo:

1000nnnn:	La MIDI-kanalo
0kkkkkkk:	La noto
0vvvvvvv:	La forteco

Sekvenciloj povas scii el la MIDI-datumo kiel ludas muzikistoj: kiam puŝi la klavon, kiom forte (t.e. rapide) puŝi la klavon, kaj kiam demeti la fingron. La sekvenciloj traktas tiun bazan datumon; konservas, redaktas kaj resendas ĝin.

Sekvenciloj diverstipaj

Por plej facile kompreni la plej bazan sekvencilon, supozu sintezilon kiu havas en si redaktilon. Ofte ĝi traktas la MIDI-signalon per kelkaj fikciaj linioj. Ju pli altiĝas la kapablo de sekvencado, des pli malfacile ĝi uzeblas. Ĉar limigita spaco de la sintezilo ne povas posedi multe da butonoj, grandaj ekranoj, ktp., kaj ĉar mikroprocesiloj en la sintezilo laboras ne nur por sekvencado, sed ankaŭ por aliaj regadoj. **Yamaha-QX3** estas la alia ekzemplo kiu pli facile uzeblas kaj pli alte funkcias. Ĉar ĝi planiĝas jam de-origine por sekvencilo. Sed mi dubas ke tiu tipo akiros pli da procentoj en la merkato, ĉar merita estas nur ĝia kosto. Nuntempe almenaŭ en Japanio kaj Usono multaj personaj komputiloj malmultekostas, kaj kelkaj muzikistoj kunportas ilin eĉ en koncertejon.

La persona komputilo kiel MIDI-sekvencilo

Plej facile uzebla kaj la plej saĝa sekvencilo devas esti speciala programo por la persona komputilo. (Mi nun evitas mencii pri tre multekostaj profesiaj komputilsistemoj en la profesia muzikstudio.) La persona komputilo estas tre taŭga por redaktado de la MIDI-datumo, ĉar ĝi havas grandan ekranon, vastan memorspacon, literklavaron kiel tajpilo, ktp. Kaj estas merite ke oni facile povas renovigi ĝin mem ŝanĝante la programon. Unu ekzemplo estas la sekvencila programo **Cubase** [legu: *Kjubejs*] kun la persona komputilo **Atari-4040ST**, kiu troviĝas en **Pigo-Studio**. En mia privata studio ekzistas la alia tre bona komputilo por muziko, **Apple-Macintosh** [legu: *Makintoŝ*], kie kuras la programo **Digital Performer** [legu: *Digital Pafoma*]. Estas interese, ke mia **Macintosh** tutsame funkcias kiel **Atari** en **Pigo-Studio**, se mi enkondukas la programon Cubase.

Kiel redakti la MIDI-datumon?

La MIDI-datumo konsistas el multaj eroj da datumo, sed nun por faciligi la aferon mi utiligos la jus prezentitan MIDI-datumon, kiu naskiĝas pro la enpuŝado de via klavaro.

Antaŭ ol redakti, necesas enmeti la datumon en vian komputilon. Ekzemple, vi nun vidas sur la ekrano tian panelon prezentitan en **Figuro 1**. Elektu **REC**-butonon per muso de la komputilo. Tiam la butono nigriĝas, kio signifas ke ĝi estas preta ricevi la MIDI-datumon. Do, ludu vi, la elstara klavaristo! Se vi elektas **STOP**-butonon, tiam la **REC**-butono blankiĝas, kaj malfermas fenestron kiel en **Figuro 2**, kie ekzemple 8|4|464 signifas: Mezuro|Bito|Subbito. Por 4/4 unu mezuro estas el kvar bitoj, kaj unu bito el 480 subbitoj. Laŭ sekvencilaj programoj diferencas la etikedo, la desegno de paneloj kaj la butonoj, ktp. Sed la principo estas la sama.

La sekvencilo cerbumas kiel modifi la datumon

Nun vi estas preta libere ŝanĝi la MIDI-datumon per la klavaro kaj la muso de via persona komputilo, ekzemple: modifi iun noton C1 al F#1; ŝanĝi eksonan tempon de iuj notoj; forigi notojn ne necesajn; ktp. Ekzistas alia maniero por modifi multe da notoj. Por tion fari, unue elektu iun zonon en la dekstra fenestro en **Figuro 2** (kie elektitaj notoj nigriĝas), kaj due plenumigu la ordonon elektante menuon, kiu montriĝas en la maldekstra menuo en **Figuro 2**. Kiel vi vidas, la sekvencilo havas multe da ordonoj per kiuj oni povas libere modifi laŭ sia ideo. (Kvankam ĝi esprimiĝas angle, vi povas, se vi deziras, modifi ilin alilingve.) En tiu okazo sufiĉas nur montri ne konkrete kaj ne detale, ĉar la komputilo detale kalkulas kaj modifas la datumon. Se la rezulton vi ne kontentas, tiam ordonu la komputilon reakiri la lastan datumon. Tiel vi povas provi tian modifon multfoje ĝis via kontento. La modifo per la komputila sekvencilo estas ege interesa kaj eĉ amuza.

Aliaj utilaj kapabloj de la sekvencilo

Mi ofte ne utiligas muziknoton uzante la sekvencilon, sed ĝi kapablas montri el la datumo muziknoton aŭ originalan grafikan sistemon. Se necese dum la redaktado, vi povas konsulti la muziknoton. (Tiam atentu, ke via muziko ne fariĝu tro maŝineca.) Krom la modifo de notoj, la sekvencilo povas ŝanĝi tempon laŭvole; aldoni homecon uzante **Wheel** (rado) aŭ **Stick** (bastineto) de via sintezilo; konservi en la flekseбla disko de via komputilo la sistem-datumon necesan por via sintezilo. Kaj kelkaj muzikistoj tiel akiras novan ideon: ŝanĝi drum-sonon de la sintezilo en piano-sonon; aŭdi tutan muzikon renverse de-piede al ĝia kapo; aŭdi kun tro rapida aŭ malrapida tempoj; ktp. La sono mem fariĝas tre stranga, sed ĝermas io nova en la muzikistoj. Ju pli abundas ideo en la muzikistoj, des pli unika fariĝas la sekvencilo. Ĉu vi amuzas vin ĝisoste per via sekvencilo? ■



Yamaha WX11



Yamaha WT11







Akai DR4d

VIVU Ĉe Nu Ne!

Ilia oceano... ne tre pac-efika!

•Raportas Stephan Bertholio

La 27-an de oktrobre, ĉe la tuluza noktoklubo *Bikini*, kuniĝis du bandoj – unu el Japanio, alia el Aŭstralio.

La unua, **Supersnazz** (*"Laŭmodega"*), konsistis el nur knabinoj – kvar japaninoj kiuj pruvis al ni ke necesas pli ol du atombomboj por malfortigi popolon kiu soifas rokenrolon! Jeprograme: punk-roko laŭ surf-tendenco rekte inspirita de la **Ramones** (krom ke la **Ramones** ne portas harplektojn!), plus kelkaj malnovaĵoj kiaj *"Commanche"* de **Link Wray**, aŭ la famega *"Pow Pow Mow Mow"* kiu siatempe inspiris la **Trashmen** komponi *"Surfin' Bird"*. Aldonu al ĉio ĉi la ĉarmon kiun povas generi la ĉeeston de kvar knabinoj surscene – vi facile imagos la temperaturon ĉe *Bikini* post tia kvalita prezentado.



Kiam la aŭstralianoj, la **Hard Ons** (*"Stanguloj"*) ekludis, la jam menciita temperaturo eĉ pli altiĝis. Komprenonte tion, sufiĉas scii ke la tri muzikistoj ludas fortegege, ofte rapidege, saltante ĉien: jen la esencaĵo de pura suko de energio je plej kruda kaj sovaĝa stato (kaj mi ne troigas!). Estas delikate difini ilian stilon, ĉar iu-momente ĝi proksimiĝas tiun de la **Stooges** (sed tamen pli instrumenta) kaj la **MC5**; kaj ali-momente ĝi troviĝas je du coloj de hardkoro. Certas ke ligantaj la pecojn kiel ili faras, oni malfacile komprenas kio okazas. Oni povas bedaŭri iujn instrumentaĵojn iomete tro longajn, sed ĝenerale la sumo de tiu ĉi koncerto tre pozitivas.



Nun vi komprenas kial *pac-efika* ne estas la ĝusta adjektivo por kvalifiki la oceanon flankitan de du landoj kies enloĝantoj ŝajne volis eksplodigi ĉion ĉe *Bikini* la 27-an de oktobro. ■



La Bruemaj Beboj



•*Raportas Flo*

Okaze de la Zamfesto en Tuluzo la 12-an de decembro 93 kunorganizita de ***EKC*** (Esperanto-Kultur-Centro), Tuluzaj Espo-Fervojistoj, kaj la aliaj esp-asocioj, la ***Bruemaj Beboj*** entuziasmigis la ĉeestantaron. Tiu Zamfesto havis ampleksan kultur-programon fare de diversaj klubanoj. Instigitaj de EUROKKA, Jomo, kantisto de la ***Rozmariaj Beboj***, kaj Stephan, kantisto de la ***Bruemaj Najbaroj***, kuniĝis por tiu okazo: tiel naskiĝis la ***Bruemaj Beboj***. La du junuloj sukcesplene prezentis proprajn kantojn kaj aliajn popkantojn konatajn de ĉiuj espistoj. Kia agrabla frandaĵo tiu unua koncerto! Hej uloj, ili alportus bonegan etoson en viaj aranĝoj! Kial ne en IJK kaj UK en Seulo? ■

• Andrej Ananjin kaj Elena Lebedeva raportas pri **EOLA-93**

Esperanto – Lingvo Arta



La Sovetia Junuara Esperanto-Movado (**SEJM**) ĉiam same multe kantis en esperanto, kiom ĝi parolis. En la kantoj esprimiĝis niaj revoj, nia amo, nia amikeco. Kantoj estis parto de nia koro, animo. La kantistoj pli multe influis la movadon kaj estis nemezureble pli popularaj ol la "movadaj politikistoj".

Post la du malfacilaj jaroj de politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, oni povis havi dubojn ĉu ni restas samaj, ĉu ne perdiĝis tiu romantika kantemo pro la nova pragmatisma vivostilo. Kaj jen, de la 5-a ĝis la 8-a de marto 1993, denove okazis festivalo **EOLA**. La kvina. Jam en la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj, jam en kapitalismo. Ve, dum la du pasintaj jaroj perdiĝis pluregaj iamaj korifeoj: **Soroka** kaj **Amzejev** nun estas en Svedio, **Marina Korotj** en Israelo, **Elena Bystrickaja** en Gemanio, **Olena Kopystjanska** en Usono. Iuj malaperis pro familiaj aŭ ekonomiaj problemoj. Sed tiom granda estas la krea potencialo de nia movado, ke jen kaj jen oni povis aŭdi pri novaj talentoj. **EOLA-93** permesis ilin renkontiĝi kaj ekkoniĝi.

Sur la scenejon de ripozejo **Ĉajka** proksime al Ĉeboksary, unu post la alia ascendis la konkursanoj: kantistoj, poetoj, deklamantoj, aktoroj. Kompreneble, laŭ la tradicio la kantistoj estis la plej multaj – iuj el ili jam konataj, aliaj aperintaj la unuan fojon. De la halo ilin simpatie kaj aplaŭde subtenis ĉ. 150 junaj esperantistoj – iliaj amikoj kaj konkurantoj.

Al **EOLA** venis gastoj de tuta Rusio kaj de kelkaj eksteraj landoj: Hungario, Japanio, Irano, Belorusio, Ukrainio. Amasaj grupoj venis de Siberio: 14 personoj de Novokuznecko, 8 de Tomsko (3.800 km !). Granda sensacio estis la alveno de la hungara ambasadoro en Rusia Federacio, **György Nanovszky**, akompane de la plej fama esperanto-verkisto, **István Nemere**.

La organizantoj, inter kiuj oni antaŭ ĉio nomu **Aleksandr Blinov**, sukcesis prepari vere bonan renkontiĝon. Estis trovita nemultekosta, tamen komforta eksterurba ripozejo, kun manĝejo, koncertejo, kaj kunvenejoj, sur la bordo de Volgo, en neĝkovrita arbaro. La programo tradicie konsistis el kleriga programo, konkursoj, kaj koncertoj de majstroj. Da ĉi-lastaj estis tri: **Miĥail Povorin** (Moskvo), **Sergej Bozin** (Krasnojarsk), kaj **Andrej Obrezkov** (Ivanovo). En la konkursa parto oni konkuris pri premioj en branĉoj "Kantado", "Propraj Versoj", "Deklamado", "Teatrajetoj", "Distrajoj", "Fotoj".

La konkursaj koncertoj okazis dum du tagoj – entute dum preskaŭ kvin horoj. La kantoj estis alternataj de deklamaĵoj, inter kiuj lokiĝis la teatrajeto, kaj distroj kronis la tuton. La ĉarmaj nigre-ruĝe vestitaj koncert-gvidantinoj saltetis kaj skandis.

La plej forta impreso pri la konkurso estis kaŭzita de la diverseco. Diverseco de stiloj, manieroj, voĉoj finfine. Ankaŭ de la nivelo.

Malkovro de la festivalo oni povas nomi 19-jaran kantistinon el urbo Ivanovo **Maŝa Koĉetkova**. Ŝi verkas profunde poeziajn kantojn, kiuj kombinite kun la bela voĉo, harmoniaj melodioj, kaj perfekta posedo de la gitaro, kreas fortan esperon pri apero de nova stelo en la rusia junulara esperanto-kulturo.

Alia eventuala stelo estas **Nataŝa Soljakova** (Moskvo), konata sub amika kromnomo **Barabaŝka**. Ŝi fakte jam estas konata en la junularaj medioj, sed nur en ĉi-**EOLA** ŝi unuafoje eliris sur la konkursan scenejon. Ŝiaj kantoj estas kortuŝaj kaj emociplenaj, kvankam la orelo de spertulo facile kaptas en ili gramatikajn eraretojn, foje senakuzativecon, k.s. Tio ne estas mirinda – ja estante aŭtoro de preskaŭ 20 esperanto-kantoj, ŝi ne tre flue parolas en la lingvo. Por ŝi esperanto estas ne internacia, sed interamika lingvo, sed ja ĉiuj amikoj parolas ankaŭ la rusan.

Similan situacion havas alia populara kantisto, **Sergej Bozin** (Krasnojarsk). Li verkas kaj plenumas avangarde rokenrolajn kantojn, kiuj dancigas plurajn aŭskultantojn. Ĉi-foje kun li kunkantis **Tanja** el Tomsk. **Sergej** kaj **Tanja** kantas tre impone. Tamen, ĉu pro ne tre bona posedo de la lingvo, ĉu por kaŝi iujn neperfektaĵojn en la tekstoj, ĉu pro imitado de anglalingvaj modeloj, **Sergej** ofte prononcas la vortojn tute nedistingeble.

Oni devus multe diskuti pri la prezentoj de **Miĥail Povorin** (Moskvo) kaj **Andrej Obrezkov** (Ivanovo). Ambaŭ estas prave konsiderataj majstroj. Ambaŭ montris en **EOLA** pli altan nivelon de sia arto. Sed se **Miŝa Povorin** atingis tion per aplikado de moderna muzika komputilo, **Andrej Obrezkov** konfirmis sian reputacion de perfektemulo: lia komplika kaj serioza muziko kun la tekstoj de **Oleg Obuĥov** estas polurita multfoje ĝis la lasta tonnuanco. Li plenmerite ricevis premion por la plej bona majstra koncerto.


Foto: Marija Kočetkova

Sergeo Bozin (dekstre) kaj Andrej Obrezkov

La premion de la spektantaj simpatioj ricevis **Oĉjo** (Berdjansk, Ukrainio). Tiu mirinda junulo kantas sen akompano de iu muzika instrumento. Lia riĉega voĉo kaj muzika sento permesas ravi sen helpo de artefaritaj akcesoraĵoj.

Malgraŭ tio ke ĉi-foje por ili ne estis aljuĝitaj premioj, seriozajn ŝancojn havis **A. Ĥrustljov** (Dimitrovgrad) kaj **A. Koval** (Gomel, Belorusio). **Nina Djomuŝkina** el la regiono de Sankta-Peterburgo, estis notita, sed honeste parolante, se ne estus tia granda konkurenco inter la talentaj kantistoj, ŝi rajtus havi pli da atento. Mi povus bone imagi, ke aperunte en iu eŭropa esperanto-renkontiĝo, **Nina** tuj iĝus internacia stelo. Ĉi tie oni devas pli longe batali por la laŭroj. Espereble **Nina** havas la necesan paciencon kaj krean potencialon por ekesti ne hazarda kometo, sed ascendanta stelo sur la kultura firmamento de la rusia junulara esperanto-arto.

Ankaŭ organizado de renkontiĝo estas arto. **EOLA** havis plurajn teknikajn malglataĵojn – konstantajn prokrastojn de la koncertoj, ekzemple. Sed ĝi kreis bo-o-o-negan etoson. ■

La laŭreatoj de EOLA-93:

Kantado	1.	S. Bozin
	2-3.	M. Kočetkova
	2-3.	N. Soljakova
	4.	N. Djomuŝkina
Deklamado		G. Basov
Propra Verso	1.	V. Meljnikov
	2.	E. Molčanova
	3.	V. Perepelica
Unu Kanto		M. Kočetkova
Ajna Distro		Oĉjo
Majstra Koncerto		A. Obrezov kaj V. Vorobjov

Vivu vive!

4-a ARTA SEMAJNO

•Raportas Sabine Trenner

En majo 1992 okazis la **4-a Arta Semajno** organizita de **Esperanto-Junularo de Brandenburgio** (Germanio). La antaŭaj **Artaj Semajnoj** okazis ekde 1986, sed pro la grandaj problemoj ĉe la esperanta junularo en iama GDR, kvinjara paŭzo necesis ĝis ili povis denove organizi ĝin.

La slogano de la aranĝo estis "**Ni kreu kune**", kaj fakte allogiĝis multaj kunkreemuloj, ĉefe gejunuloj. Ili disiĝis laŭ sep laborgrupoj – **puptreatro, teatro, muziko, koruso, popoldanco, fotografio,** kaj **pentro** – , kaj je la fino ili publike prezentis sian rezulton. Estis ankaŭ riĉa vespera kultur-programo – jen koncerto, jen pupteatro, jen dancado. Laŭ **Sabine Trenner**, unu el la ĉefaj organizintoj: kiu ne ĉeestis, perdis multe da eblecoj.

Kvankam la plejmultaj partoprenantoj estis germanoj, krokodilado estis formale malpermesita, la lingva nivelo estis sufiĉe alta, kaj pro tio la etoso estis tre bona. Inter aliaj grupoj, venis juda muzikgrupo, pupteatro **Miraklo** el Berlino, grupo **Klaŭnado** el Berlino, popoldancistoj ***Volkenträtte*** el Brandenburgio, la **Animoj** el Latvio, kaj grupo **Aŭstra Purpure**.

La **Arta Semajno** estis relative malmultekosta por la partoprenantoj, dank' ĉefe al la **Fonduso "Junularo por Eŭropo"** de la **Eŭropa Unio**), kiu ege subvenciis ĝin. Bedaŭrinde, subvenciitaj estis nur okci-dent-eŭropanoj, kaj orient-eŭropanojn kaj aliajn la organizantoj sukcesis subvencii nur per mondonacoj. Cetere, se iu planas organizi tian aranĝon kaj ŝatus ricevi monhelpon de la **Fonduso**, tiu povas kontakti **Esperanto-Junularon de Brandenburgio**, kiu pretas konsili.

Konsiderante la venontecon, la organizintoj faris du konstatojn: Unue, ke la organizado postulis multegan preparadon. Due, ke ofte mankis novaj, freŝaj tekstoj. Ili do decidis organizi **Artan Semajnon** nur ĉiun duan jaron. Alterne okazos **LITERO, LITeratura Esperanto-Renkontiĝo**, kiun ili uzos por verki kaj traduki kantojn, teatraĵojn, kaj simile.

Ĝis nun, la **Arta Semajno** estas miksiĝejo por ĉiuj art-sferoj. Sed kial el ĝi ne kreiĝus apartaj forumoj por apartaj artoj, ekzemple rokmuziko? Tiukaze, rokgrupoj kaj interesitoj el ĉiuj landoj povus renkontiĝi, ne por nur konsumi, sed por lerni unuj de la aliaj, kaj eventuale kune "bredi" komunan projekton. Jen natura kunlabor-tereno kun **EUROKKA**.... ■



• Muzik-raporto pri la 49-a IJK

HEJ! HULA! HEJ!



49 ijk


•Raportas Olivier MOREAU

Ni ne parolos ĉi tie pri la rokgrupo de la kongreso, ĉar ne estis! Jes ja, vi bone legis: neniu rokkoncerto okazis. Feliĉe, dum la inaŭgura spektaklo en la urbo Vraca, **Nikolin'** kantis kelkajn kantojn de sia repertuaro. Sed nur kvin-ses kantojn....

Tamen aliaj eventoj laŭ la kultura vidpunkto estis tre interesaj! Unue ni citu la plej profesian el ili: la Ŝtatan Pupteatron de Vraca, kies dramaturgo estis la prezidanto de la LKK, **Ljubomir Trifonĉovski**. Tiu grupo prezentis la **Karnavalon de bestoj**, ombro-spektaklon, laŭ la samtitola muzikverko de **Saint-Saëns**. Unu horo da plezuro, kie la geaktoroj havis eblecon montri, ke ankaŭ ombroj povas esti internacie kompreneblaj. Sekvante la muzikon, ni spektis ĉiujn bestojn (elefantojn, birdojn...) kiuj rilatas al muziko.

▪ Ankaŭ malklasika muziko estis: ĉiuvespere **Arnau Torras** kaj **Felip Artero** el Katalunio plezurigis nin per muziko tute malsama ol en kutimaj diskejoj. Kantojn el eble pli ol dek lingvoj ni aŭdis: la **Gipsy Kings**, la **Bamba**, **Lambada**, la **Mano Negra**, bulgaraj popoldancoj (lernitaj dum la tago).... Feliĉe, ni ne devis suferi aŭskultante tro da dancmuziko, acidmuziko, aŭ *«House»*-muziko.... Do vere gratulon!

▪ Ankaŭ malmuziko estis: pardonu, Jan, sed via *«Hej! Hula! Hej!»* ne estas muziko – estas militkrio! Por ke la nepartoprenintoj komprenu pri kio temas, jen: **Jan Navratil** el Ĉeĥio, per sia laŭta voĉo, petis plurfoje ke ĉiuj obeu lin. (Neniu protestis.) Kiam li malsuprenirigis sian brakon, ĉiuj kune kantis *«Hej!»*, poste li ekmovigis sian brakon dekstre, kaj ni ĉiuj kantis *«Hula!»* Ni do esperu ke li kreos novan rokgrupon.... Li kapablas.... [Lia adreso troviĝas en la rubriko Haste- Klaĉe]. ■



EMBLEMO DE LA 50-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

LA PULVOBARELO NE EKSPLODIS



Foto Flemming Sarup

•Raportas Rafa Blanco

K*rudttønden*.... Ĉu tio temas pri nomo de sovaĝa rokensemblo?

Ĉe ni tiaj orelfrapaj epitetoj furoras kiam entuziasmaj rokemuloj elektas nomon por ĵus fondinta grupo; des pli sukcesus se oni scius ke la signifo de tiuj silaboj alĝustiĝas al la koncepto "pulvobarelo"....

Sed la iama ĉevalejo ne eksplodis kaj centkvinopo da kultursoifaj espistoj gustumis specialan Festivalon ĉe ege agrabla loko, kelkfoje etkapacita por la tuta ĉeestantaro.

KEF pli kaj pli enradikiĝas en la verda kalendaro, kaj la "veteraneco" de tiu nordia festivalo estas garantio pri organizo kaj ravo.

La muzika fako ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la programo kaj la koncernaj antaŭviditaj esperoj sufiĉe kontentige plenumiĝis.

La profesiiĝo de **Kajto** ja konstatiĝas. Mi miras pri la koncerto-koncepto kiun disvolvigas la **Kajto**-anoj, nome, ili estas unu el la lastaj daŭrigantoj de la itinera tradicio de iamaj popolmuzikaj trupoj kiuj subĉiele koncertadis de vilaĝo al vilaĝo per pli ampleksaj rimedoj ol la nuntempaj strikte komercaj.

Kanonkantigado, muziko por pupteatro... ne estas kutimaj eroj dum folkaj koncertoj kie ĉefas basgitarsono, amuzo, marŝoritmo, kaj aŭktonaj ekzotikaĵoj.

La prezento havis ritmon kaj ĉarmon, la muzika akompano alloge subtenis kaj ornamis senteman kantadon pri variaj popoltemoj, sed ĉefe la maro, kiu iĝis konstanta referenco dum la tuta koncerto, preskaŭ alportinte en la halon ruman kaj salan odoron. [Jes, ĉu vi memoras, ni estis multegaj en la salo! Iom kiel sardeloj en skatolo. Ndlr.]

Nataŝa kaj **Ĵomart** devas iom pli pene agadi por daŭre teni la atenton de la publiko. La engaĝiĝo kun la soleco, la nostalgio kaj la memoro ilin apartigas el eble pli gajeca aŭskultantaro. Temas pri bone farita muziko, intimaj tekstoj kaj lirikeco, sed riskas eblan dormemon de nepoeziemuloj. Se **Kajto** nin kantigis, **Nataŝa** kaj **Ĵomart** plaŭdigis la publikon por revivligi ekdormiĝantajn sentojn, kaj la rezulto estis sufiĉe bona. Ĉiu-okaze mi multe esperas de tiu ĉi duopo, kiu kun pli da koncertoj certe multe pli aktive komunikiĝos kun la publiko.

Supren teni la flagon de la espo-roko restis tasko por **Persone** sekvita de **Amplifiki**.

Persone respondis al la defio. Sobran, viglan, kaj amuzigan koncerton ili prezentis dancigante la junulan fakon de **KEF-4**. Se mi ne eraras, kelkajn luditajn komponaĵojn ili ankoraŭ ne surbendigis, kaj ĝuado de la novaj kanzonoj aldonis kroman intereson al la rokfesto de **Persone**, kiu enprofundiĝas en iomete pli popan kaj modernan muzikstilon. Al miaj oreloj, kelkaj trajtoj similas al mediteranea roko de grupo kiel **El Ultimo de la Fila** aŭ **Heroes del Silencio**, sed estas klare ke la muzika universo de la sveda ensemblo pli buntas kaj kompleksas. Ĉu nova kasedo aŭ KD baldaŭ? Ni atendas....

La spektaklo de **fraŭlino Emily Barlaston** estis tre ĉarma, humura, kaj kontentiga. Ŝia spektaklo situas inter lirika kantado, kabareto, kaj teatro-skeĉo; ŝi sukcesis kapti la tutan publikon (junan kaj pli aĝan). Nepre spektinda.

Mi ne raportos pri ĉiuj muzikaj aranĝoj, sed mi ne estus justa se mi ne menscius la prezenton de **Jak LE PUIL**. Li plejparte kantas esperantigitajn versiojn de franc-lingvaj komponistoj, sed la kvalito de la interpreto de tiuj "chansonoj" faras el la kantospaco bonegan ŝancon por ĝui vigle espriman voĉon, klaran prononcon, tiklajn tekstojn, kaj interkanzonajn koncizajn klarigojn.

Krom la muzikaĵoj, teatraj prezentoj, kinoprojektado, prelegoj, kabareda vespero, ktp., konsistigis la festivalon - kies bilanco sendube pozitivas – multnombra partopreno, varia kaj enhav-riĉa programo, spektivolema publiko, agrable bufeda etoso..., kaj vasta propagando en la loka gazetaro. Ni ne forgesu la klopodojn kaj laboron de la organiza teamo kiu ankaŭ ebligis malmultekostajn aliĝkotizojn.

Kaj por fini, mi lanĉos kelkajn proponojn (ne estu ĉio laŭdo) por venontaj KEF-oj.

KEF-afiŝoj videblis dise tra Kopenhago, sed neniu malferma programero estis je la dispono de neespistoj kopenhagaj. Tiusence mi konsideras ke estus interese okazigi koncerton kun **Kajto** kaj **Persone** en pli grandaj haloj kaj ke pli ampleksa publiko havus eblon ĉeesti; tiel oni diskonigus espo-kulturon per altira oferto.

Ni spektis muzikan vidbendon de la grupo el kanado **Akvo** [Ni eĉ ne sciis ke ĝi okazis. Ndlr.], ĝi tro solece restis en la ĉambro de la plej modernaj artaĵoj. Ĉu eblus projektado de aliaj muzikaj aŭ interesaj vidbendoj, aŭ espo-komiksa ekspozicio?

Ĝis la alveno de venonta KEF: ĉu Kopenhago-96?

■

K E F - d a ŝ e ĉ e r a



Kultura Esperanto-Festivalo



skandinava frandaĵo



•Raportas Flo

La Kultura Esperanto-Festivalo estas rezulto de ideo de **Per Arne Fritzon** en Stokholmo (Svedio), kiun tuj kaptis liaj stokholmaj samrondanoj de la junulara esperanto-klubo **La Ranetoj**.

La KEF-ideo ellaboriĝis dum komunaj diskutoj en la klubo kaj tre rapide fariĝis la ideo de ĉiuj, kaj tre rapide ili venis al la tute firma opinio ke ĝi estu ekskluzive esperanto-kulturfestivalo kun nur originale kreitaj espo-verkaĵoj, precipe pri parolata kulturo – tio estas, teatro kaj kantata muziko.

Ĉiuj vere entuziasmiĝis pri tiu ideo, kaj ili preparis la unuan KEF-on ekde fine de 1984 ĝis kiam ĝi okazis printempe 1986.

De la komenco kulpis pri la tri unuaj KEF-oj (1986, 1988, kaj 1990) multaj personoj; kaj de tiuj kiuj aktivas ankoraŭ hodiaŭ ni povas listigi sufiĉe grandan kvanton da nomoj, ĉiuj el la espo-rokmuzikistoj stockholmaj: **Bertil Wennergren, Martin Wiese, Micke Englund, Börje Lund**; sed ankaŭ kaj precipe por la organizado estas sufiĉe gravaj nomoj kiaj **Kajsa Larsson, Lena Maansson, Berit Posthuma, Erika** kaj **Joakhim Ielval, Bettan Ahlgren**, kaj multaj aliaj.

Dum la tri unuaj KEF-oj amaso da artistoj estis prezentitaj, inter ili: **Ĝanfranko, Amplifiki, Persone** (kiu fakte formiĝis por ludi en la unua KEF en Uppsala), **Krizalido, TBC, Jerzy Fornal, Nikolin'**, ktp., ktp.

De ĉiam la KEF-organizantoj klopodis havi superrigardon pri la kompleta espo-kultura vivo, almenaŭ en tiu ĉi kampo.

Kompreneble ne eblis venigi ĉiujn artistojn samfoje, sed ili zorge provis kunmeti laŭeble plej bone ekvilibritan programon.

La organizantoj sukcesis aranĝi la tri unuajn festivalojn kun malgranda buĝeto, ĉar sufiĉe multaj esp-artistoj sinofere pretis veni kontraŭ nura vojaĝrepago aŭ tre modesta honorario.

Per Arne konscias ke multaj aŭ preskaŭ ĉiuj el tiuj artistoj meritas multe pli, sed la kondiĉoj de la esperanto-kultura vivo estas bedaŭrinde tiaj ke apenaŭ troviĝas mono laŭ merito.

Tamen la ĉiam pli grandaj kostoj por organizi KEF-on estis unu el la kialoj de la neebleco plu daŭrigi en Svedio.

Per Arne rakontas ke: "En la svedaj KEF-oj ĉiam estis iom pli ol cent partoprenantoj kiuj kuniĝis kun la atento fokusita al kulturaj ĝuado kaj kreado, tio instigis entuziasmon en ili. En tiaj etosoj rapide oni infektiĝas, inter la publiko kaj la artistoj ia radioaktiveco estiĝas, io okazas, tio estas simpla inspiro, oni estas imponita. Kiel espisto foje oni pesimismas, oni iel perdas sian fidon al la afero pri kiu oni okupiĝas, sed tiuj ĉi kulturaj aranĝoj naskas ja en vi novan entuziasmon, kaj la artistoj kaj la publiko kunportas inspiron kaj forton.

Kongresoj kaj renkontiĝoj estas bonegaj aferoj, sed en KEF oni fokusas nian kulturon ĉar ĝi meritas sian propran aranĝon; tio valoras. Oni ne atendu tro sed oni estu atentaj kaj oni sentu la meritan respekton al kio ekzistas, ni atentu tiujn artistojn kiujn ni havas kaj tiun kulturon kiun oni kreas – ĝi estas multe pli bona kaj multe pli riĉa ol ni ofte memoras kaj supozas. Iuj homoj malaperas, novaj homoj alvenas, ne estas kialo malesperi. Ekzistas kerno kiu havas kontinuecon kaj kiu havas altan kvaliton. Ke la novaj artistoj malfermu la kranon, ke ili kreu en esperanto kaj la publiko amos ilin. Se ili donas kion ili havas kaj faras tion sincere ili estos aprezataj. ■









Foto Axel Belinfante

F-ino Emily Barlaston

4-a Kultura Esperanto-Festivalo ...en Kopenhago

4-a KEF

•Raportas Flo

La organizado de la 4-a KEF naskiĝis de la interkonsento kaj kunlaborado de la danoj kaj svedoj. La danaj KEF-organizantoj decidis transpreni la organizadòn antaŭ unu jaro kaj duono.

La organiza teamo estis strukturita kaj efika en sia laboro.

Ok gejunuloj (**Eckhard**, **Helle**, **Jacob**, **Jens**, **Jimmy**, **Kim**, **Line**, kaj **Lisbeth**) estis la ĉefa motoro de tiu KEF kaj zorgis pri ĉiuj taskoj trafe. Ĉiuj havis precizajn taskojn. Ekzemple **Jimmy** pri publikrilatoj kun la dana gazetaro; **Helle** pri petoj pri financaj helpo de fondusoj kaj ŝtatsubvencioj; **Lisbeth** pri aliĝiloj; **Eckhard** pri kompilado de kultur-gvidlibro kaj programo; **Jacob** enkomputiligis cirkulerojn kaj leterojn; **Kim** multege faris sed neniu volis diri kion, eĉ ne li!

Krom tiuj individuaj taskoj, ĉiuj kunligite partoprenis ĉiujn aliajn taskojn, ĉiuj decidoj estis interkonsentitaj kune, kaj ĉiuj sciis pri ĉio rilate la organizadon.

Ankaŭ la elekto de la artistoj estis decidita interkonsente. La varbado por tiu festivalo estis tre efika: gravaj danaj gazetoj parolis pri la aranĝo, kiel ekzemple *Information*, kiu aperigis kvarfoje tutpaĝajn artikolojn pri esperanto kaj KEF.

Ankaŭ radio-stacioj parolis pri KEF, precipe la tutlanda dana radio-stacio kaj 3 diversaj televidkanaloj.

Tio estis unu el la celoj de la KEF-anoj; informi pri esperanto kaj montri ke ĝi vivas kaj posedas kulturon. Dum KEF, pluraj danoj enskribiĝis por lerni espon.

Partoprenis la festivalon preskaŭ 200 personoj, kaj tio montras ke KEF fariĝas pli kaj pli fama pro sia programo, kiu estas pli kaj pli altkvalita kaj ĝia etoso fulme varmega.

Al demando "Ĉu venontjare KEF okazos?", la respondo estis "Certe ne!"

La organizado de tiu festivalo estas tre streĉiga kaj laciga, ĝi postulas multan energion de la tuta teamo. Sed ĉiuj KEF-anoj pretas rekomenci en 1996, ĉar tiam Kopenhago estos la **Kultura Ĉefurbo de Eŭropo**; KEF ne povos maltrafi tiun okazaĵon.

La 5-a KEF en 96 estos nepre partopreninda/enda esperanto-kultura aranĝo – ne penseble ne ferii en tiu nordia ĉefurbo.


Kopenhago abundos je kulturaj vidindaĵoj, des pli ke KEF okazos tie! ■



EN LA PULVOBARELO



Eckhard, Line, Lisbeth, Helle, Jimmy, Jacob, Kim, Jens



NUN VI SCIOS ĈION PRI FRANCA ROKO

(GAZETO POR FRANCLINGVANOJ)

L.O. (Longueur d'Ondes)
Place de Sarcignan
F—33140 PONT DE LA MAYE
Francio

K E F – d ĉ a l a ĝ a ĵ

Ĵomart kaj Nataŝa



Flo: Do, hodiaŭ vi ludis antaŭ sufiĉe multnombra publiko. Ĉu vi povas prezenti vin iomete? Ekzemple, el kiu urbo vi venas, kiajn spertojn vi jam havis antaŭ via fameco en Esperantujo...?

Nataŝa: Unue mi, ĉu? Mi nomiĝas **Nataŝa**, mia familia nomo estas **GERLAĤ** – preskaŭ neniu scias tion. En Esperantujo mi estas jam preskaŭ ses jarojn. Fakte **Ĵomart** estas tiu kiu lernigis al mi esperanton – ni unue komencis kanti duope, kaj poste lernis esperanton. Mi venas de Kazaĥio, el urbo **Ĉimkent** – ne estas ĉefurbo, sed estas suda urbo tre vivoplena, kie multo okazas. Mi estas dudek-kvin-jara....

Flo: Tion mi ne sciis!

Nataŝa: Jes, mi estas juna. *[Ridoj.]* Mi ŝatas danci, kvankam mi ne ofte faras tion, kaj ŝatas kanti por esperantistoj. Ekzemple hodiaŭ, mi simple ĝuis – estis tre bela publiko kiu tre bone akceptis nin. Mi sentis ke ni havis kontakton, estis kvazaŭ interparolo.

Flo: Antaŭ ol kanti en esperanto, ĉu vi faris ion alian? Ĉu vi kantis en bando en via propra lingvo...?

Nataŝa: Jes, mi kantis, kvankam tio estis tute malbona. Eble **Ĵomart** povas diri....

Ĵomart: Estis normale, tute normale. Estis iom ĵazece, iomete eksterordinare, mi kredas. Mi estis gvidisto de rok-ensemblo, ni komencis per rokmuziko, kaj ŝi venis en la ensemblon kiel studentino en pedagogi-altlernejo. Ŝi havis sufiĉe bonan voĉon por tio. Sed poste, kiam ni kune kantis esperanto-kantaĵojn.... Estas interese: multaj venas de simplaj kantaĵoj al roko, sed ni iris male – de rokkantaĵoj ĝis la simplaj kantaĵoj. Eble pro tio ke en rokkantaĵoj ne estas tiom grava la senco de la vortoj – aŭ jes estas grava, sed la pli ĝenerala ĉe la simplaj kantaĵoj, la kantaĵo estas preskaŭ nuda, sen iu ajn aranĝo, kaj ĉiu vorto dependas de la kantisto, ĉiu vorto – kiel oni prononcas, kiel oni elparolas tion. Do, tio tre, tre gravas. Kaj la kantaĵoj ne estas tiom simplaj, kvankam oni nomas ilin tiaj, sed fakte, ili estas tre, tre komplikaj.

Flo: Do, ĉu vi pensas ke nur simpla gitar-akompanado sufiĉas?

Ĵomart: Ne, kompreneble ne. Ekzemple, mi mem ludas kaj basgitaron kaj elektran solgitaron, kaj drumojn, kaj mi povus mem ludi ĉiujn partojn kaj poste kunigi ilin.... Sed mi devas esti pli postulema.... Mi devas simple diri: mi serĉas. Mi serĉas iun formon, kiun ni poste sekvu. Ekzemple, drumon kaj bason mi eble akceptos; sed pri aliaj instrumentoj mi ne povas imagi nun.

Flo: Ĉu io kiu donos pli da ritmo ol nun?

Ĵomart: Jes. Ekzemple, basgitaro aŭ kontraŭbaso, kune kun simpla perkut-instrumento, povus fari interesan ritmo-bildon. Tio eblas, laŭ mi. Sed mi ne volis iri la simplan vojon al pop- aŭ rok-ensemblo – tion mi tute ne ŝatas.

Flo: Tiam vi ne plus estus trobadoroj.

Ĵomart: Ĝuste.

Flo: Ĉi-vespere mi vidis ke vi tamen uzis pliajn instrumentojn. Estis fluto kaj ankaŭ perkut-instrumento. Ĉu tio estas jam unua sperto antaŭ publiko?

Ĵomart: Fakte, tio estis unua sperto antaŭ publiko. Jam de multaj jaroj ni intencis tion fari, kaj **Nataŝa** multfoje provis lerni iun blov-instrumenton, kaj finfine ŝi sukcesis.

Flo: Tio estis sukcesa, laŭ mi.

Ĵomart: Ni nun pensas pri aliaj instrumentoj – eble pri dua gitaro. **Nataŝa** eble prenos alian gitaron. Ni do ne restas senmovaj – ni konstante pensas pri novaj formoj. Sed ni ankaŭ devas ne forgesi ke tio estas nur formo. La enhavo estas pli grava, kaj la formo devas nur reliefigi la tuton, doni pli da pezo al la vortoj.

Flo: Kiel estis lerni la fluton – ĉu malfacile?

Nataŝa: Mi fakte daŭre lernas, ĉar mi eble antaŭ nur iom pli ol du monatoj komencis lerni ludi fluton. Do, estas tre malfacile, fakte.

Ĵomart: Vi komencis ludi antaŭ eble tri jaroj....

Nataŝa: Ne, tio estis simplaj popolaj flutoj, kaj estis iom stultaj por miaj fingroj, mi ne tre kutimis. Tio ĉi estas bekfluto kiun mi nun ludas – ĝi estas tre oportuna, kaj homoj pensas ke mi bone ludas ĝin. Kaj la nomo kaj la aspekto estas belaj, kaj mi estas tia homo kiu ŝatas ĉion belan. Ĝi estas tre agrabla ĉar ĝi havas malgrandajn truojn, kio tre taŭgas por miaj fingroj. Kaj pri tio kion mi ludu – nu, mi simple ĉiam lernu novan kaj novan, ĉar estas neelĉerpita mondo....

Flo: Vi eldonis tri kasedojn. Ĉu vi povas paroli pri la unua, ĉar mi eĉ ne konas ĝin.

Ĵomart: La plej unua kasedo nomiĝas *Debut' eksterlande*. Ĝin aperigis **László SZILVASI** de **Lingvo-Studio** en Hungario. Kaj mi devas diri ke ekde la komenco mi ne estis kontenta pri la kvalito. Sed tamen, tio estas la plej unua

kasedo, kaj mi ne devas honti tion. Mi kantis tiel kaj mi ludis tiel....

Nataŝa: Estas ankaŭ la kondiĉoj sub kiuj ĝi aperis. Ĝi estis surbendigita dum simpla koncerto, kaj oni povas vidi kiel estas.

Jomart: Eble *tiam* ne eblis fari pli bone. En eks-Sovetunio oni devis tre multe pagi por iri al profesia studio. Ekster Sovetunio ni ne havis ion. Nun estas studio en Svedio, vi scias, en Stokholmo.

***Flo:* Aperis en eks-Sovetunio disketo, ĉu ne? Kiel tio sukcesis?**

Jomart: Estas tre interesa afero. Simple, foje mi gastigis esperantiston de Samarkando, s-ron SAĤAROV. Ni babilis nokte, mi rakontis al li miajn revojn, pri kiuj mi eĉ ne kredis, ke iam mi surbendigos kaj havos diskon aŭ kasedon. Mi eĉ surbendigis mem per simpla magnetofono, sed kompreneble tio estis aĉa. Kiam li forveturis, li iris ne al Samarkando, sed al Taŝkento, la uzbekia ĉefurbo, kaj li iris rekte al firmao **Melodija**, rekte al ties ĉefo, kaj demandis ĉu ili povus fari ion por la Internacia Lingvo. Ŝi neniam aŭdis pri esperanto, kaj demandis pri ĝi. Li multe rakontis kaj reklamis. Eble ŝi miskomprenis, mi ne scias, sed ŝi diris ke ŝi ĉion faros por esperanto. Ŝi simple skribis mian nomon sur la liston, do ni faris ĉion senpage, kvazaŭ mi estus de la Ŝtato. Ĉar se iu venis de la Ŝtato, estis senpage.

Flo: *Bona oportuno, ĉu ne?*

Jomart: Jes. Estis tute subite. Kaj li telefonis je la tria matene, kaj kriis ke matene mi devas iri al Taŝkento. Kaj mi iris. *[Ridas.]* Estis fantaste. Mi ludis kelkajn kantaĵojn por la ĉefo de **Melodija**. Ŝi diris: "Elektu kvar, kaj ni faros disketon." Eble post ses-ok monatoj aperis tiu disketo.

Flo: *Sukceso estis tiu disketo, ĉu ne?*

Jomart: Mi kredas ke ĝi estas jam elĉerpita. Mi havas nur unu



ekzempleron, kaj mi ne scias kie trovi aliajn.

Flo: *Vi faris duan kasedon en Stokholmo, eldonitan de esperanto-societo, ĉu ne?*

Jomart: Jes, **Eldona Societo**. Dum la **3-a KEF**, la grupoj **Persone** kaj **Amplifiki** aŭskultis nin kaj proponis registradon. Kompreneble mi jesis, estis por mi kiel fabelo. Post la registrado ili ĉion aranĝis. Nia bona amiko **Franko LUIN** de Stokholmo kontraktis kun mi, kaj la **Eldona Societo** eldonis ĝin. Mi kredas ke ĝi plejparte jam elĉerpiĝis.

Flo: *Kaj la lasta kiun vi faris estas* **Vi kuras de vi**, *eldonita de* **Edistudio**. *Ĉu la kondiĉoj estis tiaj kiaj por* **Folioj de mia memoro**?

Jomart: Fakte, mi devas esti dankema ankaŭ al s-ro **CASSINI**, ĉar ĉio estis bone farita. Nur unu kritikon mi havas por li, ĉar li ne faris reklamojn – tio estas tre grava afero. Tamen, ni havas la trian kasedon – tio estas la rezulto, kiu estas bona.

Flo: *Ĉu baldaŭ* **kvara** *kasedo?*

Jomart: Jes. Hodiaŭ vi aŭdis novajn kantaĵojn – ni havas preskaŭ pretan materialon por la kvara kasedo. Septembre mi mendis tempon ĉe **Pigo-Studio** en Stokholmo, kaj ni registros kelkajn novajn kantaĵojn, por komenci la kvaran kasedon. Ne komplete, ĉar ni intencas aldoni novajn kantaĵojn. Sed ni devos atendi, ĉar la tria kasedo ĵus aperis.

Flo: *Vi jam faris vivajn koncertojn. Ĉu vi ŝatas tion, kaj ĉu vi emas fari plu?*

Jomart: Jes, koncertoj estas nia plej ĉefa celo, la plej grava afero por ni. Sed la vivo estas tia ke ni ne povas mem decidi kien kaj kiam iri. Dependas de la mono, de multaj kondiĉoj. Pro tio, ni devas fari registradon kaj eldoni kasedojn. Eble ni faros la kvaran kasedon kiel vivantan koncerton – estus pli bone. Sed kiam mankas aŭskultantoj, mankas ankaŭ la etoso.

Flo: *Ĉiukaze, se estas interesitoj pretaj organizi koncerton ie ajn, se la monkondiĉoj taŭgas, tiam vi pretas, ĉu ne?*


Jomart: Jes, kompreneble. Mi nur jesas. Estas tre agrable por ni fari koncerton ie ajn. Kiam ni eldonas kasedon, ni ne havas tiom fortan reeĥon; sed post koncerto, ni havas multegajn, *multegajn* reeĥojn. Homoj venas kaj diras multajn afablajn vortojn aŭ kritikojn, ili diras ke hodiaŭ estis pli bone aŭ malpli bone ol antaŭe – kaj tio instigas nin por daŭrigi la laboron. Dum koncertoj, ni fordonas multe da energio kaj emocio. Sed post la koncertoj, ni ricevas multoble pli. Kaj tio poste instigas nin fari novajn kantaĵojn. Tio estas la ĉefaĵo.

Nataŝa: Kaj post la koncerto, ekzemple nun, kvankam mi ne drinkis, mi sentas min preskaŭ ebria. Laca, sed iel *feliĉe* laca. Estas tre bela sento. ■



• homo • kulturo • universo
• leteroj • diskutoj • dialogoj
• dumonata • kulturo • revuo
urvoje
Ukr-335057 Ukrainio
Sebastopolo-57, pk 168

La plej ofta...
Eventoj
Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!
Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...
Petu senpagan provekzempleron:
EVENTOJ, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario

Ĵak LE PUIL







Flo: Kiel vi atingis vian famecon en la movado?

Ĵak LE PUIL: Pli-malpli paralele pro miaj kanzonoj kaj pro kunlaborado en la *Kancerkliniko*, tiu politika, kultura, skandalema, kaj kotopoa gazeto.

Flo: Pri kantoj – kiam vi komencis tiun aferon?

Ĵak: Tio dependas, ĉu en la franca, ĉu en esperanto. En la franca mi komencis antaŭ pli ol tridek jaroj. Kaj en esperanto mi komencis pli-malpli en 1974, se mi ne eraras. Mi registris mian unuan kasedon en 76, en Romo, por **Edistudio**. La duan en Parizo, daŭre por **Edistudio**, en eble 78, mi ne certas. La trian, daŭre por **Edistudio** kaj daŭre en Parizo, en pli-malpli 85, ŝajnas....


Flo: Vi diras "unuan", "duan", "trian", sed mi ŝatus havi ankaŭ titolojn.

Ĵak: Do, la unua temas pri *Danĝera ul'*, kie estis preskaŭ nur protest-kanzonoj, ĉiuj tradukitaj el la franca, krom du el la usona. La dua estis *Revenas mi*, kaj jam en tiu, duono estis originalaj kanzonoj, kaj la alia duono estis tradukitaj kanzonoj, plejparte de **Jopetro DANVY**, kaj mi mem komponis la muzikon. La tria kasedo estis *De Pont-Aven al Varsovi'*, denove duone originale, duone traduke. Kaj la kvaran kasedon *Ne donu tro* neniu konas, kvankam mi ĝin registris antaŭ unu jaro en Pollando. Mi estas la eldonisto, sed mi ricevis ilin antaŭ nur du monatoj, kaj daŭre mankas kaj la kovriloj kaj la libretoj, do ĝi ne estas aĉetebla. *Ne donu tro* estas same duone originala, eble iom pli, ĉar interalie estas dek-minuta kanzono kies tekston kaj muzikon mi verkis.

Flo: Kiam ĝi aperos en la esperanta merkato?

Ĵak: Tre baldaŭ, mi esperas. Tamen, ĝi





estas ĉi tie, en la libroservo de KEF. La respondeculo aldonis paperon ke mi sendos perpoŝte kaj la kovrilon kaj la libreton. Mi ricevis telefonalvokon el Pollando, kaj laŭdire mi devas tre baldaŭ ricevi la kovrilon kaj iom poste la libreton. *[Ridas.]*

Flo: Mi vidas ke tio estas la sama problemo, eĉ por la ***Kancerkliniko****.*

Ĵak: Estas kelkaj problemoj, sed mi esperas ke tio ne daŭros.

Flo: Sceneje, kion vi faris?

Ĵak: Kion mi faris? Do, mi komencu per la Universalaj Kongresoj – kompreneble, la plej prestiĝaj. Mi kantis en Antverpeno, en Varna, en Varsovio, en Vieno. Mi kantis en pluraj Internaciaj Junularaj Kongresoj: en Poiters, kie mi debutis en 1977, se mi ne eraras....

Flo: Kial vi fakte elektis kanti en esperanto? Ĉu vi ne havis sufiĉe da publiko en la franca? [Ridas.]

Ĵak: Ne, tute ne. Ne estas hazardo, ĉar mi lernis esperanton antaŭ tridek kvin jaroj, kaj mi mem tradukis "La dizertanton" de **Boris VIAN**. Sed mi neniam publike ĝin kantis, dum jaroj mi apenaŭ frekventis la movadon. Kaj hazarde mi konatiĝis kun **Georgo LAGRANGE** kaj montris mian tradukon. Li hurlis, kaj diris ke estas komplete fuŝa traduko – eble ne komplete, sed preskaŭ komplete fuŝa. La postan tagon li alportis al mi perfektan tradukon. Kaj de tiu tempo, fulmrapide li tradukis tutan kasedon. En kelkaj monatoj mi povis registri kasedon. Poste mi tamen spertis pri kaj tradukado kaj memverkado. Mi tamen ŝatas kiam homoj tradukas aŭ verkas originale por mi, kiel **Jopetro DANVY**.

Flo: Delonge ni ne aŭdis vin sursceneje, aŭ eĉ kasede. Kial tiom da tempo sen io?

Ĵak: Pri kasedo, nur hazardo, kaj mono, certe. **Edistudio** ne plu parolis pri nova kasedo, kaj mi ne havis sufiĉe da mono por mem registri. Do nun farite. Sur scenejo mi tamen kantis,

eble iom malpli ol antaŭe. Eble ĉar nun mi ne plu loĝas en Parizo, kaj oni eble iomete forgesis min en mia provinco. Mi devas tamen konfesi ke mi rifuzis multajn invitojn, ekzemple de **KEF**. Jam tri fojojn oni invitis min, kaj mi rifuzis la du unuajn.

Flo: Kial rifuzo?

Ĵak: Se mi ne eraras, mi rifuzis la unuan fojon ĉar samtempe okazis franca kongreso, kaj en tiu epoko mi estis membro de la Komitato kaj emis iri al tiu kongreso. Ne plu nun. Kaj la duan fojon mi absolute malkuraĝis iri al Svedio trajne, kun ĉiuj problemoj, porti la gitaron kaj valizojn, kaj tial plu – eble ĉar mi ne plu estas dudek-jara. Do ĉi tie mi finfine akceptis – kaj venis aviadile! *[Ridas.]*

Flo: Krom kanti, vi redaktas faman gazeton kiu havas ioman sperton. Ĉu vi povas paroli pri tiuj spertoj por tiuj kiuj ne konas la gazeton?

Ĵak: Do, la *Kancerkliniko* naskiĝis en 1976, antaŭ jus dek sep jaroj. Mi ĉefe ĝojas pri tiu pluvivado, ĉar estas preskaŭ unika afero en Esperantio – tio estas ke ***pluvivas*** komplete ***libera*** gazeto, kiu ne timas paroli pri iu ajn temo, ĉu politika, ĉu kultura, ĉu ***ajnista***. Kaj la plej granda ĝojo por mi estas la amaso da kunlaborantoj, kaj daŭre kaj daŭre gejunuloj kiuj aperas sur la literatura kampo, sendas poemon aŭ iun ajn verkaĵon spontane al la *Kancerkliniko*. Ĉar neniam de dek sep jaroj ni petis de iu homo verki por la *Kancerkliniko*. Do mi ege ĝojas kiam homoj kiel **Georgo KAMAĈO, István ERTL, Klaus GUNKEL, Ionel OONET**, kaj tiel plu, de ĉiuj partoj de la mondo, sendas ion al la *Kancerkliniko*. Kaj mi konfesas ke mi iomete fieras pri tio! *[Kun sinmoka rido.]*

Flo: Ĉu tio estas paralela vojo de via artista flanko?

Ĵak: Jes, certe komplete miksite. Mi havus malfacilaĵon vivi sen kanzonoj kaj sen la *Kancerkliniko*, certe.

*Flo: Estontaj planoj pri kanzonoj kaj pri **Kancerkliniko**?*

Ĵak: Mi opinias ke mi ***neniam*** havis planon en mia vivo – mi neniam havis buĝeton en mia hejmo, kaj certe neniam havis planon. Nuntempe mi povas diri ke krome mi tradukas. Mi jam kuntradukis kun mia edzino **Armela** la unuan libron de la **markizo de Sade** en esperanton, kiu aperis antaŭ nur unu jaro, kvankam ni fintradukis ĝin anta ŭ***dek*** jaroj – sed ***neniu*** en Esperantio kuraĝis eldoni verkaron de la **markizo de SADE**, kompreneble! Kaj estas sufiĉe amuze vidi la reagon de pluraj recenzistoj. Eble vi ilin legos ie. Nuntempe ni estas fintradukantaj dikegan romanon, 350-paĝan, de famkonata franca aŭtoro – mi ne volas diri la nomon ĝis ĝi aperos, sed estas la plej vendata aŭtoro en Francio, kaj la recenzistoj havos denove okazon por grumbli – ĉar ĉi tie tute ne temas pri **Sade**-aĵoj, sed pri multaj fikaĵoj. *[Ridas.]*



Flo: Vi jam salivumas pensante pri tio, ĉu?

Ĵak: Jes. Kaj estas tre valora libro. Mi povas diri eĉ ke aperis filmo el tiu libro, kaj la aŭtoro de la filmo parolis pri "nova **VOLTAIRE**", parolante pri tiu verkisto, kaj mi tute konsentas kun li.

Flo: Sur la muzika kampo, ĉu vi jam havas ideon pri la estonto?

Ĵak: Mi jam havas materialon por kvina kasedo, sen problemo – mi preskaŭ jam havas materialon por sesa. Eble venontjare mi reiros al Pollando por registri la kvinan kasedon – tio dependas ĉefe de la vendo de la kvara.

Flo: Vi kunlaboris ankaŭ pri la nova franca-esperanta vortaro. Ĉu vi povas rakonti anekdotojn pri tio?

Ĵak: La unua anekdoto estas ke mi komplete forgesis ke mi prizorgis tiun vortaron, eble ĉar estis dekjara laboro, kaj estis tamen iom tro por mi – se **Jopetro DANVY** kaj mi estus antaŭvidintaj tion, ***neniam*** ni kuraĝus komenci.

Flo: Sed iu devis tion fari, ĉu ne?

Ĵak: Jam de pli ol kvindek jaroj francoj absolute nenion faris sur tiu kampo – pri granda vortaro, mi ne parolas pri malgrandaj kiel tiu de **LÉGER** kaj **ALBAULT**, tio estas alia afero. Komence, **Jopetro DANVY** kaj mi decidis labori pri tiu vortaro, ĉar li estis tradukanta **Victor HUGO** kaj ni estis tradukantaj **Sade**, kaj en tiu epoko, hazarde, spontane ĉe la telefono, ni diris: "Ha, ni havas la saman ideon, do ek al la laboro!" Sed, tamen saĝe, ni parolis pri tio al deko da homoj, kaj fulmrapide, post kelkaj monatoj, dek homoj absolute konsentis kunlaboro – la vortaro havos proksimume mil paĝojn, do po cent.... Sed bedaŭrinde, post du monatoj restis nur **Jopetro** kaj mi! *[Ridas.]* El tiuj dek homoj, nur unu, **Lília Ledon da SILVA**, kiu loĝas en São Paulo, faris sian laboron. Nu, **Armela** faris la duonon de sia laboro. Sed la aliaj entute malaperis, kaj do dum pluraj jaroj restis nur **Jopetro** kaj mi. Feliĉe, post ĉirkaŭ kvin jaroj ni trovis grandan helpon ĉe s-ro **Cau** kaj s-ro **Beau** – ĉefe **Cau**, poste **Beau**, kaj ankaŭ **André Giles**, kiu iomete helpis nin. Dank' al tiuj homoj ni tamen ne bezonis dek kvin jarojn, nur dek. Historiistoj certe amuziĝos kiam ili konsultos la manuskripton, ĉar ni kompreneble ne havis metodon por labori. Unue iu tradukis kaj sendis al dua persono, kiu mem sendis al tria, kiu poste sendis al kvara, kiam estis kvar personoj. Kaj estis multaj komentoj. Ni ĉiam laboris en bonhumuro, neniam dokte aŭ kabinete kiel Akademianoj.

Flo: Kaj anekdotojn el via artista vivo...?

Ĵak: La plej freŝa kaj amuza estas pasintjare en **Vieno**, dum la Universala Kongreso. Mi devis kanti unu kanzonon por la lasta tago. Mi lokis mian gitaron en la kulisojn, kaj kiam mi devis kanti, mi demandis al la respondeculo kiel reiri al la kulisoj, kaj li diris: "Eliru kaj uzu la unuan pordon maldekstren." Do, mi eliris, uzis la unuan pordon maldekstren, vidis nur ŝtuparon kiu supren- kaj malsupreniras, kaj la pordo subite fermiĝis entute. Mi provis reeliri, kaj absolute ne eblis. Mi konsciis ke estas la pordo kontraŭ fajro, tutsimple. Mi devis malsupreniri ses etaĝojn, aŭ eble ok, mi retrovis min preskaŭ ĉe la enirejo de tiu kongresejo kiu estis grandega, kaj mi devis resupreniri fulmrapide. Kaj mi timegis – mi vidis min tie dum unu semajno! Mi alvenis sur la scenejon tuj post **fraŭlino Barlaston**, imagu! Estis freneza afero, kaj mi preskaŭ forgesis mian tekston – mi estis en angoro. Sed almenaŭ tio multe ridigis la homojn poste kiam mi rakontis ĝin. ■

LA KANCERKLINIKO

Politika

Kultura

Skandalema

Ajnista

"La mondo ŝanceliĝas
Nia Kliniko plu staras"

5 n-roj jare – 125 FRF
(specimeno kontraŭ 3 IRKP)

Direktoro/Redaktoro: **Ĵak LE PUIL**
Les Cocherats
F-18210 THAUMIERS
Francio
(pĉk Paris 12.729.73 X
UEA-konto klik-g)

Micke Englund

***Flo:** Micke, ĉiuj jam konas vin. Ĝis nun vi faris kvar kasedojn* – kiam aperos la kvina?

Micke: Fakte, ĝuste hodiaŭ ni priparolis tion en la grupo, kaj... post ne tro longa tempo. Fakte, ĉi tio estas sekreto nun, sed kiam la gazeto aperos, ne plu estos sekreto. Ni planas fari antologion: *83-93 Amplifiki*, sed ankaŭ kun du aŭ tri novaj kantaĵoj. Ĝi aperos baldaŭ en tiu kazo, ĉar oni ne devos tiom multe prilabori ĝin. Verŝajne por novjaro. Sed pri ***nova*** kasedo, do verŝajne somere eble venos io, ne pli frue.

***Flo:** Daŭre produktita ĉe **Edistudio**?*

Micke: Mi ne scias. Mi ne parolis kun li dum lastaj unu jaro kaj duono. Bedaŭrinde, li estas neatingebla persono. Sed eble.

***Flo:** Kion celos tiu kasedo?*

Micke: Ho, estos kantaĵoj pri amo, tutcerte. Mi ankoraŭ ne scias.

***Flo:** Kaj muzike?*

Micke: Mi pensas ke estos ŝanĝo de la lasta kasedo. Mi pensas ke estos sufiĉe granda ŝanĝo – eĉ pli instrumenta muziko ol lastfoje.

***Flo:** Ĉu elektra?*

Micke: Certe jes.

***Flo:** Kun ankaŭ iom pli da akustiko?*

Micke: Ne, mi pensas ke ne. Tutcerte ne.

***Flo:** Kaj ĉu la grupo samas?*

Micke: Ne, nia basisto forlasis la grupon antaŭ unu jaro kaj duono, kaj dum koncertoj lastjare ni ĉiam havis gastojn. Estas libera loko, sed tio estas facile solvebla problemo por surbendigado.





***Flo:** Sed por koncertoj...?*

Micke: Nu, ni ĉiam trovas iun. Ĝis nun ĉiam funkciis kun aliaj. Hodiaŭ ni pruntis **Anders** el **Persone**.

***Flo:** Ĉu vi ludos ĉi-vespere?*

Micke: Verŝajne jes.

***Flo:** Post **Persone**, verŝajne, aŭ ĉu antaŭe?*

Micke: Post ***Persone***, jes.

***Flo:** Kaj la koro* – kion ĝi faras? *[Ridas.]*

Micke: *[Ridas.]* Eble ĝi estas momente en alia loko.

***Flo:** Klarigu pli bone la ideon.*

Micke: Nu, eble mi ne estas maksimume koncentriĝinta pri la koncerto de hodiaŭ. Mi esperantumis dum pluraj semajnoj, kaj mi estas iomete laca. Kaj mi antaŭvidas iri hejmen morgaŭ. Kaj mi eble ne plene koncentriĝis je la koncerto ĝis nun. Eble dum dek minutoj antaŭ ĝi komenciĝos... eble... espereble.

Poste mi havas alian projekton. Ĉi-somere mi plene enamiĝis en knabino, kaj mi ŝatus fari propran kasedon, en mia nomo, kaj kun kantaĵoj kiuj temas nur pri mia amo al ŝi.

***Flo:** Ĉu vi jam provis ludi en neesperanta grupo?*

Micke: Kompreneble, kompreneble. Mi komencis jam dek jarojn antaŭ **Amplifiki** ludi en sveda grupo. Mi ludis en eble kvar aliaj grupoj, sed ĉiam dum sufiĉe longa tempo, dum du jaroj aŭ simile. Mi devas diri ke mi ne scias kio estas pli fruktodona, ludi esperantan muzikon aŭ neesperantan muzikon en Svedio. Certe oni povas ludi multe-multe pli se oni ludas angla- aŭ sved-tekstan muzikon en Stokholmo.

***Flo:** Sed ĉu vi pensas ke tiukaze vi produktintus kvar kasedojn?*

Micke: Kiu scias?&Kiu scias? Sendube, la muziko ne estus tiom mond-disvastiĝita, tio estas centprocente certa afero. Sed mi ĝuis ankaŭ tiun tempon.

***Flo:** Ĉu vi ne kontentas pro la mond-disvastiĝo? Ĉu vi tamen ne fieras?*

Intervjuo ĉe la 4-a KEF



Foto Axel Belinfante

Micke: Certe, certe jes. La plej granda fiero estas kiam iu venas al mi spontanee kaj diras: "Ho, de via lasta kasedo estas iu kantajo kiun mi ŝategas!" Kiam mi rimarkas ke homoj ne nur aĉetas kaj aŭskultas la kasedojn ĉar estas esperanto, sed ja aŭskultas ĉar ili ŝatas la muzikon, tio estas plej granda plezuro kaj kontentiĝo.

***Flo:** Vi tamen bezonas tion por pli bone labori?*

Micke: Sendube jes. Mi estas tia ke se mi rimarkas ke homoj ŝatas tion kion mi faras, tio estas plej granda instigo. Se male, estas plej granda *mal*-instigo.

***Flo:** Ŝajnas ke vi havas unu "difekton" –* vian tro grandan postulemon en via muziko....

Micke: Nu, mi ne scias. Mi ĉiam volas fari plej bone. Kaj mi diras honeste ke kelkaj kantajoj de la tri unuaj kasedoj, se oni prilaborus ilin unu aŭ du horojn, estus dekoble pli bonaj. Sed ni simple ne havis tempon por refari ion kiu povus esti multe-multe pli bona, kaj tio ĝenas min – kaj verŝajne ĝenos min dum mia tuta vivo. Kial ne doni ankoraŭ unu horon por korekti ion kiu ne estas bona? Do, se mi faras ion, mi volas ke ĝi estu almenaŭ taŭga, ke ĝi estu laŭ la originala ideo. Mi ne volas ke ĝi estu *sufiĉe bona*, ĝi devas esti ***bona***. Se estas *tre bona*, tio estas eĉ pli bone. Sed almenaŭ *bona*.

Aliflanke, la unuan kasedon ni faris dum tre mallonga tempo, kaj preskaŭ ĉio estis farita je la unua klopodo. Sed tiam estis tre bona etoso en la studio....

***Flo:** Pri koncert-planoj...? Ĉu vi ne emas?*

Micke: Emas, sed estas ĉiam, ĉiam diversaj problemoj. ■

PERSONE

4-a KEF

***Flo:** Bertilo WENNERGREN, Martin WIESE, kaj Anders GORP – ĉu vi povas prezenti vin unu post la alia?*

Bertilo: Do, mi estas **Bertilo**, la drumisto de la bando, ankaŭ kantas harmonian kantadon, kaj ankaŭ iomete kunverkas la muzikon.

Martin: Kaj mi estas **Martin**, gitaristo, ĉefkantisto, kaj ankaŭ ĉefkomponisto kaj verkisto de niaj kantajoj.

Anders: Mi estas **Anders**. Mi nur basgitaras, sed iomete kunkantas.

***Flo:** Kiu estas la plej malnova en la grupo?*

Bertilo: Mi kaj **Martin** estas jam dekomence en la grupo, sed la stariginto de la grupo, **Börje LUND**, ne plu estas.

***Flo:** Kial kreiĝis Persone? Börje havis ideon, ĉu ne?*

Bertilo: Jes. Mi kredas ke li havis stoketon da kantajoj, kaj antaŭ la unua **KEF** li havis la ideon formi rokbandon kiu povos prezenti sin en la unua **KEF**. La ideo dekomence estis fari nur unufoje, sed poste ni pensis ke estis tiel bone, estis tiel bona etoso kiam ni ludis, ni amuziĝis tiel, ke ni decidis plu ludi. En tiu jaro ni havis ankaŭ multe da eblecoj ludi en aliaj lokoj.

***Flo:** Sed estis ankaŭ la eksperimento en **Amplifiki**, ĉu ne?*

Bertilo: **Amplifiki** ekzistis jam antaŭe, do iel pruvis ke tio eblas. Kaj mi kaj **Martin** tiam estis en **Amplifiki**. Sed **Persone** kreiĝis tute aparte de **Amplifiki** – ne estis tiel ke ni iel burĝoniĝis el **Amplifiki**. Tio estis ideo de **Börje**, kaj nur hazarde ni jam tiam ludis esperanto-rokmuzikon en **Amplifiki**.

***Flo:** Ĉu vi havas ankoraŭ novajojn de Börje?*

Martin: Lastfoje kiam mi parolis kun li, li diris ke li fakte reprenis la gitaron el la kelo aŭ la subtegmento... *[Ridoj.]*... kaj denove diris: "Damne, estas tamen amuze ludi!" Mi ne scias.... Liaj planoj ne estas tiel progresintaj, sed mi tre ĝojus se li emus iam denove aperi surscenejе aŭ surkasede kun siaj kantajoj.

Bertilo: Mi instigis lin fari tion kaj proponis ian kunlaboron ĉe lia projekto. Ĉion mi subtenus. Ni vidos.

***Flo:** Kion vi celas tra viaj muziko kaj tekstoj?*

Bertilo: Ĉu vi havas celon, Martin? *[Ridoj.]*

Martin: Celon...? Mi pensas ke **Jomart** hieraŭ tre bone diris – mi pensas ke li povus paroli ankaŭ por mi kiam li diris ke liaj kantajoj estas iom tristaj, sed la vivo ne ĉiam estas gaja. Mi volas plejofte simple pentri iun bildon de etoso. La tekstoj ĉefe temas pri ĉiutagaj cerbumajoj, kelkfoje ankaŭ iomete pri politiko. Estas bedaŭrinde ofte malfacile skribi pri politiko.

***Flo:** Kial en esperanto? Vi verŝajne ofte ludas en neesperanto-grupoj...?*

Bertilo: Mi ne!

Anders: Mi ne!

Martin: Mi jes!

Anders: Nun mi ne. Mi studis du jarojn en alia urbo en Svedio, kaj nun mi revenis. Eble mi ludos kun alia grupo, sed nun ne.

Martin: Mi havas ankaŭ svedlingvan bandon. Estas ankaŭ muzikaj diferencoj. Kiel diri...?

Iu: Grandaj diferencoj....

Martin: Jes, estas grandaj diferencoj. Estas alia muzik-stilo. Ankaŭ ĉar ni estas triopo, tio kreas apartan sonbildon. Mia svedlingva grupo estas kvaropo....

***Flo:** Ĉu vi kantas en ĝi?*

Martin: Jes, kaj ludas akustikajn instrumentojn, gitaron kaj mandolinon.

***Flo:** **Bertilo**, kial nur en Persone? Ĉu vi ne trovas alian bandon pro manko de tempo aŭ io tia, aŭ manko de sperto...?*

Bertilo: Mi neniam serĉis alian bandon. Fakte estas iom manko de tempo.

Anders: Ni ja ambaŭ diskutis formi ian hobi-bandon por ludi ŝatatajn kantajojn de la bandoj de la sepdekaj jaroj en Svedio, la progresema muzikmovado en la sepdekaj jaroj. Sed mi ne scias....

Bertilo: Nun mi povas dubi ĉar ni ĉiuj estas studantoj kaj tre okupitaj.

***Flo:** Kiel nomiĝas la bando en kiu vi ludas, Martin?*

Martin: Same kiel mi, kun "band" poste: ***Martin Wiese Band***.

***Flo:** Do, vi havas scenejan sperton ankaŭ en la sveda lingvo, ĉu ne? Ĉu vi povas klarigi kia diferenco estas inter neesperanta kaj esperanta publikoj?*

Martin: Mi pensas ke la diferenco estas ke en esperanto la tekstoj ĉiam pli gravas ol en aliaj lingvoj, ĉar esperanto

temas pri la lingvo mem, kaj la homoj pli aŭskultas kaj analizas la tekstojn. Sed iomete ankaŭ havas la saman efikon kantante en la sveda por svedoj – kompare se oni kantas en la angla por svedoj, ekzemple: tiam la tekstoj tute ne gravas. Mi pensas ke la esperanta publiko estas ĉiam pli veka, pli interesita, ĝenerale.

Flo: Kaj la etosoj?

Martin: Plejofte estas bonega etoso....

Bertilo: Tio, laŭ mi, estas la granda diferenco. Antaŭe mi ludis multe en aliaj bandoj, sed tamen ludante basgitaron. Ludante antaŭ ni diru, normala publiko, ili simple postulas ke vi estu bona. Se vi ne estas bona, ili foriras. Sed esperantistoj venas ĉar ili ŝatas esperanton, kaj estas esperanta rokbando, io unika – ili ĉiam iel ŝatas la aferon, pro ideologiaj motivoj, do ili estas ĉiam tre bonvola publiko, aŭ preskaŭ ĉiam.

Flo: Eble iom tro, ĉu?

Bertilo: Jes, iom tro.

Martin: Ili estas ankaŭ ofte festemaj kiam ili venas al renkontiĝo. La sama etoso povas esti ankaŭ en bonaj festoj en Svedio, kiam mi ludas kun la svedlingva bando – sed tio estas esceptokaze. Ludante en iu trinkejo ni tute ne povas krei tian etoson.

Flo: Vi produktis unuan kasedon antaŭ mi ne scias kiom da jaroj...?

Martin: Antaŭ sep jaroj...? Estis 86 aŭ 87....

Bertilo: Estis en 87. Estis... – ha, mi ne povas kalkuli.... *[Ridas.]*

Flo: Ne gravas. Dua kasedo aperis antaŭ du jaroj. Kaj tria kasedo?

Bertilo: Nu, ni esperas ke ĝi povos eble aperi venontjare, ĉu?

Martin: Jes. Ni havas sufiĉe da kantaĵoj, sed sufiĉe da tempo kaj mono ni ne havas, bedaŭrinde. Almenaŭ ĝis nun.

Flo: Ĝis nun vi mem produktis viajn kasedojn. Ĉu estos same estonte?

Bertilo: Jes, fakte. Ne ekzistas findinda produktisto en la esperanto-movado....



Martin kaj Anders

Flo: Tiel vi estas pli sendependaj kaj malpli ligitaj....

Bertilo: Jes, kompreneble.

*Flo: Kie vi koncertis ĝis nun, krom en **KEF**?*

Bertilo: **KEF** kreis **Persone**, do ni fakte ludis en ĉiuj KEF-oj. La grava afero estas ke per esperanto ni sukcesis ludi en multaj landoj. Ludante en la sveda aŭ en iu ajn alia lingvo, ni ludus nur en Stokholmo. Ne estas io speciala por diri: ni ludis antaŭ publiko en diversaj lokoj....

Flo: En kiuj gravaj aranĝoj?

Bertilo: En IJK plurfoje....

Martin: En IS....

Bertilo: En IS plurfoje. En kelkaj UK – en du: en Varsovio kaj en Bergeno. Sed UK ne estas loko por ni – estas tro malmultaj gejunuloj por ni. Estas fakte iom stulte.

Martin: Kaj ankaŭ unu fojon en la **Kultura Festivalo** en Parizo.

Bertilo: Kaj kompreneble en la **Urbo-Seminario** en Berlino, eĉ dufoje. Sed estas ankaŭ apartaj koncertoj aranĝitaj, ekzemple en Katalunio ni ludis – estis iom strange, sed.... *[Ridoj.]*

Flo: Ĉu vi havas sufiĉe da libera tempo por ludi pli ofte ol tio – ekzemple se ekstariĝus turneo, ĉu tiam eblus al vi fari ion pli longan?

Martin: Estas malfacila demando, ĉar nun ni ĉiuj fakte plustudos, kaj havos tre malmulte da tempo, verŝajne....

Bertilo: Krom somere. Somere ni havos multajn eblecojn fari turneojn, se iu simple donos la eblecon.

Martin: Ekzistas ankaŭ ferioj dum pasko, kristnasko, ktp., kaj eble ni povos liberiĝi dum semajno, se estos bona ebleco. Almenaŭ ni nun havos pli da tempo provludi kiam Anders denove estos en Stokholmo. Tio estis la problemo dum la pasintaj du jaroj, ke ofte por fari koncerton ni devis aranĝiĝi sufiĉe longe antaŭe por povi provludi. Ekzemple, en Berlino ni povis provludi nur jam tie. Sed nun tio ebligas al ni pli rapide simple foriri kaj ludi, se ni kontinue povas provludi.

*Flo: Vi havas eblecon labori en **Pigo-Studio** en Stokholmo, ĉu ne?*

Martin: ...**"Pigro-Studio"**.... *[Ridas.]* Jes, jes. Mi jus aŭdis ke ĝi ankoraŭ havas estontecon, post iom da krizo. Jes, estus bonege registri nian muzikon tie, ĉar ni povus tute trankvile labori. Estas tute bonega studio, cetere. Mi volas instigi al aliaj esperanto-muzikistoj veni tien por registri sian muzikon. Ankoraŭ malmultaj prezentis sin. Tio estas tute elstara ebleco kiun oni eluzu.

Flo: Verŝajne la nova kasedo estos surbendigita tie, ĉu ne?

Martin: Kompreneble. Tio estas senkosta por esperantistoj – kial ni pagu monon aliloke?

Flo: Sed ankaŭ la kvalito estas....

Martin: Tute elstara, jes. Fakte, ni jam registris nian lastan kasedon en la sama studio, sed tiam ĝi ankoraŭ ne estis la **Pigo-Studio**. Kaj post tio, multaj aparatoj ŝanĝiĝis, multaj aferoj estis plibonigitaj. Jam tiam ni estis sufiĉe kontentaj, do nur povas esti multe pli bone nun.

Flo: Krom tiu kasedo, kiu verŝajne aperos post unu jaro, kiujn aliajn planojn?

Martin: Etan turneon en Berlino estas planita. Ne estas decidite ekzakte kiam. Ĝi estos por ne-esperantistoj, en ordinaraj kluboj en Berlino....

Bertilo: Alia ebleco, kiun vi eble eĉ ankoraŭ ne scias, estas ke ni kontaktis la organizantojn de la venonta UK, kiu okazos en Seulo en Koreio. *[Aprezaj murmuroj.]* Se la sorto bone ridetos al ni, tio efektiviĝos, kaj tio estos bonega. Estos la unua fojo fore ekster Eŭropo, tio estos mirinda. Do, eble venontjare en Koreio. ■

Bertilo



Foto Axel Belinfante

Ne atendita Amplifiki-a koncerto

...ĉu ne?

•Raportas Flo

Amplifiki perdis Bobbi-n, sian basgitariston, kaj denove Micke penadas por trovi taŭgan anstataŭanton.

Tamen Juhani ĉe klavaroj kaj kanto fidelas; tre ĉarma tiu knabo kiu post kvarmonata lernado de esperanto komponis kaj kantis en Amplifiki!

Per Olle daŭre drumas en la bando ĉiam tiel efike, ekde la 3-a kasedo, *Festoj de Kristnask'*.

Por tiu surpriza koncerto en KEF-4, Anders GORP, basgitaristo de Persone, anstataŭis Bobbi-n.

Kvankam la publiko malmultis post la koncerto de Persone (kiu estis elĉerpiga), Amplifiki faris interesan koncerton. Estas ĉiam kortuŝe vidi la fingrojn de Micke danci sur la gitarkordoj, karesante ilin kvazaŭ knabinon. Micke ludas kun siaj sentoj lasante emociajn rokblusajn notojn en niaj koroj.

Sed ĉi-foje ne nur li ensorĉis nin; Amplifiki havas nun ion pli kiu kaptas vin, tio estas la varma voĉo kaj klavarludo de Juhani.



Juhani

Ni sentas ke Amplifiki akiris kvalitan nivelon kaj ke la artistoj Micke kaj Juhani alportas viglan vivanimon al la grupo. Tion tre forte ni sentas en la lasta albumo *Ĉu ne?* pri kiu oni ne multe aŭdas, kaj eĉ ni mem, en *Rok-gazet'* ne sufiĉe parolis pri ĝi. Tamen *Ĉu ne?* certe estas la pinto de la produktaĵoj de Amplifiki, la plej ellaborita kaj profesia, sed ne nur tio; la enhavo ĉarmegus la plej drastajn malamantojn de Amplifiki kaj reamikigus ilin kun la grupo.



En tiu albumo tre bona ekvilibro estis trovita inter rokaj, instrumentaj, kaj popaj muzikpecoj; la rezulto estas bonega, sen enkalkuli ĉiujn malfacilaĵojn kiujn renkontis Micke por surpiedigi kaj funkciigi la studion (Pigo-studion) – fakte li estis la unua uzanto!

En *Ĉu ne?* pluraj pecoj elstariĝas, ekz-e “Nokturno”, kies fandiĝo kun la antaŭa instrumenta pinkflojda etoso estas emociega, vi ne povos maltrafi kion mi celas aŭskultante ĝin. Sed ankaŭ “Vagabond'” montras ke Micke vere havas taŭgan voĉon, kaj kion vi pensas pri “Direndaj vortoj” kaj “Paco... kaj milit”, jes ja! Tiu kasedo de Amplifiki meritas multe pli da atento ol ĝi havis ĝis nun. Mi tion vere sentis spektante la koncerton en KEF. Se oni pretas atenti, Amplifiki multon diras per sia muziko, sed mi ne certas ke ĉiuj tion komprenis.

Antaŭ la koncerto, Micke iom rakontis pri la travivaĵoj de la grupo; ĝi havas tre malnovan kaj longan historion. Imagu, ĝi estas la unua esperanto-rokbando!

Cetere, Micke parolis pri la venonta produktaĵo de Amplifiki kiu verŝajne aperos sur kompakt-disko kaj kasedo – temas pri antologio de la grupo de la komenco ĝis nun.

Tio pensigas al mi ke Micke volas turni paĝon por eble komenci novan; espereble... ĉu ne!? ■

Alternativa
Roko
Ragamufino
Repo
Punko
Hardkoro
ktp.

Ĉio ĉi en la buntega katalogo de
BONDAGE
49 rue Trousseau
F-75011 PARIS



Tohuvabohuo

(Kia bela malordo!)



•Recenzas Marcelo Redoulez

en ĝi ĵus aperis. Longe kovita, zorge prizorgita, la tria kompaktdisko de **Kajto** estas nun akirebla (ĉe **EUROKKA** kun via reabono, ekzemple!). Efektive, kvankam laŭ la frontbildo de la KD, foje prezentiĝas kelkaj malfacilaĵoj por ekflugigi kajton, trian fojon *Rok-gazet'* anoncas novan produktaĵon de nia ŝatata frisa grupo. La kvar artistoj nun internacie famas pro siaj koncertoj okaze de tre diversaj esp-arangoj. Tamen tiu nova disko estas prezentinda, ĉar akirenda. Jen denove ekzemplo sekvinda por ĉiu esperantista artisto: grandkvalito!

Cento da personoj, inter 11-jara kaj 78-jara, laboris por plene sukcesigi tiun *Tohuvabohuon*. Al la kvar voĉoj de ni konataj aldoniĝas sur kelkaj muzikaĵoj la voĉoj de la virhoro **Wolvega's Mannenkoor**, de la muzika societo **De Woudklank Noordwolde** kaj de la markantgrupo **Liereliet**. Krome ankaŭ aŭdiĝas gastmuzikantoj, kiuj pliriĉigas la muzikensemblon per siaj kontrabaso, trombono, drumo, kaj perkut-instrumentoj.

La enhavo estas denove tre riĉa: dek naŭ titoloj! Kaj inter tiuj diversaj stiloj: muzikigitaj poemoj (inter kiuj elstaras ses de W. **AULD**), kvazaŭŝlagroj, mar-kantoj, kaj kompreneble kanonoj! Langvoreca trankvilo sekvas dancigan viglecon.... Pli detale, jen la temoj de la kantoj (cetere, tradukitaj en dek lingvojn sur la libreto post la kantotekstoj):

"Tohuvabohuo": Ĉu temas pri mia domo, ĉu mia propra administrado, ĉio pravigas ke mi ne povas eskapi el tiu cetere tre bela vorto: **Tohuvabohuo**.

"La velŝipo *Magdalena*": La vivo malfacilas sur la ŝipo *Magdalena*: biftekon ĉe la matenmanĝo, nur po tri virinojn ĉiunokte, kaj krome tri laborhorojn tage.... Jen sufiĉaj kialoj por ke la maristaro daŭre plendu!

"Al birdoj": Ho pluma paro, flugu for de tiu loko sen saĝo, kie homo estas en kaĝo kiel kaptita birdo.

Denove kanonoj

a. "Hobio-profesio": Ni tre ŝatas kanti kanonojn. Domaĝe ke ili sonas malpli forte kaj ofte ol la kanonoj kiujn oni fabrikas.

b. "Kutime-kelkfoje": Kutime tiu kiu perfortas, rabas, aŭ sangoverŝas, estas persekutita kiel krimulo. Sed kelkfoje tiu kiu malobeeme rifuzas tion fari, estas enkarcerigita.

"Rabista dormo": Ho dormo! kial vi forrabas tiom el mia tempo? Pro vi, mi ne povas ĝisfunde enpenetri en komprenon de la vivo.

"La muŝa milito": Ekfunkciigante bomboĉenon, muŝo eksplodigas tutmondan militon. (Tiu kanto estas aparte spektinda sursceneje: ĉiustrofe malkovriĝas parto de tre komika tolaĵo.)

"Marista sorto": La vivo de maristo malfacilas. Post ĉiuj mankoj dum vojaĝo, ĉiam restas la demando: kion oni retrovos revenante?

"La granda kermeso": Hazarde naskitaj de pasio, ni senzorge eniras la kirliĝon de la karuselo de nia junaĝo, ĝis fine la maŝino grincas. Kelkaj deziras rapidan morton, sed memoraĵo pri la pasinta somero, aŭ florodoro, forgesigas al ili tiun nigran penson. Kaj iel ajn, ni plustaras en tiu granda kermeso: la vivo.

Eŭropo-trilogio

1. "La parko": Eŭropo, kia vi estis antaŭ cent mil jaroj? Mi imagas grandan parkon, plena je multdiversaj estaĵoj. Inter tiuj la supermamulo, unika estaĵo kiu kapablis ekbruligi fajron.

2. "La domo": En la parko estas domo kie oni festas. La muziko allogas multajn homojn. Tamen malmultaj rajtas partopreni kiel invititoj. La aliaj restas ekstere kaj nur tra la malfermitaj fenestroj aŭdas polonezon.

3. "La knabino": En la koridoro de la domo staras nigrahara knabino. Ŝi devas animi la feston kun sia familio per kantoj kaj dancoj. Sed ŝi ne sukcesas, ŝi rigardas la festantojn kun miksitaj pensoj, ŝi ploras. Kaj tuj post la festokulmino ŝi retiriĝas kun sia familio sub ŝtuparo.

4. "Finalo": Eŭropo, kia vi estos post cent mil jaroj? Espereble belega parko kun multdiversaj estaĵoj malgraŭ la incidentoj de la pasintaj jaroj.

"Dumnokta aviado": Imagu, ke vi flugas en propra kajuto tra la spaco. Kia silento!

"Vojaĝo suden": Maristo diras al sia dulcineo ke li devas foriri. Iu voĉo vokas lin el sudo. Li volas tie komenci novan vivon, kaj li esperas tie trovi novan amon.

"La kuriozulo": Kiom bone estas ekridegi pro tiu kurioza estaĵo, kiun oni vidas fronte de si en misformiga spegulo.

"Tri stratoj": Sur tri stratoj maristo ekkonas tri interesajn aspektojn de la tera vivo: amikino, trinkejo, kaj laboro. Tamen la marallogo restas pli forta.

"Ni hisu la velojn": La restado sur tero estis ĝojiga. Sed ekblovis bona vento: taŭga momento por forveli.

"La plej bela vorto": La ordo kaj la sistematiko en la vortaro plaĉas al mi. Tamen la plej bela vorto kiun mi trovis en ĝi, estas **Tohuvabohuo**! ■



Ĵak LE PUIL '93

Ne donu tro

•Recenzas Marcelo Redoulez

Jam en 1978 li prezentas sin kiel *Danĝeran ulon.* En 1982 informas li: *Revenas mi*, kaj en 1985 li vojaĝigas nin de la bretona havenurbeto *Pont-Aven' ĝis* la pola ĉefurbo *Varsovi'*. De tiam tiu fuŝulo ne plu postlasis sonorajn spurojn registritajn.

Ni nun scias kial; ĉar lia nuna filozofio estas: *Ne donu tro!*

Tamen **Ĵak** ja plu kantis, sed pro tiu longa abstino for de la studioj nur nun estas eldonitaj kantoj kiujn li jam prezentis okaze de la 4-a **Internacia Junulara Renkontiĝo** de **SAT-Junulfako** en urbeto Créon (sudokcidenta Francio) en 1987!

De la lasta registraĵo la kantisto mem ne vere pliboniĝis. Ve! Sed jen, kiom aĝas nun Oĉjo Ĵak? Hmmm, ne gravas. Ja, mi petolas.

Ĵak LE PUIL reportas per tiu kasedo la kabaret-etoson, kiu elstaras ĉirkaŭ lia gitaro kaj liaj elektitaj tekstoj. Kaj kiaj tekstoj! Jen iu kiu kantas por ion diri. La kunlaborado kun **Georgo LAGRANGE** kaj **Jopetro DANVY**, kiel tradukintoj, daŭre bonefikas. Post **Maxime LEFORESTIER**, **Pierre PERRET**, **Jean FERRAT**, **Gilles VIGNAULT**, kaj **Jacques BREL**, jen ĉi-foje tradukoj de **Guy BÉART**, **Georges MOUSTAKI**, **Mouloudji**, kaj **Georges BRASSENS**. Kia repertuaro! Kvazaŭ antologio de la franclingva kanzonaro. Kompreneble ankaŭ originalaj tekstoj de **LE PUIL** aldoniĝas al tiuj bonaj tradukoj.

La unua teksto "Jen tiuj" estas ĝuste tia simpatia prezento-kanto, dum kiu Ĵak ne povis eviti sian plumon vundi la anglalingvan kantkomercon. Sekvas "La putorando": grinca nigra humuro kantas pri viro kies edzino dronas en puto. Feliĉe li sin helpas... per kompato!

En "Ne donu tro", kvazaŭ televida ĵurnalo, sinsekvas rigardo al diversaj aktualaĵoj laŭ la strofoj. Tamen pli ol kutime, tiu rigardo estas akra koncerne la laikecon aŭ la religian fanatikecon, la liberecon kaj la emancipadon, la diverslokajn militojn.... Ĝi ankaŭ atingas, sed tiam mokema, esperantistojn, kiel **Guljon KAPA**, **Brian MOON**, **Andreon ALBON**, kaj **Jan KOSMALUKon** (ĉu baŝibuzuko?).... Kelkaj klarigoj aldonitaj sub la teksto, helpos ĉiujn pli bone kompreni la plenan signifon de tiu longa teksto. Fine de la unua flanko venas kanto de **LE PUIL**... tradukita de **DANVY**. "Forgesi" ŝajnas tiu "longa plor'" necesa "por konsciiga kor'" en nia moderna mondo.

Laŭ la konsiloj de **Flo**, ni turnu la kasedon por aŭskulti la duan flankon. Komenciĝas tiam "Ne esperu pri re'". Tiu nostalgia kanto revokas St-Germain-des-Prés, kiel parizan kvartalon, kie post la dua mondmilito renkontiĝis la ekzistencialista generacio en la literaturaj kafejoj.... Kaj jen "Ateist'", dank' al Dio. Bela vigla ironio, kiu plie skizas portreton de **Ĵak**. Ĝi tute nature aldoniĝas al la jam longa listo de la engaĝiĝintaj kantoj de la "spertulo pri diboĉ'".





"Mi ne volas ellitiĝi": persone mi posedas de ses jaroj videobendon kiu atestas ke tiu muzikigo de la poemo de **Bertram POTS** datumas de tempo kiam **Kajto** ankoraŭ eĉ ne eklernis esperanton.... Admirinde estas kiel poeto povas inspiri muzikistojn. Se **Nanne KALMA**, kiu ne konis la ekziston de tiu ĵaka versio, bele adaptis sufiĉe viglan ritmon, **LE PUIL** preferis la vaton de pli milda, mola, melankolia sento pro la forlaso de sia komforta lito.

Kun sia kapo de "Aliul'", **LE PUIL** mem tradukis tiun tekston. Samaj povus esti la komentoj, kiel por "Ateist'". Tiuj kiuj jam ĝuis la aliajn kantojn, ne povos malŝati tiun ĉi mediteranean trankvilon.

La kasedo finiĝas per teksto de **Georges BRASSENS** tradukita de **Georges... LAGRANGE**, "Mortadi pro ide'". Jen grava pripensigo: ni mortu pro ideo, jes ja, sed kun prudento, ĉar ĉu ni elektis la bonan? (Parenteze tiu kanto estas parto de espo-spektaklo *Vizito ĉe Oĉjo Georges* prezentota de **Esperanto-Gironde** venontan majon en Seto, naskiĝurbo de **BRASSENS**.)

La tuto estis registrita ĉe **Georgo HANDZLIK** en Pollando antaŭ unu jaro dank'al juna pola muzikisto kiu mem ĉion aranĝis. Ĝi estas disvendota kontraŭ 80,00 FRF. Mendu ĝin rekte ĉe **Ĵak LE PUIL**, kiu tamen ankoraŭ atendas la eldonon de la tekstaro kiu akompanos la kasedon. Vi ja ne bedaŭros – tuj mendu ĝin! ■

Ĵak LE PUIL
Le Cocherat
F-18210 THAUMIERS
Tel. +33 48.61.81.98

Klára MIKOLA kaj László GARAMVÖLGYI

Harmoni'

•Recenzas Ĵak Kobel

Kasedo kun originalaj kantoj kun tekstolibreto eldonita en 1992 de **Klára MIKOLA** kaj **László GARAMVÖLGYI**.

La gehungaroj kantas dolĉe. Ili akompanas sin per akustika gitaro kaj blokfaŭto. La etoso de tiu kasedo estas ĉiam melankolia ĉar temas pri soleco kaj tristeco. La kanto "Jen, mi nun ekiras" estas hungara popolkanto, la sekvanta, "Almozul'", ricevis premion en Belartaj Konkursoj en 1990.

Sopiro al amikeco estas ilia temo, du kantoj malŝatas la bruajn urbojn: "La urbego" kaj "En la granda urbo" kie mankas amikoj; nur tiu lasta kanto iomete viglas.

Oni povus bedaŭri ke ĉiuj aliaj kantoj sonas tre simile, varieco mankas, ĉiam la sama ritmo, la sama rapideco, la sama etoso.

La lasta kanto de la kasedo nomiĝas "Ĉion bonan, amik'", kaj finiĝas per "... dankon pro via rido, ĝis revido..." – sed kiu ridis?

Resume, tro mola estas la stilo, tro simpla la muziko, kaj foje ne tre kvalitas la surbendigo. *Harmoni'*, la titolo de tiu kased-albumo plaĉos nur al splenaj animoj. ■



•Recenzas Marcelo

Kiam oni ekaŭdas kanti **Kláran MIKOLA** kun **László GARAMVÖLGYI**, oni tuj trovas similecon kun **Nataŝa GERLAĤ** kaj **Ĵomart AMZEJEV**. La stilo, la tono, la temoj de la tekstoj kaj de la muziko memorigas pri la langvoreco de la orientaj novaj trobadoroj nun bone konataj de la legantoj de *Rok-gazet'*.

Pro tiu facila komparo, al ĉiuj kiuj ŝatas aŭskulti **Nataŝan** kaj **Ĵomarton**, evidente plaĉos ankaŭ **Klára** kaj **László**! En ties unua kasedo "Harmoni'", tiu duopo prezentas tekstojn kaj muzikojn originale verkitajn de **László**.

El inter la iel melankoliaj kvazaŭplendoj de la aŭtoranimo elstaras unu kanto. Tiu peco estas iom pri rokema, jazema, pli ĝoja ol la cetero de la kasedo. Permesu al mi konfesi ke ĝuste ja tiun ĉi mi preferas. ■

Ĝimini Muzik'




•Richard Favry (trad. Flo)

Jen nova diskeldonejo en Francio: **Gimini Music**, starigita de **Gérard LHOMME**, produktas kaj eldonas muzikaĵojn interesajn, prefere kun ĵazaj kaj ĵazrokaj influoj.... Vi mem taksu: dise-mise kaj senorde jen **Didier MALHERBE**, **Hugh HOPPER**, **Elton DEAN**, **Pup PYLE** (ĉiuj eksmembroj de **Soft Machine** aŭ **Gong**), sed ankaŭ ĵazaj muzikistoj kiaj **Yochko SEFFER**, **François MECHALI**, kaj **François COURTIER**.... Gravuloj, ĉu ne? La tri lastaj albumoj aperis antaŭ nelonge.

KD album-referenco GM 1004


Sophia Domancich Trio: *Rêve de singe (Simi-sonĝo)*, kun **Sophia DOMANCICH** (piano), **Paul ROGERS** (5-korda basgitaro), kaj **Tony LEVIN** (drumo). La triopo prezentas muzikon pli aŭsteran, malpli alireblan ĉe unua aŭskultado; tamen estas tiuj ĉi muzikaĵoj kiuj rezervas plej surprizajn malkovrojn kaj feliĉon. Jen bonega pianistino kiu scipovas samtempe esti dolĉa kaj libere ĥaosa kun inventemo viglecoplena, des pli ke la ritmiko subtenas kaj antaŭenpuŝas ŝin komplicece.



KD album-referenco GM 1002

Lydia Domancich: *Mémoires (Memoroj)*, kun **Lydia DOMANCICH** (piano kaj sinteziloj), **Yvon GUILLARD** (trumpeto kaj buglo), kaj **Pierre MARCAULT** (perkutinstrumentoj). Tiuj ĉi tri muzikistoj aŭdigas al ni verkon kiu samtempe estas ŝveba kaj tre ritma: unuvorte, sensama. **Lydia DOMANCICH** scias krei per sinteziloj ravajn etosojn; ŝi certe multe aŭskultis kaj ludis **Debussy**-aĵojn per piano ĉar ŝi fajnece laboras. **Yvon GUILLARD** alportas varman kaj teneran tuŝadon, kaj **Pierre MARCAULT** vestas tiun muzikon per ritmoj el la tuta mondo; belega miksaĵo en tiu albumo.





KD album-referenco GM 1003

Short Wave: *Live (Vive)*, kun **Hugh HOPPER** (basgitaro), **Didier MALHERBE** (saksofonoj kaj fluto), **Phil MILLER** (gitaro kaj gitarsintezilo), kaj **Pip PYLE** (drumo). Kiel diras **Pip PYLE** en la prezenta teksto de tiu albumo, **Short Wave** estas la frukto de feliĉa akcidento: hazarda renkontiĝo inter kvar muzikistoj, ĉiuj multospertintoj de progresiva muziko (ĵazrok-tendenco). Surbendigita sursceneje, la muziko bonege disvolviĝas en sia ĵazroka ritmiko; ni sentas ke la kvar kunuloj plezurigas sin..., kvankam **Didier MALHERBE** ĉiam tiom serioze preterflugas la grupon.

Gimini Music perkoresponde disvendas la referencojn de sia katalogo (ĝi enhavas nur KD-diskojn). Por eventualaj mendoj kaj por ricevi la katalogon, skribu al:

Gimini Music
42 rue de la République
F-94430 CHENNEVIERES sur Marne
Francio
Tel: +33 (1) 45.76.13.72
Faks: +33 (1) 45.76.72.28



aktivas bretone

•Raportas Flo

Jen juna kaj nova diskeldonejo kiu kreiĝis en junio 1992. Respondecas pri ĝi **Vincent PRIOU** (direktoro) kaj **Patricia TEGLIA** (respondeculino pri disvolviĝo). **Lola Label** estis starigita de la asocio **Trempolino**, kiu agadas en la rokscenejo de Bretonio ĉirkaŭ la urbo de Nantes (*Naoned* en la bretona lingvo). Ĝia celo estas produkti novajn artistojn precipe el Bretonio (ekstrem-okcidenta parto de Francio). **Lola Label** estas distribuata de **Polygram Distribution**.

Ĝia unua produktaĵo estas kasedo *Royal de Luxe* kun eltiraĵo de *"Cargo 92"*. Temas pri grandioza spektaklo de tute avangarda stratteatrotrupo kies nomo estas **Royal de Luxe (Reĝa Lukso)**.

Royal de Luxe akiris kargo-ŝipon por produkti en ĝi sian spektaklon *La véritable Histoire de France (La vera historio de Francio)* kaj aliajn spektaklojn far aliaj artistoj. En la kargo-ŝipo ili restarigis malnovan straton de Nantes kun magazenoj kiuj disvendas lokajn produktaĵojn, trinkejo, ktp. Kiam ĉio estis preta, la kargo-ŝipo forveturis al Sud-Ameriko kun la tutaj spektakloj; entute pli ol cent artistoj kaj kunlaboratoj partoprenis tiun turneon, inter ili estis la **Mano Negra**.

Spektakloj okazis en havenoj de diversaj urboj de Centra kaj Suda Ameriko. *Royal de Luxe* estas giganta kaj fascina spektaklo, oni ne povas klarigi ĝin, oni spektas ĝin senvorte, ĝi estas teatra rok-evento eksploda muzika kaj metal-arkitektura; la tuto fantaste genia!

Lola Label aperigis albumon de **Taÿfa** (kabila roko) antaŭ fino de 93, kaj albumon de **Chats Maigres** *(Maldikaj Katoj)*, popkanzona duopo, en januaro 94.

Decembre 1992, **Lola Label** produktis KD-albumon de la rokbando **E.V.** kies titolo estas *Distruj*. E.V. estas ege originala kaj interesa rokbando kiu konsistas el du bretonoj kaj du finnoj (suomoj). La bretona lingvo estas kelt-devena kaj minoritatigita lingvo kiel la okcitana, kataluna, eŭska, francika, ktp. en Francio. Tiuj lingvoj estis kaj estas subpremataj kaj minacataj je malapero en Francio pro la lingva politiko de la sinsekvaj francaj registaroj. La muziko de E.V. estas, ni diru, netipa roko el keltaj nuancoj kun tekstoj, ĉu bretonaj, ĉu finnaj, ĉu francaj, kiuj alportas ion freŝan kaj maran – ĝi estas speco de vigla etno-pop-roko kelta. **Jari** basgitaras kaj kantas, **Gweltaz** gitaras, bombardas, kaj kantas, **Fakir** klavaras, akordionas, kaj kantas, kaj **Harri** drumas kaj kantas.

Mi petis al ili la signifon de "E.V."; **Gweltaz** respondis ke *"Etre Vrodael"* signifas *"Esti Internacia"*, kaj **Harri** diris *"Esperantò Vivanta"*!

Ili elektis kanti bretone, finne, kaj france ĉar tiuj lingvoj estas iliaj gepatraj lingvoj. Pere de tiu sinteno ili volas montri ke la angla ne estas la nura rok-lingvo, kaj ke ankaŭ aliaj tre taŭgas. Ili volas konatigi lingvojn kaj kulturojn ignoritajn kaj neaknoskitajn. De la komenco, E.V. starigis la asocion **Gwenn Kivi** *(Blanka Ŝtono)*, breton-finna kunligita vorto). Per tiu asocio ili eldonas fangazeton *À la conquête du monde (Al mondkonkero)* kaj produktis la unuan kvartitolan disketon kaj kasedon *Shamaani* en 1989, la 2-an kasedon *6 octobre* surbendigitan dum viva koncerto la 6-an de oktobro 1990 en Nantes/Naoned. **Gwenn Kivi** ankaŭ organizas koncertojn en la regiono kaj turneojn por E.V. (iom kiel faras *Rok-Reto kaj Regionoj* por **Tutti Futti**). En junio 92, **Gwenn Kivi** kaj **Lola Label** kunproduktis la albumon *Distruj*. Tiu KD-albumo enhavas diverslingvajn titolojn. Ses bretonajn: "Mab al loar", "Ar falc' Hon", "Kan bale an A.R.B.", "Lavar din", "Ar gwener" ("E gwer"), kaj "Bet on bet". Tri finnajn: "Yksinäinen", "Hakaniemi", kaj "Joku muu". Tri francajn: "Marins perdus", "Elle pleure", kaj "Éternellement". Kaj du keltajn instrumentaĵojn: "Cymru" kaj "Keltia".

E.V.



Foto Claude Servat



Foto Phil Journé

Les Chats Maigres

E.V. multege koncertis, interalie faris turneojn en Francio, Kimrio, Nederlando, Finnlando, kaj Belgio.





Plurfoje ili ludis en la **Inter-Kelta Festivalo** de Lorient (Bretonio). Al demando ĉu E.V. pretus iam kanti en esperanto, ili respondas ke ili intensive deziras verki kaj kanti en siaj gepatraj lingvoj, tio estas iliaj radikoj. espo ankoraŭ ne enradikiĝis en ili. Dumtempe, nepre malkovru ilian rokmuzikon plenan je spuroj de ankoraŭ neforpasintaj kultur-radikoj.

Por fini, jen mesaĝoj de:

Gweldaz: *"Dalc'hit ma t war ho tachenn met arabat ankounac'haat yezh ar vro memestra. Kenavo."* ("Restu bone en via kampo [t.e. esperanto], sed tamen ne forgesu la lingvon de via lando. Ĝis revido.")

Jari: *"Mä minä olen hyvä poika ja niin yksinäinen, haluaisin tavata kauniin tytön ja mennä naimisiin ja haluaisin lapsia myös. Terveisiä lukijoille."* ("Mi estas bona knabo kaj tiel, tiel soleca, mi volus renkonti belan knabinon kaj edziĝi kaj ankaŭ mi volus infanojn. Saluton al legantoj".

Kontaktu ilin ĉe:
GWENN KIVI
7 rue Jules Ferry
F-44300 NANTES
Francio
Tel: +33 40.52.36.69

Por mendi produktaĵojn:
LOLA LABEL
51 boulevard de l'Égalité
F-44100 NANTES
Francio
Tel: +33 40.43.10.11
Faks: +33 40.43.51.88

Elekktra Muziko

LABIRINTA IRVOJA TRASERĈADO

•Kompilis Floréal

En julio 93, **Albert STEPHAN** (**Stefano** de Libera Esp-Asocio) el Düsseldorf sendis al nia redakcio fulman informon: "Antaŭ ĉirkaŭ du monatoj telefonvokis min ulo kiu petis ĉu estus eble traduki vortojn pri elektra muziko de la germana al esperanto. Mi jesis kaj tuj poste li vizitis min. Li klarigis ke muzikgrupo ludante elektran muzikon intencas subteni la esp-ideon ĉar ĝi estas la lingvo de amikeco, popol-interkomprenigo, ktp. La grupo eldonos albumon sub titolo *Esperanto*, kaj la nomo de la bando estas **Elektric Music** *('Elekktra Muziko')*. Ili jam aĉetis grandan kvanton da espo-vortaroj, kaj ili ekspedis ekzemplerojn al diversaj interesuloj pri elektra muziko en Germanio. Mi tradukis specialajn vortojn kaj duonpaĝan tekston el la germana en espon...."

De tiam, Stefano ne plu havis novajojn.

Kelkajn monatojn poste ni trovis artikolon en la germana en *GEJ-Gazeto* de **Konrad** GRAMELSPACHER; tio vere mirigis nin. Konrad en tiu artikolo akre kaj senindulge kritikas novan KD-on *Esperanto* de grupo **Elektric Music**. Tuj ni havis la senton ke temas pri la sama bando kaj ke io eskapis al ni ĉar ni ne havis rektan informon. Tuj ni telefonvokis Stefanon en Düsseldorf; li eĉ ne sciis pri la apero de la KD-albumo. Li donis al ni kontakton, sed vane, ĝi ne plu validis.

Ni direktiĝis al GEJ (Germana Espo-Junularo) kaj **Thomas PUSCH** respondis: "Mi ne havas adreson de **Elektric Music**, mi do proponus al vi rekte kontakti kun Konrad en Freiburg, kiu verkis tre sukan kaj belstilan, kvankam resume sufiĉe dissiran recenzon germanlingvan, kiu aperis en *GEJ-Gazeto*. La tuta muzika projekto laŭ mi ne indas nepre tro da atento." Tiu respondo instigis nin pluiri en nia enketo mistera.


Sukcese ni trafis Konradon tra **Ursula NIESERT**, la kunordigantino de la frajburga espo-grupo. Konrad diris ke li ne havas pli da informoj ol kiujn li prezentis en sia recenzo, ke li ne rilatiĝis kun la grupo, kaj ke li ne kompetentas pri tia muziko kiun finfine li tute ne ŝatas. Tamen li sugestis ke ni kontaktu la Espo-Centron en Paderborn kiu helpis la muzik-grupon.

Hermann BEHRMANN, la vicprezidanto de la Espo-Centro, havis bonan kontakton kun la bando. Li klarigas: "La firmao **Elektric Music Productions Germany** havis la originalecan ideon aldoni al sia nova lasera disko (KD) *Esperanto* malgrandan vortaron esperanto-germanan, kiun oni aparte presigis (entute dek mil). La diskokovrilo kaj la vortarokovrilo aspektas same. La vortaro ne estas aparte vendata, sed ĉiufoje simple aldonata al la KD. Fakte, nur unu titolo el la ok muzikajoj portas la titolon 'Esperanto'. En ĝi aperas ripetafoje la anglalingve prononcataj vortoj *'Esperanto – Universal Language'*, sufiĉe malklare prononcataj kaj preskaŭ ne kompreneblaj. Tamen bela ideo! Kaj ĉar la vortareto enhavas la adreson de la Espo-Centro Paderborn (Germanujo), interesuloj ĉiukaze trovas kontaktadreson."

Finfine post traserĉado en tiu nekredebla komplikita labirinto espa, ni sukcesis havi jenan kontaktadreson:

Elektric Music Productions Germany
Stockkampstraße 34
D-40477 DÜSSELDORF 30
Tel: +49 (211) 44.29.86
Faks: +49 (211) 44.24.16

Post transiro de tiuj unuaj malfacilajoj ni havis duan barilon. Ĉu vi konas la lingvan barilon? Do, estis tiu! Kompreneble, ni parolas la Internacian Lingvon, sed bedaŭrinde nek la germanan, nek la anglan. Jes, por organizo kiel EUROKKA ne estas serioze, sed estas tiel! Ĉiukaze, ni ne povis rekte paroli kun **Elektric Music**, kiu, vi mem komprenis, ne parolas espon. Ni devis trovi trian personon por traduki; feliĉe ni havas germanan konaton kiu laboras en la tuluza *Siemens*-fabriko, kaj tra li ni sukcesis komuniki kun **Elektric Music**. Ni atendis preskaŭ monaton antaŭ ol ricevi nur parton de la materialo petita! Nia germana amiko **Karl HEINZ** devis



realvoki ilin dufoje por ke ili decidiĝu sendi ĝin.

Uf! Finfine nun ni povas prezenti al vi tiun misteran bandon kaj muzikon.

Elektric Music signifas novan kuraĝan ĉapitron en la vivoj de du muzikistoj, amikoj de dek kvin jaroj, nun fine kaptintaj la oportunon unuafoje taŭge kunlabori. **Karl BARTOS** estis ĝisfunda parto de **Kraftwerk** ekde ĝia noviga *Autobahn* en 1975 kaj *Trans-Europe Express* en 1977 ĝis ĝia *The Mix* en 1991. **Kraftwerk** estis avangarda elektronika muzikgrupo germana de la 70-aj kaj 80-aj jaroj. Tiu famega grupo malfermis novan vojon kiun pruntis amaso da grupoj: tiel naskiĝis la elektronika muziko kies tendenco plej konata estas **tekno-muziko**.

Lothar MANTEUFFEL faris tri albumojn kun la konata germana duopo **Rheingold**.

Per **Elektric Music**, tiu ĉi duopo libe-

riĝas de sia pasinteco, kun celo freŝe modli sian propran elektro-muzikan sonon. Ilia debuta albumo, *Esperanto*, prezentas kompleksan sekcon de la medio-obsedita pop-kulturo kiu enfermas tion kio laŭ ili estas la hodiaŭa inform-socio. Ĝi malkovras ankaŭ ke la duopo verkis aron da puraj elektro-popaj melodioj kiuj neatendite penetras la kapon de la aŭskultanto kaj absolute rifuzas foriri. La komplikita simpleco de pecoj kiaj la vezikeca unua "TV", la sens-ema, insistema "Kissing the Machine" *("Kisi la maŝinon")* kiun kantas kiel gasto **Andy McCLUSKY**, kaj la pumpada kaj pistada "Crosstalk" *("Transparoli")*, memorigas pri multaj muzikaj momentoj, sed devenas de neniuj.

"Ni estas denove komencantoj," priskribas Lothar ilian lokon kaj deirpunkton. "Ni ne estas flanka projekto aŭ disfluaĵo de io alia." Ili nek, laŭ Karl, senespere provas esti modernaj, nek klopodas modeli sin laŭ la tekno-muziko je kiu **Kraftwerk** estis tiel grava influo. "Kompreneble, ĉiu estas parto de ĉio kio estas farata, sed unuavice oni devas esti parto de sia propra vivo, kaj devas mem decidi. Ni provos fari nian muzikon laŭ nia propra maniero."

La albumo *Esperanto* kiel koncepto evoluis nature kun la muziko, kaj dumtempe fariĝis pli kaj pli alloga al la duopo. "Kiam ni komencis la diskon, ni pensis fari ĝin kiel biografion," diras Karl. "La unua kantaĵo estis 'Showbusiness' *('Spektaklo-industrio')*, kiu estas efektive pripenso pri tio kion ni faras kaj pri kie ni nun situas. La posta kantaĵo estis 'TV' – verŝajne ĉar ni tiom spektis dum ni surbendiĝis! Kiam ni ekkomencis 'Informo'-on, la temo klariĝadis."

Se muziko de ĉiam estas internacia lingvo, kaj de ĉiam bezono pri espero nature esprimiĝas pere de muziko, do la ideoj de *Esperanto* povas esti fekunda fonto de inspiro. Finfine tamen, ĝi estas koncepto el kiu la aŭskultanto povas preni laŭplaĉe multon aŭ malmulton. Ne estas ununura, fiksa vojo al **Elektric Music**. "Ju pli vi aŭskultas muzikon kaj ju pli vi implikiĝas en ĝin, des pli vi povas akiri el ĝi," diras Karl. "Precipe, ni volis ke nia muziko estu **elektra**." Laŭ *PIV*, **elektri** havas ankaŭ figuran sencon: "ekscitegi, morale skuegi", kaj tion plenumas ilia muziko. La esperanta nomo de la grupo povus esti **Elekktra Muziko**, kun du K-oj, por konservi la originalecon de la ortografio.

La albumon eldonis **EW (East-West)** en Germanio kaj ĝi troveblas en ĉiu granda diskvendejo (almenaŭ ĉi tie en Eŭropo). La muzikspektro de la 8 titoloj prezentas elektro-popajn melodiojn ĝis tekno-ritmajn muzikaĵojn. Neniu el tiuj titoloj estas en espo, sed en la titolo "Esperanto", post refoja aŭskultado distingeblas tra sintezaj voĉoj: "*Esperanto – muziko estas lingvo*" (aŭ io tia) kaj espo-vokaloj.

La instrumentoj estas muzikmaŝinoj elektronikaj (sinteziloj, sekvenciloj, ktp.), kaj la kantvoĉoj estas jen sintezaj, jen homaj, kaj jen ambaŭ.

Karl Bartos kaj Lothar Manteuffel daŭrigas sian karakterizan tradicion per tiu KD. **Elekktra Muziko** transiĝas ĝin en la nuntempon kaj donas impulsojn por la elektronika muziko de la estonteco.

En la kampo de tiu muzikstilo, **Elekktra Muziko** finfine restas relative popa; aliaj grupoj havas tendencojn multe pli **tekno-trancaj, acidaj**, kaj eĉ **dommuzikaj** ("**House**"). Ĉiuj ĉi muzik-artefaritaĵoj far maŝinoj kaj robotoj enkondukas novan eraon jarcentfinan; tamen ŝajnas ke esperanto estas ankoraŭ pli avangarda, ĉar ĝi kirlomiksas ĝis kunfandiĝo pli kaj pli tre malsamajn kulturojn homajn, muzikajn, kaj vivstilajn. ■

Tutti Futti



T •**Kompilis Herman DECEUNINCK kaj Flo**

Tutti Futti, miksaĵo de la itala vorto *tutti* ("ĉiuj") kaj de la francika (luksemburga) vorto *futti* ("fuŝita"), estas la sola franca rokbando kiu kantas en la francika, lingvo de la frankoj, (**Klovis** kaj **Karolo Granda**), kiu hodiaŭ ankoraŭ estas parolata de cent miloj da homoj en la koro de Eŭropo (Mozelo, Luksemburgo, Sarlando, Rejnlando-Palatinato, kaj en parteto de Belgio).



La grupo volas per *Trans-Eurock Express* (ilia lasta KD-albumo) inviti la aŭskultantojn al rokmuzika ekskurso tra kontraŭrasisma, multlingva kaj translima Eŭropo en lingvoj franca, francika, itala, araba, kaj angla. Sed krome, dum viva koncerto **Tutti Futti** kantas en greka, kimra, eŭska, germana, bretona: oficialaj lingvoj, minoritataj aŭ nekonataj lingvoj, lingvoj de migradoj, kaj tre baldaŭ en esperanto. Ĉiuj esprimiĝas per roko.

Tutti Futti naskiĝis en 1985 kaj en la sama jaro ekkoncertis. Ĝi partoprenis muzikkonkursojn, koncertojn, kaj turneojn en Francio, Germanio, Bretonio, Kimrio, ktp.; aŭdeblis sur radio (i.a. **Radio Libertaire / Liberecana Radio** en Parizo, al kiu estas ligita ankaŭ **Radio Esperanto, SWF, RTL, ARA, RFM, BBC**, ktp.); kaj videblis en televidprogramoj (i.a. **Arte, FR3, Saarland Rundfunk, ARD**, S4C, ktp. Haveblas flaŝ-filmoj, demo-kasedo, afiŝoj, kaj gazetardosiero por interesitaj organizantoj de muzikfestivaloj kaj koncertoj.

Jo NOUSSE, la kapulo de la bando, estas muzikisto, kantisto, kaj francika poeto. Li klarigas la

Mal-kovr'

Tutti Futti

klopodojn de **Tutti Futti**: "Fari rokmuzikon en mia regiono estas kontraŭstara ago, des pli ke ni kantas *platt*-e (francika lingvo en la franca parto), sed la koncepto de la bando situas multe pli transe. Defendi la francikan lingvon (*platt*-an, por ni) estas ankaŭ (kaj ĉefe) defendi la aliajn lingvojn kaj kulturojn. *Trans-Eŭrok-Ekspres'*, nia aktuala spektaklo, desegnas rok-itineron en deko da lingvoj (kaj baldaŭ esperanto). Ni prifajfas ŝovinismon kaj folkloron. Kiam ni koncertas en Germanio, Luksemburgo, aŭ aliloke, ĉiam la mesaĝo samas: **Interkultureco kaj Kontraŭrasismo**. Tio ne estas leviĝanta pugno sed malfermita mano etendita!"

Aŭskultante la KD-albumon *Trans-Eurock Express*, tion oni sentas ekde la unua titolo "Moussaawat" *("Egaleco")*, en kiu mediteranea araba rok-ritmo enpuŝas de la komenco kaj la araba kanto belege finkolorigas la temon. Tri francikaj titoloj, "Hexon", "Schënneren", kaj "D'liineren" alportas per la kanto viglan kaj ribeleman rok-etoson al la albumo. "Trans-Eurock Express", la sepa muzikpeco, estas en la franca same kiel tri aliaj, kaj estas unu el la plej elstaraj. "Scottish puzzle" estas balado en la antikva historio de la lando en la angla, kaj "Uomini neri" estas subteriĝo kun nigraj homoj de la minejoj en la itala. Tiu lasta kanto povas doni ideon pri kiel la kantisto certe sukcese kantos esperante (eĉ se papage).

Muzike tiu albumo estas sukcesa, oni sentas miksiĝon de kulturoj.

Akustika girtaro, perkutinstrumentoj, blovinstrumentoj, kaj klavaroj kolorigas tre metalrokecajn gitarojn per dolĉaj etnaj kaj ĵazaj nuancoj. Kaj kiu voĉo – jen kantisto!

Emocian, viglan, kaj mirigan rezulton sukcesis produkti **Réseau Rock & Régions (3 R- oj)** kaj **Tutti Futti** kun:

- Jo NOUSSE: kanto, ĥoroj kaj akustika gitaro (12 K-a.)
- Pat BEN BACHIR: gitaroj kaj ĥoroj
- Bob BAUER: basgitaro
- Dan HAUROGNE: drumo, perkutinstrumentoj kaj ĥoroj

Por la surbendigo de la KD-albumo estis invititaj:

- Hervé MANGIN: tenora kaj soprana saksofonoj
- Gamini KONARA: perkutinstrumentoj
- Patrick RIGOLLET: klavaroj

"Mam CD Trans-Eurock Express fildert Tutti Futti een antirassistéch, an iwergrenzléch Europa." (francike)

("Per la KD *Trans-Eŭrok-Ekspres'*, **Tutti Futti** invitas vin sur la vojoj de kontraŭrasisma, plurlingva, kaj translandlima Eŭropo.")

Diskaro de *Tutti Futti*

- Maksidisketo *Reebou/ Arc-en-ciel* (kunprod. **Apero/ Tutti**. 1987)
- Titolo sur kompil. "Tontexte/ Textöne" (kunprod. **EMI/SR**. 1989)
- Titolo sur kompilaĵo "Lorraine d'en Fer" (Prod. **AMPER**. 1991)
- Titolo sur kompilaĵo "Musek ouni grenzen" (prod. **Schnoog**. 1992)
- KD *Trans-Eurock Express* (prod. **3R**. 1993).

Trans-Eurock Express haveblas kontraŭ 115 FRF / 690 FRB / 34 DEM ĉe **Rok-Reto kaj Regionoj**). ■



Foto Cathy Poncelet

Dan, Bob, Pat kaj Ĵo

3 R-oj

Rok-Reto kaj Regionoj

(3 R-oj) helpis kaj produktis la KD de **Tutti Futti**, iom kiel **Gwenn Kivi** por E.V. (vidu artikolon pĝ. 27).

Réseau Rock & Régions fondiĝis por disvolvi rokmuzikon en minoritataj lingvoj, kaj celas diskonigi informojn pri tia roko kantata en regionaj kun dominataj, minacataj, aŭ malpli-uzataj lingvoj por tiel krei ekkonsciiĝon pri tiu problemo ĉe la junularo.

Rok-Reto kaj Regionoj organizas koncertojn, turneojn, kaj interŝanĝojn de rokbandoj kiuj kantas en malpli-uzataj lingvoj.

Tiu reto distribuas informmaterialon por tiaj bandoj kaj kuraĝigas aliajn kanti en siaj lokaj lingvoj. La reto volas stimuli kaj instigi interesitajn muzikgrupojn, lingvomovadojn, kaj eldonejojn kontakti kun ĝi cele al eventuala estonta kunlaboro.

Espo-muzikgrupoj: nepre pripensu kunagadon en tiu nobla sed malfacila vojo por konservi kaj plikreskigi la endanĝerigitan multlingvan muzikkulturan heredaĵon en Eŭropo, kaj pere de espo-rokgrupoj eble ankaŭ en la mondo.

Cetere je la fino de 1994 tiu asocio preparos adresaron de rokgrupoj kiuj kantas en malpli-disvastigitaj kaj minoritataj lingvoj; se via grupo aŭ se vi mem konas tiajn rokbandojn, informu ilin por ke ili rilatiĝu kiel eble plej baldaŭ kun **Rok-Reto kaj Regionoj**.

La 15-an de januaro 94, la reto organizis sian 3-an festivalon **Réseau Rock & Régions** kun E.V. el Naoned/Nantes (bretona/finna), **Mitili FLK** el Udine (friula), kaj **Tutti Futti** el Deinowen/ Thionville (francika/plurlingva).

Por pliaj informoj nepre kontaktu **Rok-Reto kaj Regionoj**:

Réseau Rock & Régions
17 rue de la Perdrix
F-57100 THIONVILLE
Francio
Tel: +33 82.54.43.95

■

Pixamandúrries

•Raportas Flo

Nikolas GIL, unu el niaj aktivaj kunlaborantoj el León (Hispanio) sendis informojn pri espo-rokmuziko, EUROKKA, *Rokgazet'*, kaj **Vinilkosmo** al diversaj hispanaj rokgazetoj kaj fanzinoj. Tio tre utilis, sukceso efektiviĝis kiam kataluna anarko-punk-rokbando kontaktis lin por havi pliajn informojn kaj por eklerni espon.

Pixamandúrries (**Piŝamandurjes**) estas ĝi. La bando eldonis antaŭ nelonge kasedan albumon ĉe **Masterdisk Productions** S.A. Tiu kasedo, kies titolo estas *L'any dels gossos (La jaro de la hundoj)*, enhavas 12 titolojn, kaj inter ili troviĝas du espo-kantoj, po unu ambaŭflanke. La aliaj kantoj estas en la kataluna, hispana, kaj unu en la araba.

"Mi bezonas revi", la titolo de la A-flanko, filozofi-plenas tiel ĉi:

"La revoj mortas, la ideoj persistas.
Tamen, mi bezonas revi
revi por vivi
vivi por revi".


"1492-1992: La historio de la murdoj", la titolo de la dua flanko, resumas jarcentojn de amerika historio: *"Dio, patrujo, kaj reĝo = Mortigo, mortigo, kaj mortigo; konkeroj kaj sango...."*

Ankaŭ la aliaj tekstoj havas tre tiklajn sociajn temojn kaj eĉ kontraŭpolitikajn, kun vere liberecana sinteno. Bedaŭrinde ke ili kompreneblas nur de la katalunoj kaj hispanoj.

Muzikstile, la albumo estas malfacile difinebla, sed la ĝenerala etoso estas punk-roka kun mediteranea koloro; tamen ĝi restas propra stilo, rokmuzike kohera.

Teknike, la produktado de tiu albumo estas iom nesufiĉa pro verŝajne monmanko, la registrado ne estis sufiĉe prilaborita en la studio same kiel la miksado, kiu lasas la tuton en iom ebena sono kaj ne sufiĉe reliefigas la voĉojn, kiuj malfacile kompreneblas sen legi la tekstojn. Tamen la rezulto estas pli bona ol kelkaj espo-produktaĵoj kiuj vendiĝas ankoraŭ hodiaŭ.

Joan estas la gitaristo-kantisto. Kvankam li lernas espon nur de kelkaj monatoj, li



mem verkis la tekstojn. Bedaŭrinde li ne havis konsilojn pri espo-prononcado, pro tio li misprononcis kaj misakcentis plurajn vortojn, sed tio ne forprenas la kompreneblecon de la tekstoj. Certe la venontaj espo-kantoj estos perfektaj. Ĉiukaze, gratulojn pro tiuj du unuaj!

Joan eklernis espon, ĉar li emis kanti en ĝi: ŝajnas al li ke tiu lingvo estas bonega ideo por komuniki en la mondo sen limoj.

Pixmandúrries koncertis interalie dum la UK en Valencio marĝene en aparta rondeto rok-alternativa, sed pri tio sciis nur kelkaj junaj iniciitaj espistoj.

En 1991 **Pixamandúrries** aperigis diskon kies titolo estas *Quina vida (Kia vivo)* ĉe **Picap Produccions**, kaj jam de nun la bando laboras kaj penadas por pretigi novajn espo-titolojn por venonta albumo.

La albumo *L'any dels gossos* haveblas ĉe **Vinilkosmo** laŭ referenco VKK20.

Cetere, ili ĵus eldonis to-ĉemizegon kun la vortoj *"Dio, patrujo, kaj reĝo"* en espo, kaj la teksto de tiu kanto dorsflanke.

Helpo, subteno kaj ĉio alia sendindas al:

Pixamandúrries
p/a Joan ARTIGAS ALSINA
Carrer Casavells 53
E-17121 CORÇÀ-Girona
Katalunio / Hispanio
Tel: +34 (72) 63.02.56

■



Foto Amparo

***Pixamandúrries:* Joan ĉe gitaro/kanto**

Aŭtobluso el Eŭskio



•Raportas Flo!

Por mi, iri al **KEF-4** en Danio ebligis al mi ankaŭ malkovri hazarde blus-rokbandon el Eŭskio.

Mi tion ne malkovrintus hazarde se la komunikado pli bone funkcius (eĉ en Espio!) ĉar niaj karaj eŭskaj amikoj ne sciigis tuj al ni la informon.

Fakte revenante al Francio mi havis tempon legi eŭskan revuon *Kuspe* kiun donacis al mi **Rafa**, kaj en ĝi trovis genian informon kies titolo estas "Rokmuzika grupo el Gasteizo, **Parada de Blues** *(Blus-Haltejo)*".

Mi preskaŭ svenis!

Kio? Nova espo-rokbando ekaperas kaj ni ne estas rekte informitaj pri tio! Gravega preterlaso!

Mi neniam sufiĉe laŭte diros ke tiaspecaj informoj gravegas por ni kaj ke la plej eta indico estas ege valora.

Fakte, mi rilatiĝis rapide kun la gasteizaj amikoj kaj sukcesis rabi la kaŝitajn informojn por vi, kaj vi ne bedaŭros ilin!

Ni vere aprezis la muzikon de **Blus-Haltejo**; ili sendis al ni ok-titolan demo-kasedon en la hispana kaj tri-titolan prov-demon en esperanto.

Blus-Haltejo per sia ekzisto plenigas lokon en nia espo-kulturo ĉar ili alportas al ĝi muzik- kaj kanto-stilon novaperintan (por esperanto, mi precizigas).

Blus-Haltejo plaĉegos al tiuj kiuj ŝatas rokon kun tiuj blusraspaj melodioj kaj voĉo – ili tion bonege sukcesas.

La grupo surpiediĝis en 1991 per la kuniĝo de kvar uloj kies jaz-tendencoj similis. **José** RODRIGUEZ (elektra gitaro), **Angel** LOPEZ (drumo), **Javier** FERNANDEZ (**"Txubio"**) (basgitaro), kaj **Jhonn** ROBLES (saksofono).

Tiel la unua repertuaro de la tiama grupo konsistis el "normaj" kanzonoj de diversaj aŭtoroj blusaj kaj latin-amerikaj.

En tiu periodo la bando koncertis en bus-haltejo favore al okupo de iama kazerno de la *Guardia Civil* (hispana policaĉo). De tiam ekestis la nomo **Parada de Blus** (*Blus-Haltejo*).

Kiam alĝustiĝis la repertuaro, **Blus-Haltejo** ekkoncertis (15 koncertoj dum tri monatoj) ĉe haloj kaj kluboj.

En 1991 la saksofonisto iris al Barcelono por pludaŭrigi sian muzikklerigadon.

Tiam la grupo (triope) ekverkis proprajn komponaĵojn, muzikojn, kaj tekstojn (en la hispana), sen forgesi la kunfandiĝon de la ĵaz-bluso kaj latinaj ritmoj, tamen survoje al pli rokemaj kadencoj.

Fine de 1992 aliĝis al la grupo la kantisto **Alfonso** ANDIKOETXEA.

La nova teamo prezentiĝis unuafoje en makrokoncerto en Gijón (Asturio, Hispanio) subtene al juna nesubmetito (militservo-rifuzinto).

En 1993 la taskoj kaj iniciatoj svarmas. En januaro **Blus-Haltejo** surbendigis tiun ok-titolan demon. Krome la bando koncertadas. Meze de majo ili faris turneon tra Germanio (Saarbrücken, Lübeck, Hamburg, Berlino), kaj Kopenhago en Danio (bedaŭrinde ne en KEF).

Somere ili koncertis en Galegio, Valencio, kaj Madrido.

Dum septembro **Blus-Haltejo**, kies kantisto estas esperantisto, surbendigis tri-titolan prov-demon por partopreni la kompilaĵon kiun produktos **Vinilkosmo**.

Ilia kariero ŝajnas promesplena por la estontaj jaroj. Bonvenigu **Blus-Haltejon** en la vico de la jam ekzistantaj espo-rokbandoj kaj instigu ilin verki abundajn kvalitajn espo-kantojn kiujn ni ĉiuj, espereble, povos baldaŭ ĝui.

Ŝajnas ke la bando emas vojaĝi, kaj se Alfonso pretas investi sian tempon por esperanto-kreado, **Blus-Haltejo** rapide famiĝos en Espio, kredu min!

Kuraĝigu kaj faru proponojn al la bando skribante al jena adreso:

Alfonso ANDIKOETXEA ALONSO
Placa del Dantxari 5, 1 derecha
E-01006 VITORIA-GASTEIZ (Alava)
Eŭskio/ Hispanio
Tel: +34 (45) 14.82.25

■



Blus-Haltejo

Tutmonda ? Muziko

INTERVJUO



Intervjuo kun Gunter KOCH

*Rok-gazet': Multaj homoj jam konas la germanan muzikgrupon **Tutmonda Muziko**, sed mi ŝatus scii iom pli pri ĝi kaj la kialojn pri la kantado en esperanto.*

Gunter KOCH: Antaŭ 10 jaroj mi eksciis pri esperanto en ekspozicio TNT en Stutgart kie la loka esperanto-grupo sin prezentis. La ideo tre plaĉis al mi kaj mi fariĝis membro de la esp-asocio por helpi la ideon per mia mono. Mi restis pasiva dum 5 jaroj sed mi serĉis eblecon por pli aktive subteni esperanton.

Mi tre ŝatas muzikon kaj mi pensis agadi en tiu kampo kvankam mi nek kantas nek muzikas. En 1991 mi renkontis **Rainer CONRAD** en Frieburg en polica lernejo ĉe la kurso pri komputiko; li, kiel mi, laboras en la komputika sekcio de la polico sed en alia urbo. Tiam Rainer rakontis al mi pri lia muziklaboro, ke li faras muzikon kaj eldonis diskon kontraŭ drogoj por la polico.

Mi klarigis al li mian ideon pri esperanto kaj li tre ŝatis ĝin. En la sama nokto li komponis la melodion de la kanto "Esperanto". Tuj naskiĝis la ideo produkti albumon, kaj revenante hejme Rainer komponis aliajn muzikmelodiojn.

Mia esperanto-scio ne sufiĉis por traduki tekstojn aŭ verki originalajn tekstojn en espo, cetere Rainer ne konas espon. Tiel mi serĉis homojn por traduki la tekstojn kiujn verkis Rainer en la angla – ĝi ja estas la plej uzata por muziko en la mondo, do internacia. Fakte la angla lingvo tre taŭgas por muziko ĉar ĝi havas mallongajn vortojn.

R-g: *Ĉu laŭ via sperto, estis pli malfacile kanti en esperanto ol en la angla?*

Gunter: Estis tre simile kaj facile, kvankam Rainer kaj **Karin** ne parolas espon – ili kutimas kanti angle.

R-g: *Kiel ili sukcesis kanti esperante? Kiu instruis al ili la prononcadon?*

Gunter: Karin aĉetis libron kaj kasedon por lerni, kaj amikoj esperantistaj de Singelfingen kaj aliaj urboj helpis, ili ankaŭ venis al la studio por helpi kaj doni konsilojn.

R-g: *Do tiel via projekto efektiviĝis. Kiom da KD-oj (kompakt-diskoj) kaj kasedoj vi eldonis?*

Gunter: Mi eldonis 1.000 KD-ojn kaj 3.000 kasedojn. La KD-oj preskaŭ elĉerpiĝis, sed mi disvendis nur 150-on da kasedoj.

R-g: *Antaŭ eldoni tiom grandan kvanton, ĉu vi ne povis kontakti aliajn espo-muzikgrupojn por scii laŭ ilia sperto kiom estus bone eldoni?*

Gunter: Mi havas ideojn kaj mi produktis la albumon sen pensi la eblecojn en la merkato. Mi nur volis plifamigi esperanton. Ĉar en Germanio espo ne estas tre konata. Fakte mi devintus tion pripensi antaŭe ĉar nun restas en mia kelo pli ol 2.000 kasedoj kiuj malfacile disvendiĝas.

R-g: *Tio kostis multege ĉu ne? Kiu helpis vin por pagi tion?*

Gunter: Tion mi faris per mia mono, mi havas sufiĉe da mono por vivi, mi ne havas grandajn elspezojn kaj mi ne vivas lukse. Do mi dediĉas la monon por mia hobio.

R-g: *Vi faris tion por via hobio, sed ĉu ankaŭ Rainer kaj la aliaj faris tiel?*

Gunter: Mi pagis ilin. Tio kostis 12.000 DEM. Mi devis pagi ankaŭ la studion **New Line** kie ili surbendigis, kaj mi devis pagi krome la produktadon de la KD kaj kasedo. La tuto kostis 20.000 DEM.

R-g: *Sed pere de la disvendado de la KD, ĉu vi ne sukcesis kovri tiujn kostojn?*

Gunter: Mi donacis 400 KD por la germanaj radio-stacioj kaj la internaciaj radio-stacioj kiuj dissendas espo-programojn. Do restis por disvendi 600 KD-oj, tio signifas ke apenaŭ la duono de la kostoj estas kovritaj. La kasedoj ne disvendiĝas – neniu plu volas aĉeti kasedojn en Germanio, ĉiuj volas KD-ojn. Ankaŭ mi suspektas ke multaj kopiis kasedojn pere de la KD-oj.

R-g: *Jes, malfacila afero. Sed ĉu tiu sperto seniluziigis vin?*

Gunter: Ne, mi pensas ke ne.

R-g: *Ĉu vi pretas fari alian produktadon en esperanto?*

Gunter: Mi ne scias, nun mi ne havas multan monon. Kaj mi produktas ankaŭ alian rok-bandon kiu nomiĝas **Fools Garden**. Mi jam produktis du KD-ojn de tiu grupo.

R-g: *Fools Garden kantas angle, ĉu ne?*

Gunter: Jes, kompreneble. Kaj pro tio ke mi produktas ankaŭ tiun grupon, mi ne havas sufiĉe da mono por produkti alian KD-on en esperanto.

Mi havas la titolon "Esperanto" ankaŭ en la germana lingvo, kaj mi ŝatus eldoni tiun germanan version sur kompaktdisketo kun du aŭ tri aliaj titoloj en espo, ĉefe por Germanio kaj la radio-stacioj. Mi pensas ke la kanto "Esperanto" tre taŭgas por radio; por tion sukcesi mi serĉas nun diskeldonejon kiu pretus ĝin eldoni.

R-g: *Ĉu vi havas pliajn planojn?*

Gunter: Unue mi devas disvendi la kasedojn por rehavi la monon investitan; nur poste mi povos produkti novan albumon en esperanto, sed laŭ aliaj kondiĉoj.

R-g: *Kiuj kondiĉoj?*

Gunter: La kostoj estis tro altaj por la unua; mi serĉos muzikistojn inter mia amikaro kiuj konsentus muziki por tiu ideo senprofitcele.

R-g: *Ĉu Fools Garden?*

Gunter: Mi ne scias. Kial ne?

R-g: *Ĉu tiam la nomo de la grupo estos **Tutmonda Muziko**?*

Gunter: La titolo de la unua KD estas *Tutmonda Muziko* kaj la nomo de la grupo estas **Esperanto**. Tio signifas ke la nomo ankaŭ de la venonta grupo estos **Esperanto**, nur la titolo de la albumo ŝanĝiĝos.

Mi ŝatas esperanton, kaj la nomo estos ĉiam **Esperanto**.

R-g: *Do, fakte la grupo estas vi kaj muzikistoj ludis por vi. Vi estas la animo de la grupo, ĉu ne?*

Gunter: Mi estas nur persono, la produktaĵo estas esperanto, kaj mi esperas ke esperanto estos tre fama estonte. ■



Tutmonda Muziko: *Esperanto*

MALROK-muziko

Kantoj de l' popolo

•Raportas Ĵak Kobel

Joachim GIESSNER el Germanio havis la ideon esperantigi slovakajn popolkantojn. Li produktis albumon kasede kaj kompakt-diske kiu estis surbendigita en la sonstudio de Team' en Slovakio.

Tiu albumo estas disigita en du tre malsamajn partojn.

La unua parto (unua flanko de la kasedo) aŭdigas Kečka-n, slovakan popolan ensemblon. Interese sperte kaj kvalite sonas tipaj tradiciaj instrumentoj (blovaj kaj kordaj). La kantoj estas dediĉitaj al amato aŭ amatino, ankaŭ al la mez-slovaka regiono, monta, vala, arbara, rivera. Agrabla muziko en kiu ofte la voĉoj kaj instrumentoj sonas unusone.

La duan parton (duan flankon de la kasedo) mi preferas: temas pri la miksita ĥoro **Cantica**, kiu prezentas popolkantojn.

La voĉoj estas belegaj kaj muzikege miksiĝas. La rivero fluas tra la arboj kaj apartigas la geamantojn. Titolojn de kantoj donas arboj: acero, avelarbo, nuksarbo. Tiu ĉi freŝa malrokmuziko (klasika) estas rekomendinda al ĉiuj.

Ĉiuj kantoj estas en esperanto, entute 27 muziktitoloj kies daŭro estas ĉirkaŭ po 2-minutaj, profesie kaj altkvalite produktitaj. La KD haveblas ĉe **Vinilkosmo** sub referenco VKKD8 kaj la kasedo VKK19. ■



Muzika jubileo

•Raportas Sonja Tiĥova

En 1993 la esperantistoj-muzikistoj festas la 30-jaran jubileon de Muzika Esperanto-Ligo (MEL). Jubileulo estas ankaŭ la prezidanto de MEL, Dimitâr TERZIEV, naskita la 16an de marto 1923. Tiuokaze mi intervjuis lin.

Sonja: *Kara prezidanto, kiel vi fartas ĉi-jare, kiam koincidas la jubileo de M*EL kaj la via?

Terziev: Por mi la jaro 1993 estas jaro de jubileoj -- MEL estiĝas 30-jara, ankaŭ mia filino **Snejina** estiĝas 30-jara, kaj mi 70-jara. Mi amas mian filinon, sed ne pli malmulte mi amas mian amatan MEL-on, al kiu mi dediĉis jam sep jarojn kiel prezidanto. Mi renkontas la jubileon de MEL per eldonoj: elektitaj artikoloj en *Esperanto* kaj *Muziko*; libro *Kuniĝu ni en kant'*, kun partituroj kaj voĉpartioj aparte de dek du kantoj, kiuj troviĝas en la kasedo kun la sama nomo. La tria libro kiun ni eldonis okaze de la jubileo estas *Muzika Terminaro* de M.C. BUTLER kaj F. MERRICK kun alfabeta indekso de **David G. HILL**.

La MEL-jubileon ni festis unue en Bulgario dum la tradicia "Tilia Vespero" en Stara Zagora por la bulgaraj esperantistoj-muzikistoj la 19-an de junio, kaj en julio en València por la esperanto-muzikistoj el la tuta mondo dum la 78-a UK.

Sonja: *Rakontu ion pri via propra vivo.*

Terziev: Mi naskiĝis en la urbeto Carevo ĉe la Nigra Maro sude de Burgas. Mi studis en Plovdiv, kaj en Sofio mi studis muzikon en la Muzik-Akademio. Kiel muzik-instruisto mi laboris en Burgas kaj en Sofio kie mi estis metodisto.

Mi fondis **Sofian Esperanto-Ĥoron** en 1978, kaj en 1980 fondis **Internacian Esperanto-Ĥoron** en Stokholmo dum la UK.

Sonja: *Kio instigis vin lerni esperanton?*

Terziev: Kiel ankoraŭ juna muzik-instruisto en mia naskiĝurbo, en mia kabineto mi metis sloganon "La muziko estas la lingvo por ĉiuj popoloj" sub la portretoj de famaj muzikistoj **Mozart, Beethoven, Ĉajkovskij, Dvorák**, k.a. Venis kolego, instruisto pri la franca lingvo, kaj leginte la sloganon demandis min: "Ĉu vi ne scias ke ekzistas ankaŭ lingvo por ĉiuj popoloj nomita esperanto?" Li konatigis min kun tiu internacia lingvo. Ni eĉ sendis leteron al kolego-instruisto en Anglujo. Poste kiam mi estis studento pri muziko en Sofio, profesoro **Stojan ĜUĜEV**, kiu instruis al ni bulgaran popolmuzikon, instigis min lerni esperanton por povi kontakti kun kolegoj diverslande.

■

La 70-jaran jubileon de s-ro **TERZIEV** oni festis en Sofio en marto. La Esperanto-Ĥoro plenumis liajn esperanto-kantojn, kaj esperanto-lernantoj el sofia lernejo kantis por li. Estis salutoj, donacoj, floroj, kaj telegramoj de esperantistoj en Bulgario kaj de geĥoranoj de la Internacia Esperanto-Ĥoro el eksterlando.

La 19-an de junio en Stara Zagora ni festis la 30-jaran jubileon de **MEL**. Koncize pri MEL rakontis ĝia prezidanto **TERZIEV**. La partoprenantoj en la muzika seminario de la 12-a ĝis la 20-a de junio, plenumis programon de esperanto-kantoj. La etoso estis tre amika kaj ĉie ŝvebis la "**tilia aromo**". ■

MALROK'

Espo-ĥor-estrado

La greka ĥorestro, Kostas ZAĤARAKIS, praktikas de 1971, kaj en espo-medio de 1985.

Li organizas klasikformajn, geajn kvarvoĉajn ĥorojn dum espo-renkontiĝoj. La temoj kutime estas relative simplaj: popolkantoj, originalaj kantoj, ktp., sen aparta stilo.

Jam sufiĉe fama en la junulara espa medio estas Kostas, ĉar li partoprenis kaj koncertis dum la 41-a, 42-a, 43-a, 44-a, 45-a IJK-oj, en IJS 91 kaj 93, kaj en IS 87 kaj 88.

Ŝajnas ke neniu kasedo aŭ disko estis planita sed instigo povas doni emon, ĉu ne...? Provu!

Kostas ZAĤARAKIS
Pl. Argentinis Dimokratias 16
GR-114 72 ATHENAI
Grekio
Tel: +31 (1) 64.68.885

Nederlanda lirika duopo

La duopo **Edward HOEPELMAN** (tenoro) kaj **Saskia VEEN** (harpo) profesie muzikas de 1984. Ili koncertas precipe en esp-aranĝoj: UK, SAT-kongresoj, SAT-Amikaraj kongresoj, kaj naciaj esp-aranĝoj.

Temas pri klasikaj (malrokmuzikaj) recitaloj miksitaj kun iom da folklormuziko. Kasedo de ili estis eldonita de asocio **Kordo** en Rotterdamo en 1990. La duopo kontakteblas ĉe

Saskia VEEN
Reitzstraat 101
NL-1091 ZA AMSTERDAM
Nederlando
Tel: +31 (20) 69.39.845

Sankta-peterburga brava bardo

Mikaelo BRONŜTEIJN estas 45-jara rusa espo-bardo kiu kantas de 1975. Li partoprenis gravajn esp-aranĝojn kiel ekzemple UK-on en Vieno kaj Valencio, SEF-kongreson en Uppsala, IJS-on, ktp. Li surbendigis du kased-albumojn en **Piĝo-studio**: *Rememoru kun bruna ŝtono* decembre 1992 kaj *De tempo al tempo* junie 1993.

Liaj kasedoj *[ni ankoraŭ ne ricevis ilin por recenzo! Ndlr]* mendeblas rekte ĉe li:

Mikaelo BRONŜTEJN
6 Mikrorajon 1-17
TIĤVIN, St-Peterburgskaja obl.
Rusio
Tel: +812 (67) 26.093

Siberia kantistino

Tatjana kantas espe de 1991 kaj multe penas por verki kaj traduki popolajn kantojn en espon. espo-kanzono kun propra gitarakompano ebligis al **Tatjana** turnei en Svedio, Polio, kaj Rusio. En 1992 ŝi ricevis la 3-an premion de tutlanda kultura espo-festivalo. Ŝi planas surbendigi sian unuan kasedon. Pliaj informoj haveblas ĉe

Tatjana VINOGRADOVA
RUS-634029 TOMSK
ul. Gogolia 24, KV 9
Siberio, Rusio

Espo-komponaĵo el Germanio

La germana komponisto **Franz-Georg RÖSSLER** verkis espo-komponaĵon kies nomo estas *Evoluo* laŭ teksto mendita de **Rikardo ŜULCO**. La temo estas tre aktuala: minaco de la homa ekzisto en la kosma evoluo. La ĥoro **Figuralchor Mainz** gvidata de **Stefan WELLER** kantis ĝin en sud-germana radio, SWF en Majenco, kiu disaŭdigis ĝin. Surbendigo de kasedo kun *Evoluo* estis realigita. Pliaj informoj ĉe:

Franz-Georg RÖSSLER
Am Mönchsbusch 6
D-6724 DUDENHOFEN
Germanio

Espa himno far la ostenda ĥoro

Flory WITOECKT kantas en la ostenda ĥoro **Tonadiores** kaj instigis la ĥoron kanti espo-kantojn. S-ino **Thonon**, la estrino kaj loka famulino en muzikaj medioj en Ostend, konsentis aldoni al sia programo la kvarvoĉan himnon *La Plenumo*. La tekston verkis **William AULD** kaj la muzikon **Crawford GATES**.

La Plenumo

En ĉiu lando, ĉiu ŝtato, dediĉite
kaj defie
Troviĝas la konantoj de l' komunikilo homa;
Ni avangardas mondon, kie la homaro ĉie,
Parolos senkatene en komuno idioma.

La majstra revo estis prava, disvolviĝis la realo;
Ne vana estis fid' de l' pioniroj kaj martiroj,
Ĉar ni hodiaŭ amikiĝas unulingve en egalo,
Kaj spertas jubilante plenumiĝon de l' aspiroj.

Nacioj de la mond', atentu! Paca kunlaboro eblas,
Sen ombroj de suspekto, nekompren', kaj vort-obstaklo;
En mateniĝo de la mondo, nia arda flam' ne feblas,
Sed lumas jam konstante kiel signo de l' miraklo!

Albiano, brusela gurdisto

Renaud de SAINT MOULIN, kies artista nomo estas **Albian**, parolas espon. Li estas stratmuzikisto tre konata en la turistaj kvartaloj de Bruselo. Li akompanas sin per gurdo kaj akordiono. Plurfoje li turneis en Japanio kunlabore kun la belga turisma servo. **Albiano** preparas diskon, sed ĉu estos en ĝi espo-kanto? Sugestu tion al li.

Albian
Rue des Pierres 14
B-1000 BRUXELLES
Belgio
Tel: +32 (2) 502.21.07
(Laŭ informoj de Herman DECEUNINCK) ■

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 74 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubriko, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anonceloj, ŝak-problemoj, foto-filmo, "Mallonge", ktp

Jarabono: 26,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro
Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA
(50 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via F. Sandre 15, IT-10078 Venaria Reale (TO), Italio
Redaktorino: Ada Fighiera Sikorska

MALROK'

AKORDO

Flo: Rineke HOENS, kio estas Akordo — ne nur vi, ĉu?

Rineke: Certe ne nur mi, ĉar mi sola ne povas kanti akorde, ĉu? Ni estas sepopo, nederlandanoj kiuj loĝas dise en la lando. Temis pri amikaro kiu vidis unu la alian nur je renkontiĝoj, naskiĝdatrevenoj, ktp. Sed ĉiuj emas kanti, kaj ni decidis kunveni speciale por kanti kaj por serĉi kantojn. Kaj tiel naskiĝis **Akordo**.

Membras **Saskia** IDZERDA, **Ineke** BOURGUIGNON-SLIS, **Rineke** HOENS, **Marwine** VAN DER MOLEN, **Sandor** VAN HUIJZEN, **Arjen-Sjoerd** DE VRIES, kaj **Danny** TEN HAAF. Mankas nur **Paul** DRENTH, kiu estas la manaĝero, kuiristo, kaj... kriulo de la grupo, kaj **Roel** HAVEMAN, la majstro-tradukisto. Nia meza aĝo estas dudek-naŭ-jara.

Ni serĉas tenoron! Ni havas tri sopranojn, unu aldon, kaj nur unu tenoron. Tio estas problemo, ĉar ni bezonas alian tenoron! Oni povas kontakti nin....

Flo: Instrumentoj luditaj...?

Rineke: Neniu instrumento ludita, krom por ranto-kantojn, ĉar mi daŭre havas la senton ke ni kantas tion kion ĉiuj aliaj kantas. Sed iu devas verki la kantojn, kaj mi mem ne estas verkisto. Ni povus alvoki homojn kiuj povus verki kaj ĉefe komponi kantojn.

Flo: Ĉu vi planas iam aldoni instrumentojn al via muziko?

Rineke: Do, unue ni devus trovi iun kiu instrumentas, ĉar neniu el ni ŝatus fari tion — ni volas nur kanti. Ni foje provis ion per tamburado aŭ alia simpla akompanado por pliriĉigi la aferon, sed ofte ni simple forgesis fari tion — tio indikas la relativan gravecon kiun ni donas al instrumentoj. Kaj jam estas tiom da grupoj kiuj uzas gitaron. Pli originale estus piano, sed pianon oni ne povas kunporti, kaj buŝon oni ĉiam kunhavas!

Flo: Kiajn spertojn vi ĝis nun havis?

Rineke: Ĝis nun, ni plejofte kantis en Nederlando, en lokaj grupoj kaj kongresoj. Ni kantis ankaŭ dum la **Internacia Seminario** en Kuxhaven.

Flo: Ĉu vi planas surbendigi viajn kantojn?

Rineke: Ni povas sendi simplan surbendigaĵon al homoj kiuj interesiĝas pri ni... sed malbonkvalitan, mi devas averti.



serĉi la akordojn, kiam ni preferas uzi pianon, sed povas uzi iun ajn klavaron.

Flo: Kion vi faras? Se ne temas pri instrumentoj, temas pri buŝoj, ĉu ne?

Rineke: Ekzakte, temas pri buŝoj. Ni kantas. Ni kantas kvar-, eventuale tri-, espereble plur-voĉe, konatajn kaj malpli konatajn kantojn kiujn la grupanoj mem alportas. Iu diras: "Mi havas belegan kanton, ni kantu ĝin!" Plejofte necesas esperantigi la kanton.

Flo: Vi kantas a capella, kompreneble, sed kiajn stilojn?

Rineke: Mi pensas ke la plejmulto estas malroka. La plej malnova kanto estas de la dek-sepa jarcento, kaj la plej nova estas de nun. Do ni kantas ankaŭ modernajn kantojn. Ekzemple, ni kantas *"Scarborough Fair"*, laŭ traduko de **Bertil**, sed kun la kantiklo kiun ni mem tradukis; "Vincento"-n, aranĝitan de Danny; "Memoroj"-n.... Mi timas ke tiuj estas la plej modernaj pop-kantoj kiujn ni kantas. Ni kantas ankaŭ popolajn kantojn, balkanajn, afrikajn, ktp.

Flo: Ĉu vi planas fari originalajn kantojn?

Rineke: Ni ŝatus fari vere originalajn espe-

Flo: Sed pri profesia surbendigo...?

Rineke: Tio estas bona ideo!

*Flo: Se anoj de **Akordo** venas de malsamaj lokoj en Nederlando, kiel do vi laboras — per telefono?*

Rineke: Unue, tio estus ne praktika, kaj ne amuza. Do, ni kunvenas kvin- aŭ sesfoje jare, laŭ tio ĉu ni havos prezenton. Kaj tiam ni kunvenas kompletan semajnfinon, en mia domo en Enschede, ĉar tie estas piano, loko por dormi — kaj tie estas la kuiristo!


Flo: Kiajn planojn vi havas?

Rineke: Ni certe ŝatus denove iri eksterlanden kun la grupo, ĉar en Nederlando preskaŭ ĉiu jam aŭdis nin, kaj ĉar niaj kantoj estas neoriginalaj kaj do konataj. Do, ni serĉas publikon eksterlande. Kompreneble, tio havas komplikan faktoron: trovi tempon vojaĝi, pagi ĝin, ktp. Sed ni ja ŝatus. Estas la emo, sed... kien? kiel? kiam?

Flo: Ĉu tio estas alvoko?

Rineke: Fakte, jes!

*[Vidu la adreson en **Haste-Klaĉe**.]* ■



al PIV!

jes, abonante *KONTAKTO* por 1994 vi havos la ŝancon gajni ***Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto***! TEJO lotumos ĝin inter ĉiuj abonantoj kaj junaj membroj en la 50-a IJK en Ch'onan, Koreio. Ankaŭ aliaj premioj atendas.

Ne perdu ĉi tiun ŝancon!

ABONTARIFO 1994

Lando/valuto


Aŭstralio/dolaro	30	Francio/franko	125	Nederlando/guldeno	40
Aŭstrio/ŝilingo	240	Germanio/marko	37	Norvegio/krono	145
Belgio/franko	755	Hispanio/peseto	2100	Pollando/guldeno	19
Brazilo/guldeno	19	Israelo/guldeno	31	Portugalio/eskudo	2300
Britio/pundo	14	Italio/liro	29 000	Svedio/krono	160
Danlando/krono	150	Japanio/eno	2880	Svislando/franko	31
Finnlando/marko	115	Kanado/dolaro	27	Usono/dolaro	21

Ni invitas vin

al TEJO/KER-seminario en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo (Francio)


de la 01a ĝis la 08a de majo 1994

"Trans la limoj de Eŭropo – la eŭropa kontribuo en la hodiaŭa mondo"



Petu aliĝilon ĉe:
Lucie Kreŝova, Tylova 1262
CS-50801 Horice v Podkrkonoŝi

Itala Esperantista Junularo
18a Internacia Junulara Festivalo



Narkotaĵoj en la 90aj jaroj

Montara restadejo de Pracatinat
(7 km de Fenestrelle, province de Torino)
☎ 0121-83880
De la 30a de marto
ĝis la 5a de Aprilo, 1994

Aliĝilojn kaj informojn vi povas peti de:
Matilda Molina, via Ventimiglia 204
I-10126 Torino, Italio

TUTE NE grava

SEN PACO MUZIKO NE ĜUEBLAS

•**Raportas** Ĵerom' (trad. Flo)

De jam dua vintro estas milito en Bosnio kaj daŭre la samajn hororajn scenojn dissendas televido: unuflanke homoj kiuj mortas sub obusoj, dum aliaflanke la "ĉefoj" dispartigas la pecojn de la jugoslava federacio kun la beno de la grandaj eŭropaj potencoj kiuj diskrete daŭrigas la armil-vendadon al la atakemaj militistoj. Negoco estas neĉgoco, ĉu ne?

Kiel esperantistoj kaj muzikemaj rokuloj, ni ne povas resti indiferentaj antaŭ tio. Se ni emas rompi la lingvo-barilojn, estas oportune simple rompi ankaŭ la landlimojn. Ni ne detalumos pri la eventoj, ni ilin tro konas. Eksterpolitika organizaĵo, la *Anarkiista Federacio*, kies idealo iom alproksimiĝas al la espista (la anarkiistoj volas abolicion de la ŝtatoj kaj landlimoj) lanĉis en januaro 93 "Alvokon por Tuja Paco" kiun ni prezentas al vi ĉi sube. Ĝi pripensindas!

Alvoko por tuja paco!

Ĉi tiu alvoko ne nur enkalkulas la eventojn kiuj sangigas eks-Jugoslavion, efektive ĝi transiras tiun simplan kadron.


La situacioj de "jam plenumita fakto" kiujn oni devas tro ofte konfronti, utilas nur por devigi nin fari iluziajn elektojn. Elektoj kiuj finfine ne estas elektoj! Milito "por atingi pacon" estas malnova rediraĉo konstante ripetita de la ŝtatestroj. Pro tio ni lanĉas alvokon por ke tuj ĉesu por ĉiam tiuj kulpigo-provoj tre ofte uzitaj de la regantoj.

• Fidele al niaj pacifistaj kaj kontraŭmilitistaj engaĝiĝoj, ni vokas vin por uzi ĉiujn rimedojn por ke bomboj, pafiloj, kaj fajro ne plu estu utiligitaj kiel konflikt-solvo.

• Al la nova monda ordigo, nova elemento aldoniĝas: la **humana** militista interveno. Estas tempo por ke ĉesu tiu hipokriteco kiu, pretekste de justeco por enmiksiĝ-rajto, kondukas iom post iom al kio estas la sola elirejo de la jugoslava problemo: **milito** (kontraŭ kiu?) por regigi **pacon** (de kiu?).

• La ideo pri justa, pura, kaj humana milito provas trabori al si vojon, sed tuj kiam senvualiĝas hipokriteco, nur restas faktoj: milito estas naŭzega kaj murda! Ĝi nepre kuntrenas sian sinsekvon da abomeno (seksperfortoj, koncentrejoj, murdado de viroj, virinoj, kaj infanoj). Finfine la popolo kiu troviĝas en la malĝusta flanko de la pafilo eklernas ke la ŝtatestroj retroviĝas en Ĝenevo aŭ aliloke por subskribi "packontrakton".





• Rimarkindas ke estas tiuj (la ŝtatestroj de ĉiuj flankoj) kiuj eksplodigas tiajn konfliktojn, kiuj ebligas la armiltrafikojn, kaj poste proponas **humanan** milit-intervenon kaj sanitaran helpon.

• Memoru ke usonanoj, sovetianoj, francoj, ktp. praktikis imperialisman enmiksiĝon en iama Indoĉinio, Vietnamo, Ĉado, Ĉilio, Afganistano, ktp. Tiuj milit-intervenoj neniam koncernis la plibonigon de la sociaj vivkondiĉoj de la popoloj tiel-nomate "defenditaj".

• Ni volas reelvoki al vi ke la unu-nura maniero por prepari universalan pacon konsistas el: unuflanke, forpuŝi definitive militon, naciismon, rasismon, kaj aliflanke, konstrui ekde nun mondon homskalan, bazitan sur libereco, socia egaleco, kaj interhelpo.

• Por atingi tiun celon kaj ĉesigi ĉiujn nunajn konfliktojn, ni postulas:

- Tujan ĉesigon de internacia armiltrafiko.
- Rekonverton de la armilindustrio.
- Rekonon internacian pri militrifuzo (konscienca objetado) senkondiĉe.

Por konkludi, ni certigas ke nia engaĝiĝo pri la ĉi-supra alvoko ne estas simpla subskribo. Simple estas profunda kaj konkreta atesto de nia volo por uzi ĉiujn rimedojn por ke finfine pacifismo kaj kontraŭmilitismo estu referencaj valoroj de ĉiuj niaj agadoj nunaj kaj estontaj.

• **Anarkiista Federacio**
Parizo



GRAVEGE!

Vinilkosmo-kompilaĵo

En la 5-a *Rok-gazet'* vi certe legis la "**Gravan alvokon**" en kiu ni anoncas ke **Vinilkosmo** planas produkti gravan kompilaĵon kasede kaj kompakt-diske.

La projekto pli kaj pli konkretiĝas, pluraj muzikgrupoj respondis al la alvoko kaj pretas partopreni la kompilaĵon. Ni jam elektis por ke ili estu prilaboritaj. Ni proponis al kelkaj konataj neespaj rokbandoj, kaj ili interesiĝas pri la ideo kanti espe "papage" por la okazo, subtene. Ekz-e: **Les Ablettes (La Alburnoj)**, **The Fabulous Trobadors**, **Tutti Futti**, **Zahra**, **E.V.**....

Jam titoloj pretas de la **Rozmariaj Beboj**, **Bruemaj Najbaroj**, **Amplifiki**, **Persone**, **Vladimir SOROKA**, **Andreo kaj Natalija BERCE**, kaj surprizo....

Blus-Haltejo proponis al ni tri titolojn; ili surbendigos la elektitan pecon, kiel ĉiuj aliaj kiuj promesis sendi titolprojektojn. Ni citu: **Kajto**, **Ĵomart kaj Nataŝa**, **Flávio FONSECA**, **Solo**, **Team'**, **La Mevo**, **Pixamandurries**, **Akvo**, kaj **Ĵak YVART**.

Ni atendas respondojn de multaj aliaj bandoj kaj kantistoj, inter ili: **Torino**, **Kredo**, **Sen Nomo**, **Akordo**, **La Bleka Forfikulo**, **Espero**, **Roman BURA**....

Do, ŝajnas ankoraŭ ke aliaj muzikgrupoj kaj gekantistoj ŝatus partopreni la kompilaĵon per unu nova espo-titolo neeldonita kaj ne reeldonota en Espio.

Unue ni planis 15-on da muzikbandoj kaj kantistoj, sed se tro da artistoj sin proponas (tio estus bonega!), ni povus antaŭvidi du-voluman kompilaĵon, unu pli roka kaj alia pli popa kaj kanzona. Tiu kompilaĵo respegulos la aktualan rok-, pop-, folk-, kaj kanzon-muzikon en espo, kaj celos prezenti diversajn esp-artistojn. Kompilaĵo tre utilas por radio-stacioj, por novaj espistoj kiuj ne havas espo-muzik-referencojn aŭ konojn, kaj por neespistoj kiuj povos per unu aŭ du diskoj/kasedoj havi ideon pri espo-muziko. Tio povos doni al ili ankaŭ emon pli funde konatiĝi kun la verkoj de tiuj artistoj.

Por produkti tiun kompilaĵon, **Vinilkosmo** bezonas partnerojn kiuj povus alporti subtenon per monsumoj kiel "sponsoroj" (patronoj), sed ni serĉas ankaŭ organizojn kiuj pretas subvencii la projekton. Por fini, ni petas viajn individuajn subtenojn. Ĉi-kune vi trovos antaŭmendilon, kiun vi povas multobligi kaj disdoni al viaj amikoj, familianoj, najbaroj, ktp. Vi povas ĝin ankaŭ traduki nacilingve. Resendu ĝin al ni kun la indikita monsumo por antaŭaĉeti la kompilaĵon. Same ni faris por la unua kompildisketo kun **Amplifiki** kaj la **Rozmariaj Beboj**, kiun ni eldonis en 1990. Antaŭmendante la kompilaĵon nun, vi pagos ĝin malplikoste kaj vi ricevos ĝin la unuaj. Fakte vi estos la unuaj aktivaj partneroj de la projekto. Ĝia antaŭvidita apero estos proksimume aŭtune 1994.

Ni atendas vin multnombraj. Ne forgesu ke vi povas antaŭmendi ankaŭ stoketojn por viaj espo-kluboj, ke tiu kompilaĵo estos tre utila por varbi pri espo ĉe radio-stacioj, kaj ke ĝi estas bela donaco por gejunuloj, gekorespondantoj, kaj....

Antaŭmendu vian kompilaĵon malplikoste antaŭ ol ĝi aperos... kaj elĉerpiĝos!

Vinilkosmo

SAFT '94

Tute ne gravas

Kajto

turneo tra okcidenta Francio


•Raportas Marcel Redoulez

SAT-Amikaro decidis dediĉi 4.000 francajn frankojn (600 EKU) por ekfunkciado de speciala fonduso SAFT ("SAT-Amikara Fonduso por Turneoj"). Tial, nome de SAFT, **Marcel REDOULEZ** organizis turneon por la frisa esperantista grupo **Kajto** tra okcidenta Francio. Tiu turneo, kiu bedaŭrinde daŭris nur unu semajnon, de la 24-a de februaro ĝis la 4-a de marto 1994, ligis grupojn kiel tiuj de Nanto, Ezino kaj Cenono (ambaŭ apud Bordeo [Bordeaux]), Tuluzo, Rodezo, Limoĝo, kaj Ambuazo [Amboise].... Ni ja pli detale prezentos al la legantoj de *Rok-gazet'* la fonduson SAFT post la grava pridiskuto kiu okazos kadre de la venonta kongreso de SAT-Amikaro (paske '94 en Grésillon). Efektive tiam oni priparolos la realecon de la fonduso, (bilancon de la unua turneo), ties evoluon (malfermon?) en 1995 kaj poste. Ĉu trans la limoj de Franclingvio kunlabore kun alilandaj esp-asocioj...?

Dum tiu turneo **Kajto** prezentis al ni i.a. sian novan kompakt-diskon *Tohuvabohuo*. Iom pli ol tri mil kilometroj por sep koncertoj. Dek kvin espo-grupoj petis la koncert-dosieron. Evidente pro tiom mallonga tempo oni ne povis kontentigi ĉiujn. La bezono, la interesiĝo ekzistas. Ankaŭ la preteco. Jen bona kaj kuraĝiga pruvo. La elekto de la koncert-urboj finfine realiĝis kvazaŭ nature... pro la geografio. Ja Francio pli vastas ol Nederlando kaj tial la distancoj inter la agemaj espo-grupoj estas pli longaj. La orienta parto de la lando estas ĉi-jare "forgesita", sed ni memoros pri Gargaso (sude), Privaso (centre), kaj Metzo (norde). Ankaŭ kelkaj amikoj trans la montaro Pireneoj estis tre interesitaj... ankaŭ ili devos iom pacienci. ■

Vidu la **Alvokon pri SAFT** en Haste-Klaĉe.







Tute ne gravas

VIVU ESP-KULTURO, JA!

Intervjuo kun Eckhard Bick

Flo: *Kiu vi estas kaj kion vi faras en Danio?*

Eckhard: Mi estas germano loĝanta en Danio. Mi venis ĉi tien antaŭ ok jaroj. Mi aktivas per kaj por esperanto dum iom pli longa tempo, jam en Germanio. Mi okupiĝas ankaŭ pri kulturo – ekzemple mi kolektas ludojn kaj kantojn. Mi nun aktivas en la **Dana Esperanto-Junularo**, ekzemple ĉi tie en KEF.

Flo: *Vi jam aŭdis ke kelkaj homoj kolektas informojn pri artistoj, organizantoj, ktp. Ĉu vi povas diri kiun laboron vi faras tiucele?*

Eckhard: Jam estis pluraj provoj kolekti adresaron de kultur-uloj. Ekzemple, en la *Jarlibro* de 1992 estas listo tre malkompleta, al kiu oni referencis en la *Jarlibro* de 93, sen fari novan liston. Evidente tiaj listoj eksdatiĝas kaj neniam estas tre kompletaj. Laŭ mi oni bezonus specon de kultura adresaro, aŭ eĉ gvidlibro, por du celoj. Unue, klare prezenti la artistojn al tiuj kiuj volus aranĝi festivalon aŭ koncerton, faciligante kontaktojn. Due, ke oni havu la eblecon vidi *kiu* estas *kiu*; ekzemple, en recenzo estas menciitaj grupoj pri kiuj oni nenion scias; aŭ oni vidas reklamon pri kasedo de nekonata grupo; aŭ en prelego oni aŭdas pri nekonata artisto – ke oni povu rigardi tion alfabete ie, sen ajna antaŭscio.

Laŭ mi estas sufiĉe komplikita afero fari plenan gvidlibron pri kulturo, ĉar oni devas *pritaksi* la esperantan kulturan evoluon kaj historion. Tiel oni evidente devus diri ke io estas *grava*, alio *malgrava*, ke iu estas *bona*, alia *malbona* artisto.... Tion mi ne tiom ŝatus fari. Sed la alia flanko de la afero: difini kulturajn instituciojn, festivalojn, doni adresojn, kaj registri artistojn laŭ diversaj informeroj – tio estus ja tute ebla. Do, mi celus eldoni, kun helpo de aliaj interesitoj, liston kie aperas alfabete la artistoj, kun eventuale ties artista nomo, vera nomo, kaj kontakt-adreso aŭ referenco al kontakt-persono; poste la ĝenro – ĉu temas pri rokmuziko, poezi-deklamo, teatraĵo, ktp. -- kun iom pli detala priskribo de la stilo (kvazaŭ recenzeto); poste, se temas pri grupo, la anoj aŭ aliaj personoj; kaj fine la produktaĵoj -- tio signifus ĉe muzikisto kasedojn kaj KD-ojn, ĉe teatra grupo la efektivajn teatraĵojn pri kiuj ili sukcesis, ktp. Se oni kunmetus tion iel broŝurforme, tio povus multe helpi al la aktivigo de la esperanta kulturo, aŭ almenaŭ igi ĝin pli alirebla.

Flo: *Kiel organizonto de aranĝo povus trovi la plej taŭgajn artistojn?*

Eckhard: Laŭ mi, bona organizanto eble tamen devus peti provbendon por povi aŭskulti la muzikon, ne nur preni nomon kaj adreson el katalogo. Kompreneble, se oni volus havi veran helpon, oni bezonas tian pritakson, sed ĝuste tion mi ne volus fari, ĉu ne? Diri ke iu muzikisto estas tre profesia, alia tre amatora -- tio estas tre malfacila en Esperantujo, kie ni scias ke la plej multaj estas amatoroj, kaj ke ĉiukaze estas bone ke io entute okazas. Do, kial tiel kritiki? Estas ĝenerala malemo fari tion.

Flo: *Ĉu tio ne povus instigi tiujn kiuj ankoraŭ ne atingis tre altan nivelon?*

Eckhard: Jes, sed tio povus esti tasko de recenz-artikoloj, pli ol por kultur-adresaro, kiu devas esti pli neŭtrala. Oni povas skribi la stilon aŭ la sindifinon de la grupo, sed pli ol tio estus iom maljusta.

Flo: *Ĉu ne indus meti studiojn kaj aliajn pli teknikajn aferojn?*

Eckhard: Jes. Ĉio povus enmetiĝi: libroj kaj filmoj pri esperanto-kulturo, kulturaj revuoj, recenzoj, kaj ankaŭ radio-stacioj, studioj uzeblaj de esperantistoj, ktp. Tiam estus indekso por la gvidlibro. Unue estis la pli ĝeneralaj aferoj, eble komencante kun historia skizo, kaj fine estus la adresaro.

Flo: *Kiel eviti ke la homoj ŝanĝas sian adreson ne avertante, kiel ofte okazas?*

Eckhard: Laŭ mi, tio estas malfacile organizebla en tiel disa komunumo kiel Esperantujo. Ekzemple, ĉe grupoj oni povas iom taksi kies adreson ili donas kiel kontakt-adreson – oni povas preni tiun de la plej fiks-loĝa persono, aŭ doni kontakt-adreson de asocio – ili estas pli stabilaj, kaj pli bone prizorgas plusendon de poŝto. Ĉe unuopuloj estas granda problemo – tia listo povas facile malaktualiĝi dum unu jaro. Kaj eĉ adreslistoj kiel tiu de la UEA-komputilo estus malkompletaj rilate tion – ili eble enhavus duonon de tiaj uloj, kaj la adresoj ne nepre estus tre aktualaj. El mia propra sperto, mi scias kiom ofte oni devas sendi adres-ŝanĝiĝon al la Centra Oficejo ĝis ili finfine ŝanĝas tion en ĉiuj adresaroj.

Flo: *Ĉu vi kredas grava fari alvokon pri tio?*

Eckhard: Nepre gravas. Mi kredas ke gravas ke artistoj difinu sin mem, kaj kompreneble ili havus la plej aktualan adreson.

Flo: *Do: ĉiuj esperantistaj artistoj prezentu vin!*

Eckhard: Ili prezentu sin kun tiuj informoj kiujn mi menciis: bazaj pri ĝenro, stilo, havebleco de produktaĵoj, kaj simile. En la kadro de *Rok-gazet'* aŭ EUROKKA, aŭ rekte al mia adreso. [Vidu en **Haste-Klaĉe**.) ■







Komikso Martin Weichert

INSTRUMENTOJ KAJ ALIAJ ILOJ

de Bertilo Wennergren

PARTO 2

elektronika drumo *electronic drumset*. Speco de sintezilo, kiu faras la sonon de drumo kaj aliajn perkutajn sonojn, ludata normale ne per klavaro, sed per tambursimilaj platoj. Vd sampli, drumomaŝino.

elektronika tamburo *electronic drum*. Unuopa plato de elektronika drumo. Vd plato.

elfazigilo *phaser*. Aparato por krei elfazigon kiel muzikan efekton. Vd distordilo, eĥilo, flangilo, ĥorilo, va-va-ilo, kompresoro.

elira lineo *line out*. 1 Indiko ĉe amplifila ŝtopilingo, kies signalo estas normigite malalta. El ĝi oni prenu eliron ne rekte al laŭtparolilo, sed al alia amplifilo, ekz. tiu de la alpublika sonsistemo. 2 Indiko ĉe magnetofona ŝtopilingo, el kiu oni prenas signalon al amplifilo. Vd eliringo, enmeto, enmeta lineo, enmetingo.

enmeta lineo *line in*. 1 Indiko ĉe amplifila ŝtopilingo, en kiun oni metas eliron ne de instrumento, sed de alia amplifilo, ekz. la eliro de gitaramplifilo, kiu estu amplifota ankaŭ de la alpublika sonsistemo. 2 Indiko ĉe magnetofona ŝtopilingo, en kiun oni metas la eliron ne de mikrofono, sed de amplifilo aŭ alia aparato. Vd enmetingo, elira lineo, eliringo.

fingroplektro *finger plectrum*. Plektro, kiun oni fiksas al la pinto de fingro por ludi.

fingrotabulo *fingerboard, fretboard*. La parto de la kordinstrumenta kolo, sur kiun oni metas la fingrojn por mallongigi la vibrantan parton de la kordoj por tiel krei (fingri) la deziratajn tonojn. Vd freto, frapado.

flangilo *flanger*. Aparato por flangi sonon kiel muzikan efekton. Flango estas efekto simila al elfazigo, sed kun pli granda prokrasto, tiel ke rezultiĝas ŝajna ŝanĝiĝo de la tonalto. Vd prokrasto. Vd distordilo, eĥilo, elfazigilo, ĥorilo, kompresoro, va-va-ilo.

fluto *flute*. Blovinstrumento. Rekta tubo kun truoj kaj/aŭ klapoj. La sonon oni kreas blovante kontraŭ eĝo en truo flanka (transversa fluto), aŭ ekstremaĵa (ekz. bekfluto).

freto *fret*. Ĉiu el la suprenstarantaj linioj sur la fingrotabulo de kordinstrumento, kiuj indikas kie fingri la diversajn tonojn.

gitaro *guitar*. Tre ofta kordinstrumento normale seskorda, ludata pinĉe aŭ plektre. Vd gitarsintezilo, basgitaro, sologitaro.

gitarsintezilo *guitar synthesizer*. Sintezilo ludata ne per klavaro sed per gitaro aŭ per speciala gitarsimila ilo.

glitgitaro *slide guitar*. Gitaro ludata ne fingrante la tonojn sur la fingrotabulo, sed metante iun aĵon, glitilon, transverse sur la kordojn, glitigante ĝin supren kaj reen sur la kordojn farante glitsonojn. Glitgitaro havas ofte akordan agordon. Vd botelkola gitaro, ŝtalgitaro, pedala ŝtalgitaro.

glitilo *slide*. Ilo por ludi glitgitaron. Normale metala tubeto, tra kiu oni metas fingron, sed povas esti ankaŭ tranĉilo, botelkolo aŭ alia afero. Vd botelkola gitaro, pedala ŝtalgitaro.

gramofona disko *(gramophone) record, disc*. Plastdisko kun sono storita en kanelo. Ludata per gramofono. Ekzistas du normaj grandoj de gramofonaj diskoj: diskego (aŭ LP-disko) normale ludata je rapido de 33 turniĝoj minute kaj kun ĉ 20 minutoj da sono sur ĉiu flanko, kaj disketo normale ludata je 45 turniĝoj minute kaj kun nur kelkaj minutoj ĉiuflanke. Vd albumo, granda disketo, kompakta disko, laserdisko, kasedo, bendo, magnetofono,

gramofono *gramophone, record player*. Aparato por reprodukti la sonon de gramofonaj diskoj. Vd diskoplato, mikrofono, nadlo.

granda disketo *maxi single*. Speco de disko





por uzo speciale en diskotekoj. Havas longigitajn versiojn de furoraj disketoj. Grandaj kiel diskegoj, sed havantaj, kiel normalaj disketoj, nur unu pecon ĉiuflanke.

harmoniigilo *harmonizer.* Elektronika aparato, per kiu oni povas ŝanĝi la tonalton de jam registrita tono por krei efekton aŭ por korekti eraron.

harmoniko *harmonica, mouth organ.* Malgranda blovinstrumento kun truvico garnita per vibrantaj lamenetoj. Oni ludas ŝovante ĝin laŭ la lipoj. Dum ordinara harmoniko estas kromata, blusa harmoniko estas nur diatona. Vd akordiono.

ĥorilo, korusilo *chorus (box).* Efektilo, kiu kreas ĥorecan sonon, tiel ke unu instrumento sonas kiel pluraj. Vd prokrasto.

imita sintezilo *emulator synthesizer.* Sintezilo, kiu per la uzo de samplitaj sonoj imitas la sonojn de naturaj instrumentoj. Vd sampli.

ĵako *phono jack.* Speco de ŝtopilingo en formo de metala kava cilindreto, kutime uzata en elektraj instrumentoj, kaj en instrumentamplifiloj. Vd kenona ŝtopilingo, ino.

kabazo *cabaza.* Ritminstrumento uzata ĉefe en Brazila muziko. Ekzistas en du formoj: 1. Sekigita tenilhava kalabaso ĉirkaŭita de reto el bidoj. Oni ludas frotante la reton kontraŭ la kalabason. Vd ŝekereo. 2. (Pli moderna formo). Tenilhava cilindro kun ringaj bidŝnuroj. Ludiĝas frote aŭ frape.

kablo *cord, cable.* Metala fadeno aŭ drataro ĉirkaŭita de (plasta) izolaĵo, uzata por kondukti kurenton. Elektraj instrumentoj estas konektitaj al amplifiloj per kabloj, kaj aliaj muzikaparatoj estas konektitaj inter si per kabloj. Vd senkabla konekto.

kapaŭskultiloj *headphones.* Paro de malgrandegaj laŭtparoliloj por meti rekte sur la orelojn. Vd kapmikrofono, poŝkasedilo.

kapo *head.* La supra parto de multaj kordinstrumentoj. Sur la kapo estas ofte la agordiloj.



kapotasto *capo.* Speco de movebla selo. Ilo por fiksi sur la kolon de ekz. gitaro, kiam oni volas okaze mallongigi ĉiujn kordojn je iu freto transponante la tutan instrumenton.

kartoĉo *cartridge.* Ujeto entenanta kromajn programaĵojn enmetebla en kelkajn specojn de sinteziloj por plivastigi ekz. la repertuaron de sonoj ludeblaj per la sintezilo.

kasedo, kasedbendo *cassette (tape).* Plasta ujo entenanta magnetofonan bendon por uzo en kasedmagnetofono. Ekzistas kvar specoj de kasedbendoj: normala kasedo ("tipo I") farita el feroksido; kroma kasedo ("tipo II") el kromdioksido; (malofta) ferkroma kasedo ("tipo III") el feroksido kaj kromdioksido; kaj metala kasedo ("tipo IV") el metalo. Multaj magnetofonoj havas regilon por ŝanĝi inter la diversaj specoj. Vd bendo, gramofona disko, kompakta disko, DAT-magnetofono.

k-diskludilo *compact disc player.* Vd kompakta disko.

k-disko. = **kompakta disko.**

kenona ŝtopilingo *canon socket.* Speco de ŝtopilingo (de la marko *Canon)* kun tri fiksaj stiftingoj. Ofte uzata por kantmikrofonoj kaj laŭtparoliloj de alpublikaj sonsistemoj. Vd ĵako, ino.


klapo *key.* Ĉiu el la moveblaj pecoj, per kiuj oni (mal)fermas la truojn de iaj blovinstrumentoj, ekz. saksofonoj kaj transversaj flutoj. Vd duonduta klapo.

klarneto *clarinet.* Ligna blovinstrumento kun rekta korpo, unuopa anĉo kaj klapoj. Ofte uzata en diksilando.


klavaro *keyboard.* Vico de klavoj por ludi klavarinstrumenton, ordinare kun blankaj klavoj por la bazaj tonoj, kaj nigraj por la diesaj kaj bemolaj tonoj. Klavarinstrumentoj estas ekz. piano, orgeno, akordiono kaj plej multaj sinteziloj.

klaveoj *claves.* Perkutinstrumento. Du lignaj bastonetoj kiujn oni kunfrapas. La klavea ritmo estas la bazo de plej multaj Latin-Amerikaj ritmoj.





Komikso Frederok



Abonkotizo por kvar n-roj
ordinare 15 NLG, nepagipovuloj 9 NLG
pagendaj per UEA-kodkonto kver-j
aŭ rekte al la redaktejo/administrejo:

Grupo Esperantista
Barrenkale Barrena 7-1
E-48005 Bilbao
Eŭskio / Hispanio

ABONU KAJ ABONIGU

EL POPOLA ĈINIO

Unu el la plej popularaj revuoj en la internacia Esperanto-Komunumo, distribuata de la Redakcio ekde 1994

- 12 numeroj jare, kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj
- Informoj pri la Esperanto-movado tra la mondo
- Esperanto-rubrikoj "Voĉo de Esperantistoj", "Por Komencantoj", "Inter Ni" k.a.
- Aktualaj raportoj pri la progreso kaj socia kaj popola vivo de nuna malferma Ĉinio
- Interesaj artikoloj pri la tradicia kulturo, historio, literaturo, arto, medicino, filozofio k.a. de ekzotika Ĉinio

EL POPOLA ĈINIO
P.O. Kesto 77
CN-100037 BEIJING, Ĉinio

HASTE-klaĉe

►Les Ablettes (la Alburnoj) el Fumel (Francio) kantos espo-titolon kiun **RoKo** tradukis el la franca: *"Je n'aimerai que toi"* ("Mi amos nur vin"). Tiu kanto estos prezentita en la kompilajo de **Vinilkosmo**. La **Alburnoj** estas konata franca rokbando kiu eldonis en 1984 sian unuan disketon kiu furoris dank 'al titolo *"Tu verras, tu verras"* ("Vidos vi, vidos vi"), kanto verkita de la famega franca kantisto Claude NOUGARO. De tiam, ilia kariero startis kun sukceso; en 86 kaj 87 ili eldonis du aliajn disketojn: *"Jacky s'en fout"* ("Jaĉjo prifajfas") kaj *"Jeunesse sauvage"* ("Sovaĝa junularo"); en 88 kaj 91 du diskegojn: *Les Ablettes* kaj *Art Commando*; finfine en 1993 la lastan albumon kasede kaj kompaktdiske *Anticonstitutionnellement* (*Kontraŭkonstitucie*) kaj kompaktdisketon (*"single"*) *Jour après jour* (*Tagon post tago*).

► **Jean François COUSINEAU** de unu jaro strebas estigi espo-junulgrupon en la provenca regiono (sudorienta Francio). Li estas basgitaristo kaj li aktivis en franca rokbando fine de la 70-aj jaroj. Ĉu baldaŭ ekzistos provenca esp-lingva rokgrupo?


Jean François COUSINEAU
268 route de Bellet
F-06200 NICE
Francio
Tel: +33 93.37.98.73 (hejma)
+33 93.18.78.96 (labora)

► **Windoplane** estas afrika muzikgrupo el Kameruno kiu kantas en la franca, en espo, en la angla, kaj en la gepatra lingvo. Ili taksas sian muzikon afrorok-ritma. Estis eldonita unua kased-albumo titolita *Prof Oumamba!* en la franca kaj angla lingvoj. Ili havas pretan demo-kasedon en espo kaj ili serĉas produktiston por ĝin eldoni. Por proponoj kontaktu ilin ĉe:

Mbatakoutcha OUNAROU (Windoplane)
B.P. 7169 DOUALA
Kamerunio
Tel: +237 (37) 18.81

►**Bernardo** malkovris ke espo-rokbandoj ekzistas dank' al la kompildisketo de **Amplifiki** kaj la **Rozmariaj Beboj** kiun eldonis **Vinilkosmo** en 1990. Li ŝatus komuniki kun espo-muzikistoj rilate muzikon por interŝanĝoj kaj spertoj. Li muzikis longe kun diversaj rokbandoj kiuj kantis france kaj angle. Li lernas espon de unu jaro kaj renkontis alian muzikiston; nun kune ili tradukas, verkas, kaj komponas kantojn en espo; tio donas al ili novan elanon. Ili petas konsilojn pri sintakso, metriko, rimoj, ktp. en la espo-verkado. Jen la kontakto:

Bernard SPEGGIORIN
92 avenue de Montredon
F-13008 MARSEILLE
Francio
Tel: +33 91.73.90.31



►La espo-societo **Tempo** en Tiĥvin (Rusio) organizas kulturajn programojn en 200-sidloka salono de la urba kulturpalaco. Proponoj de esp-artistoj bonvenas ĉe:

Societo Tempo
AB kesto 2
TIĤVIN, Sankt-peterburgskaja obl.
Rusio
Tel: +812 (67) 259.08

►**EOLA** (EsperantO – Lingvo Arta) estas festivalo okazanta en Rusio depost 1988, komence de marto. Ĝis nun estis nur prezentitaj artistoj el eks-Sovetio, sed la organizantoj ŝatus inviti eksterlandajn espo-muzikbandojn por pli internaciigi la etoson [vidu artikolon en rubriko Vivu vive!]. Interesitoj povas turni sin al:

SEJM
P.O. Box 111
RUS-143000 ODINCOVO
Rusio
Tel: +7 (095) 932.39.92
Faks:+7 (095) 292.65.11 por SEJM-O Box 12.701

► **Chizhou Kultur-Interkomunikiĝa Asocio**
Foreign Affairs Office of Chizhou Prefecture
CN-247100 ANHUI, province Guichi
Ĉinio
Tel: +86 (5661) 22.34.19
Faks:+86 (5661) 22.44.88
WANG Xigen persone: Tel: +86 (5661) 22.34.66

Ĉe tiu adreso kontakteblas WANG Xigen kiu gvidas la kanzon-rokmuzikan grupon **Maja** en kiu muzikas kaj kantas **WANG Chunping, LIU Wei, kaj LIN Bo**. WANG Xigen organizas ankaŭ kultur-programojn prezentante kanzonajn, popajn, kaj rokmuzikajn spektaklojn, kaj pentrajn kaj kaligrafiajn ekspoziciojn. Li pretas akcepti vin en tiaj kulturaj arangoj.

► **Asocio Esperanto en Val de Cisse**
88 rue Victor Hugo
F-37400 AMBOISE
Francio
Tel: +33 47.57.55.63

organizas espo-kultur-aranĝojn en salonego kun 300 sidlokoj. Tie jam estis prezentitaj **Kajto, Nikolin'**, kaj pentrajojn. La asocio kunlaboras kun **SAFT** [vidu artikolon en paĝo 36).

►**Kasumaye** ("**Paco**") estas estonta nomo de afrika muzikgrupo gvidota de

DIATTA Pierre-Paulin
Dakara Esperanto-Klubo
BP. 21231
DAKAR-PONTY
Senegalio

Li estas gitaristo kaj petas helpon de ĉiuj espo-muzikistoj kaj espo-muzikemuloj por akiri instrumentojn (gitaron, ktp.).

►**Torino**..., jes, ĉu vi ne memoras pri tiu brazila espo-rokbando kies gvidanto estas **Jhon**? Ĝi aktivas! Ĝi koncertis en julio 92 kadre de la 28-a Brazila Espo-Kongreso, sed ili havas maloftajn eblecojn koncerti en espo. **Torino** precipe kantas portugale depost 87 kaj ĝi surbendigis du kased-albumojn, sed bedaŭrinde en ili neniu espo-titolo. Espereble vi havos okazon konatiĝi kun ĝia muziko pere de la **Vinilkosmo**-kompilajo. **Torino** atendas proponojn pri koncertoj kaj produktado de esp-albumo: la grupo estas preta! En ĝi **Jhon João Carlos do NASCIMENTO** gitaras, **Guilherme ASP** basgitaras, **Luiz GUSTAVO** gitaras, kaj **Luiz MANUEL** kantas kaj drumas. Atentu! Ilia adreso ŝanĝiĝis:

Jhon João Carlos do NASCIMENTO
Shis-QI 23, Conjunto 7, Casa 15
Lago Sul
BR-71660-070 BRASILIA DF
Brazilo
Tel: +55 (61) 366.22.14

► **AMETSOWOU Y. Jérôme**
BP. 276
ANEHO
Togo

estas muzikisto rokmuzik-afrika; li ankoraŭ ne faris registrajojn sur kasedo aŭ disko. Mankas al li taŭgaj rimedoj (interalie instrumentoj) por taŭge muziki. Ĉiuj liaj kantoj estas en espo.

►Jen artisto kiu estas aktoro kaj kantisto-gitaristo. La spektaklo de Saŝa estas koncerto kaj teatrajo. Kanzono kaj rokmuziko estas lia stilo. Dum ĉi-jara SAT-kongreso li montris parton de siaj aktoraj kaj muzikaj eblecoj. Li prezentis siajn spektaklojn en IJK 87-a en Krakovo kaj en UK 90-a en Kubo (Havano). Li planas eldoni kasedon kun espo-kantoj. Ni esperas prezenti ĝin al vi baldaŭ.

PILIPOVIC Saŝa
Lole Ribara 12
YU-34000 KRAGUJEVAC
Jugoslavio
Tel: +38 (34) 511.387

►Ĉu vi aŭdis pri la espo-muzikgrupo **Esfahane Ĝavan** ("Juna Esfahano")? Eble ne, sed vi certe legis en pasintaj *Rok-gazet'*- **Retoj** pri la muzikisto. Li starigis finfine tiun espo-muzikgrupon kun tri aliaj muzikistoj kaj multaj malfacilajoj. Li ludas gitaron kaj orgenon, la aliaj gitaron, pianon, perkutinstrumentojn kaj fluton. Li difinas la muzikon de la grupo inter kanzono, roko, kaj naciaj kaj lokaj iranaj muzikoj. La grupo aktivas kaj koncertas kaŝe, ĉar la ŝtato malpermesas publike koncerti ne-iranajn kantojn; des malpli kiam temas pri espo-rokmuziko. Laŭ la nunaj islamaj registoj en Irano tiuj ĉi agoj kontraŭas islamon. En 1989 nia amiko kaj gvidanto de la grupo estis malliberigita dum monato ĉar li kantis nacian kanton de antaŭ la islama revolucio! En Irano estas multaj nekonataj artistoj; ili vivas en malliberejo. En tiu lando la vivkondiĉoj por artistoj estas tre severaj.

►**Zahra** estas eksbasgitaristo kaj kantisto de **The Shifters**, tiama fama franca rokbando. Li planas aperigi albumon sole tre baldaŭ sub nomo **Zahra**. La albumo estos en la angla, sed li profitos la studion por surbendigi du espo-titolojn kiujn **Aline BOULET** (lia edzino kaj eks-Amplifiki-anino) tradukos/adaptos. Certe unu troviĝos en la **Vinilkosmo**-kompilaĵo, sed decidigu lin enmeti almenaŭ unu espo-version en sian albumon.

Aline kaj Zahardin BOU KORTT-BOULET
51 rue Piat
F-75020 PARIS
Francio
Tel: +33 (1) 40.33.46.75.

►Jen surbendigite! La **Bruemaj Najbaroj** pretigis espo-titolon por la kompilaĵo de **Vinilkosmo**, temas pri "Nun vi scias": vi vidos, ĝi estas interesa muziko kiu neniel similas al la aliaj. Tiu vigla poproko ravegos vin. Gratulojn kaj instigojn por pliaj espo-titoloj sendu al

Stephan BERTHOLIO
6 passage des Frênes
F-31240 SAINT-JEAN
Francio
Tel: +33 61.74.13.71



►**Eckhard BICK** kompilos *Gvidlibron pri Esperanto-Kulturo*. Ĉu vi iel ajn partoprenas la kulturan vivon de Esperantujo? Ĉu vi verkas, kantas, muzikas, teatras, dancas? (ĉu ni forgesis ion?) Legu do la intervjuon en paĝo 35, kaj ekkontaktu lin:

Eckhard BICK
Rugbjergvej 98
DK-8260 VIBY-J
Danio.

►Ĉu Jan daŭre nur *"hej-hulos"*? [Vidu la artikolon en paĝo 8.] Ĉu li formos novan grupon? Kuraĝigu lin!

Jan NAVRATIL
Masarykova 1596
CZ-41500 TEPLICE
Ĉeĥio

►Bolas la junulara esperanto-kulturo – sed ofte mankas rimedoj. **Esperanto-Junularo de Brandenburgio** povus konsili vin, almenaŭ ene de la Eŭropa Unio. [Legu la artikolon en paĝo 8.] Kontaktinda.

Esperanto-Junularo
Brandenburgio
Berliner Str. 49
D-14467 POTSDAM
Germanio
Tel. +49 (331) 2.40.03

►Agordiĝu kun **Akordo**, la nederlanda ĥoro [vidu artikolon en paĝo 24]. Ili bezonas alian **tenoron** – do prezentu vin, se vi loĝas aŭ loĝos en Nederlando. Ili ankaŭ ŝategus prezentiĝi eksterlande – do, faru proponojn por viaj spektakloj!

Akordo
Witte de Withlaan 11
NL-2341 SP OEGSTGEEST
Nederlando

►**Frank BUCKLEY**, konata brita movadulo, verkisto de komediaj teatraĵoj kaj komponisto, festos sian okdek-jariĝon la 16-an de junio 1994. Sendu al li gratulkarton – kun centoj da aliaj, ĝi ekspoziciiĝos en publikaj bibliotekoj de Bristolo!

Frank BUCKLEY
620 Filton Avenue
GB- BRISTOL BS12 7LD
Britio

►**Ein Gedi** estas tute nova esperanto-jazbando el Israelo. En 1993, **Eŭgenia RUBINOV** ĉe kantado kaj **Doron SUODAN** ĉe piano kaj komponado, surpiedigis la jaz-duopon. Kvankam **Ein Gedi** estas tre nova, ĝi jam koncertis okaze de esp-renkontiĝo en Jerusalemo. La duopo planas surbendigi kelkajn kantojn, kiujn vi eble povos baldaŭ malkovri.

Eŭgenia RUBINOV
311/36 Robovič St.
JERUSALEM
Israelo.
Tel. +972 (2) 73.13.36

►**SAFT** (**SAT-Amikara Fonduso por Turneoj**) faras **ALVOKON** al esperantistaj artistoj: jam pensante pri venontaj turneoj, la artistoj kiuj pretus koncerti kadre de SAFT estas petitaj informi pri siaj kondiĉoj:

Marcelo REDOULEZ
25 avenue de la Nigra Princo
F-33750 CAMARSAC
Tel. +33 56.30.16.59

ANONCetaj

►**Biera Semajn-Fino.** EJDO (Espo-Junulara "Damna" Organizo) invitas vin inter la 28-a de aprilo kaj la 1-a de majo 1994 en Kopenhago (urbo de la fama **KEF-4**) kie okazos junulara fakrenkontiĝo pri la esenca dana temo: "**Biero,** ĝia rolo en socio, historio, kaj praktik4". Jam ekde nun programo petindas (des pli ke la aliĝo malmultekostas) ĉe:

Jakob NORDFALK
Rådmandsgade 53,2.th
DK-2200 KØBENHAVN N
Danio
Tel: +45 31.83.82.20
Faks:+45 35.32.04.60



►**Françoise NOIREAU**
Les pommiers 14 B
Chemin de la Tour
F-05100 BRIANÇON
Francio
Tel: +33 92.20.35.34.

Serĉas kasedojn de infanoj aŭ porinfanaj kantoj esperantlingve. Se iu havas ideon aŭ konas tiajn registraĵojn, bonvolu informi ŝin, sed ankaŭ nian redakcion: tiu informo povos utili al multaj espo-familioj kiuj havas/os infanetojn!

►**Parzival** skribas al ni delonge kaj li havas amasegon da ideoj por pacigi la mondon kaj eks-Jugoslavion, interalie pere de *La libro de la ununura vero* (kunmetaĵo de Biblio kaj Korano). Pliajn informojn petu de:

Parzival
Centro Lidja Zamenhof
Juravorstadt 13
CH-2502 BIELO
Svisio
Tel:+41 (32) 22.00.65

►La 27-an de oktobro 93, aŭskultante beogradan radiostacion **Radio-Pingvin** ("Radio-Pingveno"), la plej ŝatata kaj la plej aŭskultata stacio inter la gejunuloj, oni povis aŭdi espon. Dum duonhora elsendo, la radio-parolisto **Dejan JEREMIC-DEŜA** interparolis pri espo kun beogradaj geaktivuloj, **Gabrijela, Bane,** kaj **Renato.** Ili klarigis kio estas espo, anoncis espo-kurson por komencantoj, kaj prezentis *Rok-gazeton.* Paŭze estis aŭskultita muziko de **Amplifiki.** Se vi deziras subteni prezentadon de sekvontaj numeroj de *Rok-gazet'* ĉe **Radio-Pingvin,** sendu dulingvan (en espo kaj via nacia lingvo) poŝtkarton al:

Radio-Pingvin (D. JEREMIC)
Autoput 2
YU-11070 BEOGRAD
Jugoslavio
aŭ
Renato PETROVIC
Ustanička 218/21
YU-11000 BEOGRAD
Jugoslavio

►**Saimir** estas albana studento pri biologio en la universitato de Tiranë, li estas 20-jara, li ŝategas muzikon sed ne konas espo-muzikon; li estas komencanto kaj ŝatus korespondi kun francaj geesperantistoj. Li konas ankaŭ la francan lingvon kiun li lernas ĉe *Alliance Française* en Tiranë. Korespondemuloj, vi ne povos lasi lin senespere!

Saimir BEQIRAJ
Lagjia 8 Nëntori (Perash)
Rruga Alqi Kondi, pallati 13
SHKODER
Albanio

RADIO-laĝoj

Ni volis fari kiel eble plej kompletan liston kun detaloj, sed pluraj radio-stacioj ne respondis al nia alvoko kaj delonge ne donis vivsignon al ni pri siaj esprogramoj. Tamen kelkajn el ili ni kaptis kaj scias ke ili dissendas espo-muzikon.

Ĉiuj horaroj + UTC signifas: Mez-Eŭropa Universala Tempo.

Gravegas ke vi skribu al tiuj radio-stacioj por ke ili pli ofte dissendu espo-rokmuzikon. Viaj leteroj ankaŭ ebligos al ili pludaŭrigi siajn esprogramojn; sen tio ili iom post iom malaperos kiel Radio Svisa Internacia, Radio Zagreb, Radio Libera Ondo, ktp.

• **Radio Estonio** ekde la 1-a de septembro 93 ĉesis elsendi en espo kaj aliaj fremdaj lingvoj. Se vi ne reagas amase, ankaŭ tiu programo malaperos definitive. Skribu al ĝi en espo petante restarigon de la espa programo:
Estona Radio
EE-0100 TALLINN
Estonio

• **La esprogramo de Radio FMR** en Tuluzo, *Konektu vin Esperante*, ekzistas de post aprilo 1988. La lastaj du jaroj estis tre malfacilaj ĉar ne estis certe ĉu **Radio FMR** ricevos permeson pludissendi. Nun ĝi havas rajton disaŭdigi siajn programojn por ankoraŭ 5 jaroj. Ĝi estas asocia, nekomerca radio-stacio kaj laŭ enketo farita de oficiala instanco, ĝi estas la plej aŭskultata de la gejunuloj el la samkategoriaj radio-stacioj. Ekde la 15-a de oktobro 93 ĝia frekvenco ŝanĝiĝis: la nova estas 89,1 Mhz FM en Tuluzo kaj ĉirkaŭajoj je 30 km, kaj 94,2 Mhz en Montauban, urbo 60 km norde de Tuluzo, disaŭdigata sur gastiga radio-stacio.

La programoj de **Radio FMR** estas ĉefe rokmuzikaj. La esprogramo disaŭdiĝas ĉi-jare ĉiu-vendrede de la 16.00 h ĝis la 17.00 laŭ loka horo. Krom informojn pri Espio, ĝi disaŭdigas abunde espo-rokon.
Radio FMR
Esperanto-Redakcio
9 bis avenue Frédéric Estèbe
F-31200 TOULOUSE
Francio.

• **Radio-Pingveno** estas sendependa loka beograda radio-stacio kiu ekzistas de la 22-a de septembro 1991. De tiam ĝi fariĝis la plej aŭskultata radio en Beogrado (44% aŭskultas ĝin, ĉirkaŭ unu miliono da personoj). De la komenco ĝia frekvenco estas 90,9 Mhz FM. Radio-Pingveno estas amuza, muzika, kaj kontakta radio. Ĉirkaŭ 100 gejunuloj kunlaboras tie (meze 25-jara). La ideo-kreinto estas Darko KOĈJAN, kiu imagis Pingvenon kiel radion sen politiko, sen problemoj, kaj kvazaŭ sen folklora muziko. Pingveno celas eltiri almenaŭ unu rideton de ĉiu, ĉiutage dum la jaro. Ĝi deziras kunlabori kun ĉiuj kiuj havas novajn, interesajn ideojn pri muziko, kulturo, libroj, kino, ktp. Pingveno organizas koncertojn, ĉiujaran konkurson pri mallonga rakonto, eldonas librojn, kaj diversmaniere agadas en la kultur-kampo.

Por ke espo-muziko estu pli aŭskultata en ĝi, helpu ĝin havigi sonmaterialon en espo.
Radio-PINGVIN
Esperanto-fako
Autoput 2
YU-11070 BEOGRAD
Jugoslavio
Tel: +381 (11) 69.71.30
+381 (11) 69.34.17
Faks: +381 (11) 69.20.40

• **La esprogramo de Radio 3. ZZZ** ekzistas de jam baldaŭ 5 jaroj kaj disaŭdigas ĉiuspecan muzikon (rokan, popolan, klasikan, ktp.). Krom esperanto, en **Radio 3. ZZZ** estas ankaŭ 54 diverslingvaj programoj. **Radio 3. ZZZ** konsistas entute el 6.000 membroj. La esprogramo okazas ĉiu-lunde de la 13.30 h ĝis la 14.00 laŭ loka horo sur 92,3 Mhz FM.
Radio 3. ZZZ
Multicultural Melbourne Radio
Esperanto-Radio-Programo
P.O. Box 1106
Collingwood 3066
MELBOURNE, VIC.
Aŭstralio
Tel: +61 (3) 415.19.26-30
+61 (3) 415.19.23-25
Faks: +61 (3) 415.18.18

• **Radio Vatikano** dissendas siajn 15-minutajn programojn ĉiu-ĵaŭde je la 06.10 h UTC sur 1.611, 6.185, kaj 7.365 Khz AM, kaj ĉiu-dimanĉe je la 20.20 h sur la frekvencoj 1.530, 6.245, 7.250, kaj 7.355 Khz AM. Tiuj religiaj programoj ne disaŭdigas espo-muzikon.
Radio VATICANA
Esperanto-redakcio
Piazza Pia 3
I-00193 ROMA
Italio.

• **Radio Esperanto** daŭre dissendas sian programon en la pariza regiono ĉiu-vendrede de la 18.00 h ĝis la 19.00 loka horo sur la 89,4 Mhz FM de **Radio Libertaire** (Liberecana Radio). Gvidata de Yves Peyraut de SAT, tiu programo disaŭdigas regule espo-muzikon.
Radio Esperanto/Libertaire
145 rue Amelot
F-75011 PARIS
Francio
Tel: +33 48.05.34.08

• **Radio Rio de Janeiro** estas spiritisma radio-stacio kiu dissendas 15-minutan esprogramon ĉiu-dimanĉe je la 08.00 h matene laŭ loka horo sur la frekvenco 1.400 Khz, mezondlongo 480m AM. La programo ne dissendas espo-muzikon nek kanzonojn pro ties ekskluzive religia karaktero.
Radio Rio de Janeiro
Brazila Spiritisma Federacio
Av. Passos, 30
BR-20051 RIO DE JANEIRO, RJ
Brazilo.

• **Radio Havano Kubo** regule dissendas duonhoran esprogramon ĉiu-dimanĉe je la:
07.00 UTC por Nordameriko kaj Pacifiko: 6.060 Khz AM
15.00 UTC por Ameriko kaj Karibio: 11.760 Khz AM
18.30 UTC por Afriko kaj Mediteraneo: 17.760 Khz AM
22.00 UTC por Eŭropo kaj Mediteraneo: 17.760 Khz AM
23.30 UTC por Ameriko: 11.760, 11.970, 13.660 Khz AM

Sendu al la redakcio leterojn kaj poŝtkartojn por subteni kaj kuraĝigi la re-

as informojn kaj fragmentojn de *Rok-gazet'*, kaj disaŭdigas espo-muzikon en ĉiuj esprogramoj. Ili sentas sin izolitaj. Ili bezonas ĉiuspecan inform-materialon, do sendu al ili viajn espo-muzik-produktajojn: ili estos dissenditaj!
Radio Habana Cuba
Esperanto-redakcio
Apartado 62-40
LA HABANA
Kubo
Tel: +53 (7) 49.54

• **ÖRF** (Radio Aŭstrio Internacia) dissendas 25-minutan esprogramon ĉiu-dimanĉe je la:
04.05 UTC por Eŭro-
po: 6.155, 13.730 Khz AM
por Proksim-Oriento: 15.410 Khz AM
13.05 UTC por Eŭropo kaj Afriko: 6.155, 9.870, 13.730 Khz AM
por Azio: 15.450 Khz AM

Tiu esprogramo ĉiufoje dissendas espo-muzikon, sed ne ĉiam roka. Facile kaptebla por eŭropanoj.
ÖRF Radio Aŭstria Internacia
Esperanto-redakcio
A-1136 WIEN
Aŭstrio.

• **Radio Pekino** fariĝis **Ĉina Radio Internacia** (CRI). Ĝi dissendas ĉiutage 30-minutan esprogramon je la:
11.00 UTC por Japanio kaj Koreo: 6.955, 9.480 Khz AM
13.00 UTC por sudorienta Azio: 11.650, 11.840 Khz AM
20.00 UTC por Eŭro-
po: 7.470, 9.965 Khz AM
22.30 UTC por Latin-Ameriko (ankaŭ Eŭropo): 7.470, 9.965 Khz AM

La espo-redakcio de Ĉina Radio Internacia regule dissendas espo-rokkanzonojn, sed ili bezonas ricevi pli da materialo (ĉefe kasedojn) kiujn ili disaŭdigos en la Muzika Programo kaj Semajna Kanto. Viaj espo-muzikproduktajoj estas bonvenegaj en la redakcio.
Ĉina Radio Internacia
Esperanto-Sekcio
CN-100866 BEIJING
Ĉinio

• **Pola Radio** dissendas ĉiutagan esprogramon 25-minutan je la:
14.30 UTC por Eŭro-
po: 6.135, 7.145, 9.525, 9.540, 11.815 Khz AM
21.30 UTC por Eŭr-
opo: 1.503, 5.995, 6.135 Khz AM

Espo-muziko kaj informoj pri espzikkulturo estas regule disaŭdigitaj. Tre kvalitaj esprogramoj, nepre subtenindaj. Skribu al la redakcio:
Pola Radio
Esperanto-Redakcio
Postkesto 46
PL-00.950 WARSZAWA
Pollando
Tel: +48 (22) 45.93.37
+48 (22) 45.93.58
Faks: +48 (22) 44.41.23.

ROKMUZIKA reto

Jen pliaj adresoj kaj informoj por la espa *Rokmuzika Reto*. En ĝi vi retrovos jam aperintajn en *Rok-Gazet'* nur kiam plio koncernas ilin.

Sekve al plendoj de nia legantaro, ni pensis ke plej bona solvo por estonte tion eviti estas ke niaj karaj korespondantoj menciu kiam ili *ne* deziras aperi en la reto aŭ kiam ili ne deziras ke ni aperigu tuton aŭ parton de ilia letero en *Rok-Gazet'*. Antaŭdankon al ĉiuj.

► Jen radio-amatoro kiu kantas kaj verkas en espo. Li tre interesiĝas pri espo-muziko kaj aktive reklamas pri ĝi. Lia radio-amatora voksigno estas UB 5WDT kaj adreso:
Leon KOLESNIKOV
Sahaj Dachnogo 65-1
UKR-293720 DROGOBYCH
Ukraino

► Li estas studento kaj muzikemulo kaj ŝategus havi espo-muzikajn kasedojn por aŭskulti kaj ĝui espo-kantojn. Ne ekzistas tiu ebleco en lia lando. Kiu pretus gojigi lin?
Manandhar Razen
KHA 1-380
Khichapokhari
KATHMANDU 3
Nepalo

• **Ekde 1970 estis fondita ILERA** (Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj), La retoj de ILERA aktivas regule inter radio-amatoroj de la tuta mondo. Kompreneble ili ne dissendas espo-muzikon, sed povas anonci informojn pri espo-muziko en la frekvencoj kaj en ILERA Bulteno, sufiĉas transdoni al ili la informojn. Sendu ilin al:
ILERA
p/a Hans WELLING
Zum Ortenbrink 42
D-49205 HASBERGEN
Germanio
Tel: +49 (59) 29.72.02

• Por franclingvanoj, **SAT-Amikaro** eldonis tre interesan informilon kies titolo estas *L'esperanto sur les ondes* (Espo en la ondoj). Tiu ĉi informilo bonege prezentas tion kio estas radio kaj la diversajn esprogramojn kaj konsilojn por tiuj kiuj ne tro scias kiel kapti ilin. Petu tiun informilon al:
SAT-Amikaro
67 Av. Gambetta
F-75020 PARIS
Francio
Tel: +33 (1) 47.97.87.05
Faks: +33 (1) 47.97.71.90

• **Josef LECHERMEIER**
Waldeysenstraße 19
D-85057 INGOLSTADT
Germanio
Tel: +49 (841) 48.25.80
kompilas horarojn kaj frekvencojn de la esprogramoj de la diversaj radio-stacioj internaciaj, sed li planas ankaŭ inventari ekskluzive ĉiujn esprogramojn dissenditajn de lokaj radio-stacioj kun iliaj horaroj kaj detalaj informoj. Se vi konas aŭ produktas esprogramon en loka radio-stacio, nepre informu lin.

► **Oguinye Prince Henry, D.C.**
P.O. Box 3059
Owerri IMO State Nigeria
Niĝerio
Tel: +234 (83) 23.01.98

Li estas studento en universitato, kaj li muzikemas. Li estas ankaŭ prezidanto de NIJEK (Niĝeria Junulara Espa Klubo). La ekonomia, religia, kaj politika problemoj de lia lando malebligas al la espo-kluboj akiri kasedojn kaj diskojn kaj eĉ aboni *Rok-gazeton*. Gravas ke la espo-klubanoj malkovru la espan muzikon, des pli ke ĉiuj membroj de NIJEK kaj BSEK (Brilanta Stelo Espo-Klubo) estas lernejanoj kaj studentoj. Tie la junuloj frenezigas pri repo, popo, kaj regeo. Ĉetere, ili tre ŝatus la diversajn espo-rokajn, popajn, kaj folkajn produktajojn; kaj pere de ili, ili multe pli vigle sukcesus varbi por espo en la universitato.

► Jen lia nova poŝta adreso:
M. Mehdi Noruzi
P.O. BOX 81465-838
ESFAHAN
Irano
Tel: +98 (21) 25.22.20 (valida ĝis fino de julio 94)

La gejunuloj tie havas grandegan interesiĝon pri alilandaj muzikkasedoj (speciale rokaj). espo-rokmuzikkasedoj estus ŝategataj de ne nur geespistoj sed ankaŭ de neespistoj! Vidu en Haste-Klaĉe: ili kalkulas je helpemo kaj subtenemo de niaj legantoj kaj espo-kluboj.

► **Herman DECEUNINCK**, kompilinto de la artikolo pri Tutti Futti en tiu ĉi numero [vidu paĝon 31], kolektas informojn pri asocioj kiaj **Rok-Reto kaj Regionoj**, iniciatoj, kaj kantistoj. Sendu kontaktojn al li:
Herman DECEUNINCK
Kluisstraat 22
B-1500 HALLE
Belgio
Tel: +32 (2) 361.36.17

► **Christopher R. NELSON**
P.O. Box 13413
RENO, NV 89507
Usono
Plia espo-muzikisto en la reto.

► **Jozef TRUONG** estas la nuna direktisto de USEJ (Usona Espa Junularo). Li subtenas EUROKKA-n kaj *Rok-gazeton*, kaj por kontribui pli aktive en la espo-rokmovado li havas ideon fondi usonan espo-rokbandon. Tio ja estus nekredebla miraklo! Kontaktu lin, li certe bezonos fanklubon:
Jozef TRUONG
624 Second Street
LANCASTER, PA 17603-5114
Usono

► **Shahab Fakhimi**
PO Box 13145-1496
TEHERAN
Irano
kaj
Babek Moarrf
PO Box 345
MAHSHAHR PORT
Irano

Ambaŭ ŝatus ricevi informojn, novaĵojn, kaj sonmaterialon, ktp. pri espo-rokmuziko. Ili volas pli funde konatiĝi kun espo-rokkulturo.

► Novalveninta rokemulo kataluna malkovras iom post iom diversajn produktajojn de espo-rokbandoj. Li vere entuziasmiĝas. Li petas klarigojn pri la kasedo de Amplifiki, *Esperanto ne konas landlimojn*, kie troviĝas kanto pri Dario BESSEGHINI. Ramón volas scii kiu li estas, kio estas lia historio kaj anekdotoj. Tiuj kiuj scias ion pri Dario bonvolu informi nian amikon, des pli facile li komprenos la signifon de la teksto.
Ramón LINARES I VALLS
Carrer Sebastià Artes, 36
E-08700 IGUALADA
Katalunio / Hispanio
Tel: +34 (3) 80.44.510

► Titine estas aktiva rokemulino, ŝi rilatas kun sonstudio Amper, kaj kun koncertejo en sia regiono. Ŝi agadas por diskonigi espo-rokmuzikon kaj helpas en la espigo de kantoj. Geuloj kiuj havas saman sintenon en ŝia regiono (Thionville, Metz), kontaktu ŝin:
Christine ZEHREN
4 rue des Jardins
F-57440 ALGRANGE
Francio
Tel: +33 82.85.01.96

► **Jean DOUBLET**
785 chemin du Peyrouas
F-06640 SAINT JEANNET
Francio
Tel: +33 93.24.92.63

Li ŝatus provi espigi francajn aŭ anglajn kantojn, kondiĉe ke oni donu al li la ĝustan detalan metrikon kaj sufiĉe da tempo. Grupoj kaj kantistoj interesataj, kontaktu lin.

TUB TUB TUMB TUB TUMTOB

PLEJ FREŜAJ PRODUKTAĴOJ EN LA KATALOGO DE

Vinilkosmo

(Vinilkosmo-referencoj
VKKD = kompakt-disko
VKK = kasedo)



VKKD-7 / VKK-18
Kajto: *Tohuvabohuo*




VKKD-8 / VKK-19
Kečka/Kantika *Kanto de l' Popolo*



VKK-20
Piŝamandurjes: *L'any dels gossos*
(La jaro de la hundoj)

EKDE NUN
ANTAŬMENDU/AĈETU
MALPLIKOSTE
LA VINILKOSMO-KOMPILAĴON



VKKD-9 / VKK-21
Vinilkosmo-Kompilaĵo (aperonta)

ABONU!

ROK-gazet'-abonilo

EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE
Francio
tel. +33 61.81.95.65

Abono kostas 100 FRF, 35 NLG, aŭ 21 IRKP (20 NLG aŭ 12 IRKP aŭ egalvaloro por netranspagpovuloj), kaj validas por 4 numeroj.

Familia nomo _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Persona nomo _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Asocio _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Adreso _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Telefon/fakso _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

- ☐ Mi deziras aboni ekde n-ro: _ _ _ _ _
- ☐ Mi deziras ricevi la n-rojn: _ _ _ _ _
  (po 25 FRF, 8,75 NLG, 5 IRKP)
- ☐ Mi deziras reaboni *ROK-gazet'*on.
- ☐ Mi sendas 100 FRF per ĉeko aŭ poŝtmandato (nur por Francio)
- ☐ Mi sendas 35 NLG aŭ egalvaloron per internacia poŝtmandato al EUROKKA.
- ☐ Mi sendas 35 NLG per UEA-konto al EUROKKA (UEA-kontkodo: rokk- b.
- ☐ Mi sendas 35 NLG aŭ la indikita sumo por netranspagpovuloj al peranto de *ROK-gazet'* aŭ la esp-asocio de mia lando.
- ☐ Mi sendas 21 IRKP (internaciajn respondkuponojn) aŭ 12 IRKP por netranspagpovuloj al EUROKKA.

Dato kaj subskribo:

GRAFIKA CENO, F-31450 MONTGISCARD (Francio)